esperanto

JUNIO 1990 • 83-A JARO • N-RO 1014 (6)

ISSN 0014-0635



- **Honto kaj fiero: lecionoj de *La danĝera lingvo***
- **Pli ol cent partoprenas la unuan togolandan kongreson**
- **Fervojo, filozofio, Finnlando: ĉu refloras la faka literaturo?**

Kien post la Muro?

Enhavo

109 Kulturo: Pri ni mem, sen iluzioj: Lecionoj de *La danĝera lingvo* (Olga Kerzjuk)
112 Regiona agado: Por plua esploro en Azio (Joachim Werdin); Ŝanĝo de la vivo (Chan Sook Wai); Vizito = apliko (Liu Xiaozhe); Nova voĉo el Vjetnamio (Lê Nhiem)
114 Landa agado: Pri disvastigo kaj memstariĝo en Togolando; Vidu okcidentan Afrikon deproksime!
115 Faka agado: Kiel verdigi la verdulojn? (Emilo Mas); Lingvo de la tutmondismo (Claude Tellier)
116 Informado 5: Dinamiko (Ivo Durwael)
Nekrologo: Audrey Childs-Mee (1926-1990)
117 Movadologio: Kiel ekvilibrigi niajn bezonojn kaj rimedojn? (Gian Carlo Fighiera); Praktike kaj demokratiige (Mark Fettes)

119-128
Speciala sekcio: Rekonstruo en la Esperanto-movadoj de orienta Eŭropo
Kio nova en orienta Eŭropo? (Árpád Rátkai); Disfalo de la putriĝinta sistemo (Tyburcjusz Tybłewski); Venis tempo por intelektuloj (Ljubomir Trifonĉovski); "Jam vidita" situacio (Senad Čolić); Esperanto ĉe la vojkruciĝo (Zlatko Tišljar); GDREA – ĉu nur epizodo? (Detlev Blanke); Senmona libereco (Petr Chrdle); Pensoj post la Budapeŝta Kunveno (Thorsten Bendias); Ĉu la nova Pollando voĉdonos por Zamenhof? Raporto el la naskiĝurbo (Humphrey Tonkin)

129 Reagoj: Paradizo? Ne ĉi tie! (Zdravka Metz); Odorheiu Secuiesc (H)? (Ionel Onet); Sendanka senpacienco (Jozefo Nagy)
130 Recenzoj: *Atlaso de insekta morfologio* (Paulo S. Terra); *Fervoja terminaro en Esperanto* (Jan Pospišil); *Geologia vortaro* (J. M. Mabesoone); *Ĉinaj protektataj bestoj* (C. Støp-Bowitz); *Kuriozaj floroj kaj arboj en la provinco Yunnan, Ĉinio* (G. F. Makkink); *Antikvaj filozofoj de Ĉinio* (Albert Goodheir); *Zamenhofa ekzemplaro* (Sergej Kuznecov); *La finna vojo* (Ralph Harry)
134 Laste aperis (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)

Vi trovos,

se vi konsentos dum momento pensi pentroarte, ke la malfruan liveron de ĉi tiu kanvaso ni kompensis per ĝia nekutima vasteco kaj abundo da farboj. Precipe la diversaj pejzaĝoj el orienta (ĉu nun diri meza?) Eŭropo aplikas tre buntan paleton. Kvankam la perspektivoj malsamas, la artistoj senescepte trovis lokon por kelkaj helaj koloroj . . . ja esperantistoj estas kutime ankaŭ esperistoj! Sed ili ne hezitas akcenti samtempe la defiojn kaj problemojn, kiuj ombras la randojn de la bildo. Nuancojn de nigro vi cetere trovos en la ĉefartikolo. Ties sentabuiga kuraĝo malfermas novajn direktojn kaj temojn por la pli avangardaj el niaj pentristoj.

Sur aliaj paĝoj, aliaj indikoj pri la vojo antaŭen. Azio kaj Afriko, ekologio kaj informado, kaj kvar paĝoj pri fakaj eldonaĵoj pravigas nian ambicion. La movado ja maturiĝas kaj moderniĝas – ne senpene kaj ankoraŭ ne sufiĉe, sed tamen kuraĝige. Nepras plu evoluigi tiun propran pentrostilon, ekzerci ĝiajn kapablojn kaj elprovi ĝiajn limojn, sciante ke ni havas ion por diri per ĝi al la pli larĝa mondo.

La kovrilo: Malmulto ankoraŭ restas el la Berlina Muro, simbolo de dividita Eŭropo. Esperantistoj kontribuis siaflanke al ĝia malkonstruo – sed kion la ŝanĝoj signifos por la movado?

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto). **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.
Redaktoro: Mark Fettes.
Abonprezo: varias laŭlande (gld. 48,75; US$ 23; GM 43; enoj 3600; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.
Anonctarifo (gld.): 1 p. 1540, 1/2 p. 850, 1/4 p. 470, 1/8 p. 260, 1/16 p. 150. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.
Telefakso: +3110 436 17 51.
Telekso: 23721 uea nl.
Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag).
Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.
Direktoro de la CO: vakas.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (01) 542 0302; telefakso (01) 383 4108.
Vicprezidanto (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, u. Majdańska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.
Vicprezidanto (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemarkenstr. 150, D-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 680 32 50.
Ĝenerala Sekretario: s-ro Osmo Buller, Suksitie 4 B 15, SF-93400 Taivalkoski, Finnlando; tel. (988) 51 003; telefakso (988) 51 681.

Estrarano (informado): s-ro Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, B-2520 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.
Estrarano (financo, junularo): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.
Estrarano (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II.3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.
Estrarano (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11, Seoul - 158-600, Korea Respubliko; tel. (02) 646 5413; telefakso (02) 275 0633.
Estrarano (kulturo): s-ino Spomenka Štimec, Nova Ves 87, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio; tel. (041) 42 92 51; telefakso (041) 42 12 94.
Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.
Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendahl, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47; telefakso (1) 43 66 09 92.

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr 1014 (6), juni 1990. Verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

Kulturo:

Pri ni mem, sen iluzioj: Lecionoj de *La danĝera lingvo*

– Vi ne kredos – l' anoncanto diris subite: – se mi ne scius, kiu legas, mi pensus, ke estas Tujsemov, la fiulo.

– Tujsemov? – mi komprenis: tiu, kies tonojn memorigis la voĉo de sur la scenejo.

– Jes. Mi estas ja esperantisto. Ĉu komprenite? Tutmonda lingvo. Nenia "bejsik ingliŝ". Pro Esperanto arestita. Mi estis membro de l' Moskva Societo de Esperantistoj.

– Ĉu 58, punkto 6? Spionado?

– Kompreneble.

– Dek?

– Dek kvin.

– Kaj Tujsemov?

– Tujsemov estis la vicprezidanto de l' Societo. Li perfidis ĉiujn, preparis por ĉiuj dosierojn.

– Malgrandulo?

– Nu, jes.

– Kaj kie li estas nun?

– Mi ne scias. Permane mi sufokus. Mi petas vin kiel amikon – kun l' aktoro mi konatiĝis antaŭ ne pli ol du horoj –, se vi vidos lin, se vi renkontos, batu lian muzelon. Batu muzelaĉon, kaj pardonita estos duono de viaj pekoj.

– Ĉu vere duono?

– Jes, pardonon vi ricevos."

Varlam Ŝalamov, "Esperanto"
(el *Rakontoj el Kolyma*)

Dum via vizito en 1987 en Ĉebaltio, en Tallinn turnis sin al vi aktivulo de la estona E-movado V. E. Kauts kaj transdonis al vi leteron pri la stato de E-aferoj en Sovetio. Vi diris: "Antaŭ Esperanto mi donus prioritaton al unusola afero – perestrojko. Jen ni finos ĝin, tiam ni okupiĝos pri Esperanto!" (Sed tiu ĉi fakto de via renkontiĝo kun V. E. Kauts ne estis, bedaŭrinde, menciita per centra gazetaro – strange, ĉu ne?)

El malfermita letero de N. Griŝin, latvia esperantisto, al M. Gorbaĉov.
Respondo el Kremlo ne venis.

Jen libro, kiu inde kronis la centjariĝon de Esperanto. Libro, pri kiu ni ĉiuj povas fieri. Fieri, ke nia komunumo havas sian historiiston. Ni bezonas ĝuste tiajn historiistojn – kroĉitajn al faktoj, ĉu plaĉaj aŭ malplaĉaj por ni, esperantistoj. La historio de la persekutoj kontraŭ Esperanto kaj esperantistoj estas prezentita fakulsperte kaj honeste. Pli ol 500-paĝa studo ne apartenas al facilaj legaĵoj, "gluti unuspire" ĝin ne eblas. Ne nur pro ĝia amplekso, faktabundo, kiu ja postulas tempon por digesti, sed ankaŭ pro la elmetitaj problemoj, instigantaj nin pensi pri nia esperantista identeco.

Male al s-ro Baldur Ragnarsson (vidu lian recenzon pri *La bona lingvo* en la februara n-ro), mi opinias, ke diskutoj inter esperantistoj rilatas *ankaŭ* kaj *ne tiom malofte* al "nia konscio pri ni mem kaj pri nia identeco". Nur en relative libera socio eblas fordoni vin al nur prilingvaj diskutoj, ne tro okupante vin pri tio, kiel via esperantisteco rilatas al la reganta ŝtatideologio. En totalismaj ŝtatoj, kie ideologio estas deviga kaj ĉiea, okupiĝi nur pri lingvaj demandoj ne eblas. Necesas ja iel transvivi sub premo de ideologio, kiu ne donas klaran respondon pri lingvoproblemoj.

La libro de U. Lins tuŝas konscion pri nia identeco. En ĝi temas pri diversaj tipoj de persekutoj, el kiuj la plej konscienctranĉa, laŭ mi, estas persekutado de esperantistoj fare de... aliaj esperantistoj. Fronte al tiu fakto ne eblas flankenmeti la demandon pri nia identeco. Kiaj ni estas? Kiajn oferojn – kaj kiajn krimojn – ni pretas fari por savi (aŭ kompromiti) "nian karan lingvon"? Eterna demando do: Ĉu la celo pravigas la rimedojn? Ĉu por savi organizitan movadon ni pretas ĵeti en la faŭkon de totalisma ŝtato niajn samideanojn? Kiom unuiga estas la esperantista idearo? Ĉu ŝtatpartia ideologio povas superi la homaranisman idearon ĉe esperantistoj?

Bedaŭrinde, la respondo al la supre metitaj demandoj estas jesa. Jes, povas esti kaj estis "esperantistaj nazioj" kaj "esperantistaj stalinistoj", kiuj perfidis kaj pereigis nekonformiĝemajn sammovadanojn. Esperantistoj, same kiel anoj de ajna alia nacio, denuncadis unu la alian – ĉu por "savi la propran haŭton", ĉu pro karieristaj celoj, ĉu pro malracia alkroĉiĝemo al "historia eksperimento" en nekonata, sed (aŭ ĉu ĝuste tial?) admirata lando. En nia kara "lingvo de paco kaj amikeco" eblas verki plej malamajn, mortminacajn leterojn (ekzemplon vidu sur p. 423 de la libro). Zamenhof tremus, vidinte alvokojn "al glavo, sangon soifanta" – en lia lingvo, kreita por alporti "sanktan harmonion"!

La famo de *La danĝera lingvo* jam estas tiom granda, tiom multaj recenzoj jam priskribis ĝian enhavon, ke mi dubas ĉu necesas memorigi, ke en la libro temas pri persekutoj en nazia Germanio kaj stalina Sovetio. Ne nur. La unua ĉapitro prezentas la unuajn, jam ne senbarajn paŝojn de la junaj lingvo kaj movado – de krudaj malpermesoj de la carismo al rafinitaj metodoj de francaj ŝovinistoj, kaŝe subvenciantaj Idon. La tria ĉapitro priskribas persekutojn en orienta Azio (Ĉinio, Japanio, Koreio kaj Tajvano). La faktaro estas abundega. La konsultitaj fontoj impresas. La fontoj estas ne nur Esperantaj, sed multlingvaj, foje ne tiom vaste konataj. Komencante, kiel kutime, legi libron el indekso kaj piednotoj, mi ĝojis vidi inter la konsultitaj aŭtoroj la nomojn de Ivan Dzjuba, Volodymyr Sosjura, Mykola Skrypnyk, Aleksandr Solĵenicyn, Lev Kopelev – tio tuj atestis pri la kompetenteco de la aŭtoro kiel sovetiologo. La trankvila senemocia tono kreas fidon pri senpartieco, tiom necesa en ekzemple priskribo de la konflikto inter SAT-SEU-IPE. Krom tio, la aŭtoro



Simbolo de la epoko:
La dua eldono de* LA DANĜERA LINGVO *aperis antaŭ kelkaj monatoj ĉe la sovetia fremdlingva eldonejo Progreso.

prezentas argumentojn de la kontraŭuloj – ĉar kontraŭuloj ja foje havas ne nur antaŭjuĝojn kaj "malvastan horizonton", kiel ni preferas pensi, sed ankaŭ ion por diri, ekz. M. Skrypnyk (ukraina popolkomisaro pri klerigo), protestanta ne kontraŭ Esperanto, sed kontraŭ lantia sennaciismo kaj ĝia interpreto de la rolo de Esperanto.

Kompreneble, la libro ne estas kompleta, kaj ne povis esti tia. Mi supozas, ke nun s-ro Lins travivas feliĉajn tagojn por historiisto. Ĉu jam la "stela horo" – mi dubas, ĉar arkivoj de sekurecservoj (ĉefe riĉa KGB-arkivo) daŭre restas fermitaj. Tamen la kapturnaj ŝanĝoj en la tuta orienta Eŭropo malfermas aliron al novaj fontoj, ekzemple la esplorista laboro de NikSt el Sovetio grave kontribuas al pluaj studoj pri la historioj de SEU kaj SAT (vidu *Sennaciulo*, februaro 1990). Kaj sendube, seriozaj historistudantoj en ĉiu lando havas ion por aldoni, kaj tiel per komunaj serĉoj plikompletigi la bazan verkon de Ulrich Lins. Ĉar, malgraŭ tiu neevitebla nekompleteco, ĝi estas baza libro por konsulti kaj lerni. Mi decidis rezisti la tenton paroli pri detaloj,

"Ne sufiĉas serĉi kialojn de malamikeco kontraŭ esperantistoj nur ekstere, necesas pli kritike rigardi niajn proprajn agojn."

kvankam almenaŭ unu (ĉu preseraron?) mi menciu: la pogromo kontraŭ la ukraina inteligencio, kaŝita sub falsaĵo de NKVD, okazis en 1930, ne 1920. Mi aŭdacu aliri demandon ege komplikan: Surbaze de la prezentitaj faktoj, kiajn konkludojn ni tiru el nia centjara historio?

Kutima eldiro pri "lecionoj de la historio" ja estas vaste konata: la historio instruas nenion. Kaj instrui ne povas, ĉar kondiĉoj kaj protagonistoj ĉiam alias. Fari vastajn komparojn mi ne povas, sed almenaŭ pri Sovetio mi havas kapturnan senton, ke "jen, ripetiĝas la dudekaj jaroj". Tiun senton plifirmigas la fakto, ke reaperis SEU, proklaminta sin heredanto de la antaŭmilita E-organizaĵo. Tamen, la tempoj ŝanĝiĝis kaj SEU nun aspektas anakronismo, elvokanta dubon pri sia longa vivo. La malcentrigaj tendencoj nun fortas ĉie tra Sovetio, kaj la nocio "centro decidas – periferioj plenumu" ne plu estas akceptata. Kial do parto de la gvidaj sovetiaj esperantistoj tiom kroĉas sin al malnova (kaj neefika) strukturo? Informas *Ukrainia esperantisto* (decembro 1989) pri la nefunkciado de SEU-2: "Evidentiĝis ke nun neniu respublika E-organizaĵo oficiale al SEU aliĝis, kvankam ankaŭ neniu, krom ĉebaltaj, oficiale informis SEU pri apartiĝo." Fakte, ĉebaltaj respublikoj nenion bezonis deklari; ja ili neniam estis membroj de SEU.

La vivo remetas la samajn problemojn en novajn cirkonstancojn. La bildon de la dudekaj jaroj elvokas ankaŭ nunaj prilingvaj debatoj en

Suposteno

ORGANO DE IPE kaj SEU

№ 4 (141) — 1933 —

IPE — LA SOLA KLASBATALA INTERNACIA ORGANIZO DE PROLETAJ ESPERANTISTOJ

KONTRAŬ MANOVROJ DE SOCIALFAŜISTAJ GVIDANTOJ

Dividitaj fratoj: akuzoj pri "socialfaŝismo" en la revuo de ortodoksuloj . . .

Sovetio kaj ekz. nova programo de ukrainigo en Ukrainio. Dmytro Pavlyĉko, la ĉefo de la Societo Taras Ŝevĉenko pri la ukraina lingvo, deputito de la Supera Soveto de USSR, pledanta por egalrajteco de lingvoj en Sovetio, jen Skrypnyk de la 90-aj jaroj. Li defendas la bazan rajton de ĉiu popolo je propra lingvo per "prinaciecaj principoj de Lenin". "Ĉu Esperantigo aŭ ukrainigo" – la demando, starigita de Skrypnyk en 1930, validas ankaŭ en 1990. Ĉu ni atendu novan vortbatalon inter konsciaj etnistoj kaj sennaciistoj, malĝojigitaj pri la fakto ke naciaj lingvoj en Sovetio ne pereis kaj "kunfandiĝo" ne okazis? (Kiel tipan pensmanieron de nuntempa lantiano vidu leterojn de s-ro Deker en *Laŭte!*)

La danĝera lingvo donas bonegan analizon de la mitokreado pri "la lando de sovetoj" kaj de la aktiva partopreno de esperantistoj (konscia aŭ ne) en estiĝo de la mitoj. Jen amara leciono (kaj averto por kreantoj de novaj mitoj, kiuj ne volas aŭdi pri murdoj en Tbilisi, terura indiferento al la sorto de la viktimoj de Ĉernobil, ĉar "estas ja Gorbaĉov", "Gorbaĉov mem diras . . ."). Kaj iom da malvarma akvo sur la kapon por tiuj kiuj, ne farinte profundan analizon de la esperantista movado, pretas aserti ke esperantistoj estas nur "progresemuloj" kaj ĉiam servis bonon kaj progreson. La bona lingvo Esperanto povas esti uzata por plej malindaj celoj. Kaj esperantistoj, lerte manipulitaj per ideologi-akrobatoj, helpis krei mitojn pri feliĉa vivo en Sovetio en jaroj, kiam milionoj da kamparanoj mortis pro artefarita malsato aŭ sklave laboris en punlaborejoj. (Komprenu min bone: mi ne dubas pri la bonkoreco de multaj alilandaj esperantistoj, pensantaj ke ili "faras bonon" – sed kiel nepino de ukrainaj kamparanoj, kiuj ŝvelis pro la malsato en 1933, mi ne povas trankvile legi huraleterojn el tiu periodo.) Lanti, aktive partopreninte en tiu komuna mitokreado, post konatiĝo kun la sovetia realo sentis naŭzon kaj kuraĝe diris la veron. Anatemo sekvis.

Tre grava tasko staras antaŭ ni: konsciiĝi, ke ne sufiĉas serĉi kialojn de malamikeco kontraŭ esperantistoj nur *ekstere*, necesas pli kritike rigardi niajn proprajn agojn. Nur farinte tiun purigan laboron, ni komprenos ke malamika (aŭ skeptika) sinteno povas havi realan bazon, ne nepre antaŭjuĝan. Legante la libron de U. Lins mi konstante sentis, ke iu granda parto de la sovetiaj esperantistoj restis ekster la libro. Kaj aliel ne povis esti. Ja ĝi estas libro pri la oficiala movado, kaj bazas sin sur ties dokumentoj. Legante pri la komence entuziasma korespondado kaj ĝia sukceso (ĉu nomi tion sukceso?), mi provis identigi min kun iu kritike pensanta laboristo/kamparano/intelektulo, leganta en murgazeto admirleterojn de okcidentanoj kaj vidanta ke tio estas ricevita "per Esperanto, dank' al esperantistoj". Same – imagi kritike pensantan okcidentanon (japanon k.a.), kies amiko montras al li multvortan

glorigaĉon de Stalin kaj Stalinio – "jen, ni korespondas en Esperanto". Kion pensis, kion sentis tiu homo pensanta? Kiom da tiaj kritike pensantaj homoj estis? Kia opinio pri esperantistoj povas formiĝi el tiuj ĉi faktoj?

Mi jam aŭdas indignajn vortojn, ke mi ne parolas pri persekutoj far instancoj – registaroj, Gestapo, NKVD. Sed ja tion ĉiu estimanta sin esperantisto scias – scias, ke parolantoj de Esperanto "suferis mokadon, persekutadon kaj mortigon". La sentabuigo de la E-historio jam estas farita kaj U. Lins multege faris por tio. La unua varianto de *La danĝera lingvo* aperis en 1973, kaj poste kiel ĉapitro en *Esperanto en perspektivo*. Post la sentabuigo venis tempo de resumoj: kion konkludi el nia historio pri ni mem kaj kiel ni iru antaŭen? Se morgaŭ komenciĝos nova ondo de teroro (mi esperas, ke tio ne okazos), ĉu esperantistoj pretos savi la oficialan movadon ajnapreze? Se morgaŭ en Rusio la potencon akiros "savantoj de l' imperio" – rusaj ŝovinistoj el "Pamjat", kiuj trovis "kulpulojn" de la nuna katastrofa stato de Rusio en la judoj kaj ne kaŝas sian arogan antisemitismon – kia sorto atendos la lingvon de la judo Zamenhof? Ĉu nia fido pri tio, ke la homaro ja bezonas Esperanton (do, pri ĝia neevitebla rekono – mi preskaŭ elvokis la idolon de la "senidola" Lanti, nome "la historian procezon", kies leĝojn sennaciistoj pretendas perfekte kompreni), estas tiom malforta, ke la malpermeso de oficiala landa asocio estas tuj rigardata kiel "la fino de ĉio"? Kaj ke tial necesas nepre savi ĝin, eĉ je kosto de ideologia zigzagumado, rampado antaŭ potenculoj, perdo de homa digno?

Konformismo kaj servutemo – kiom profunde ili enradikiĝis en la psikon de esperantistoj? Tre plaĉe estus pensi pri ni kiel pri homoj irantaj "rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante". Sed jen amiko sendis numerojn de *Konkordo* (gazeto de kaj por invalidoj, aperanta en Latvio) kun jenaj konsiloj de "prudenta esperantisto" (aprilo 1989): *"Mi volus doni al vi konsilon, ke vi ne tre politikigu vian bultenon, ja tempoj povas ŝanĝiĝi kaj oni vin punos, sed plej ĉefa estas, ke vi povas fari malbonon por la tuta landa E-movado. Ja ĉiam Esperanto estis neŭtrala komunika rimedo kaj ne decas miksi ĝin kun politiko . . . Ŝajnas, ke multaj ektimos aboni viajn eldonaĵojn pro la anekdotoj . . . Ĉu vi ne scias, kiel malhelpis siatempe (antaŭ du jaroj) Kauts en Litovio per siaj leteroj al CK KPSU? Ja en CK oni rigardas atente pri la E-movado kaj la agoj de iuj apartaj esperantistoj kun iliaj bultenoj . . . Ne decas vane delogi sin per nova situ[aci]o en la lando; por fari pli bone al E-o, necesas tre saĝe kaj atenteme agi . . ."* Mi ege esperas, ke la tridekaj jaroj ne ripetiĝos, ke sovetiaj esperantistoj, kiuj nun kuraĝe eldiras siajn opiniojn, ne iros en rekonstruitan Gulagon, kaj ke ni ne devos kampanji por ilia liberigo. Sed pensi pri ni mem necesas jam nun.

. . . kaj klarvidaj denuncoj de la stalinismo flanke de Lanti kaj lia "sendependa revuo por batalado kontraŭ ĉiujn dogmojn."



Esperanto ja estas danĝera lingvo. Danĝera, ĉar ĝi ebligas novan tipon de rilatoj inter diversnacianoj, ankaŭ ene de la sama ŝtato. La psikologian flankon de tiu fenomeno bonege klarigis C. Piron en sia *La bona lingvo*. Potenculoj ne ŝatas Esperanton, ĉar ĝi ebligas kontaktojn inter diversnacianoj: kontaktojn, kiujn la ŝtato ne povas kontroli kaj aranĝi laŭ siaj plaĉoj kaj bezonoj. Tial fine de la libro U. Lins konstatas: *". . . malgraŭ ĉiuj lipaj deklaroj favore al internacia solidareco ili volas plue mem decidi pri la formoj, en kiuj iliaj civitanoj flegu la transliman kontakton."* Esperanto estas danĝera por la regantoj de multnacia ŝtato kiel Sovetio, celantaj trudi la rusan lingvon kiel oficialan ŝtatan lingvon ĝuste nun, kiam komenciĝis malkoloniiga procedo. En totalisma ŝtato ĝi estas duoble danĝera por esperantistoj: jen instancoj unuflanke, jen judasaj "samideanoj" aliflanke.

La libro de U. Lins ne nutras iluziojn. Kaj tio estas ĝia granda merito. Ĝi diras: rigardu, kiaj vi estas (kaj memoru la moton al *La revizoro**), kaj kiel vi agis en diversaj cirkonstancoj. Fieru pri fierindaĵoj (ili estas multaj) kaj hontu pri hontindaĵoj (same multaj). Tio estas *nia* historio. Lernu ĝin, travivu ĝin (se vi kapablas senti komunuman pasintecon), akceptu ĝin sen plibeligoj kaj prisilentoj. Kaj ne forlasu la esperon. Nek Esperanton. Tiun danĝeran bonan lingvon.

Olga Kerzjuk (Britio)

P.S. Nur unu detalo ĝenis min dum legado de *La danĝera lingvo*. Mi mem parolas pri "sovetiaj laboristoj", "sovetia E-movado", ne "soveta", kiel elektis s-ro Lins, sed bedaŭrinde ne klarigis la motivojn de tiu elekto.

*En la traduko de Zamenhof tiu tekstas: "Ne riproĉu spegulon, se ĝi montras nigrulon." *–red.*

Regiona agado:

Por plua esploro en Azio

Kun la celo labori por evoluigo de la Esperanta movado en Azio, pasintjare mi realigis tiel nomatan esplorvojaĝon tra Azio. Tiam mi laboris en dek aziaj landoj – la raportojn vi povis legi en Esperantaj gazetoj. Fakte, tio estis la komenco de la laboro nun daŭrigata kaj daŭrigota.

En la pasinta jaro multaj aziaj geesperantistoj helpis min (precipe en Israelo, Turkio, Pakistano, Bharato, Nepalo, Tajlando kaj Vjetnamio). Konscie mi konfesas, ke sen tiu helpo mi estus farinta ne tiom multe. Koran dankon al ili ĉiuj.

De septembro 1990 mi daŭrigos la esplorvojaĝon. Jen la planata vojo, laŭvice: Sovetunio, Mongolio, Pekino, Japanio, Koreio (suda), Ĉinio, Honkongo, Tajvano, Filipinoj, Vjetnamio, Tajlando.

Kion mi volas fari? Fakte, saman laboron, kiun mi faris ĝis nun, do:

- **esplori** (ekscii detale) ĉion, kio koncernas la Esperantan movadon en viaj klubo, asocio;
- **dokumenti** (mi skribas, fotas, filmas);
- **raporti** (al Esperantaj gazetoj kaj radiostacioj) pri la loka movado;
- **prelegi** pri Esperanto, la bezono por ĝi kaj ĝia utiligeblo;
- **instrui** Esperanton en kursoj por komencantoj kaj progresantoj (tamen ne ĉie tio estos ebla);
- **aliajn** aferojn (laŭbezone), celante evoluigon de la loka E-movado.

Por efike realigi tiun planon, mi nepre bezonos kunlaboron de precipe aziaj gesamideanoj – ĉu vi volas? Se jes, skribu al mi. Mi atendas viajn proponojn, demandojn. Mi konsideros viajn konsilojn kaj kritikojn.

Cetere, se interesas vin la Esperanta movado en Azio, ne forgesu, ke la raporto *Esperanto en Azio* estas mendebla ĉe mi.

Joachim Werdin
Pionierów 6 A 9, PL-47-220
Kędzierzyn-Koźle, Pollando

Ŝanĝo de la vivo

Mia vivo ĝis mia veno en Pollandon estis tre normala kaj eĉ enuiga de tempo al tempo. Mia ekkono de Esperanto tre ŝanĝis ĝin.

Joachim Werdin estis en Malajzio, mia naskiĝlando, fine de aprilo 1989 kaj instruis al proksimume 30 personoj. Mi lernis dum nur 10 lecionoj el la 17, ĉar mi kun aliaj 7 personoj komencis lerni malfrue. Post lia forveturo mi kun alia esperantistino konstatis, ke ni mem devas daŭrigi la lernadon. Ni interkonsentis telefoni Esperante ĉiutage. Ni ankaŭ renkontiĝis ĉiusemajne por diskuti pri la neinstruitaj lecionoj. Ni same opiniis, ke, se oni eklernas ion novan, oni devas daŭrigi la lernadon.

Kiam Joachim Werdin venis duafoje en Malajzion, en oktobro, li invitis min al la naskiĝlando de nia lingvo. Tiam mi estis senlabora, do mi kaptis la okazon plibonigi mian lingvoscion. Tiam mi ne konsciis, ke tiu vojaĝo povas doni al mi multege da spertoj kaj ŝanĝi mian opinion pri Esperanto, lingvaj problemoj kaj mian vivon. Mi ne estas lingve kapabla. Eklernonte Esperanton mi parolis en tri kaj skribis en du lingvoj.

Senpacience mi atendis mian venon en Pollandon. Amuze, mi ege volis vidi neĝon, ĉar en mia lando ĉiam estas suno kaj oni neniam povas vidi neĝon. Kompreneble, mi volis komenci mian Esperantan vivon.

Post mia veno ni iris al Radio Polonia por intervjuo. Tio estis tute nova sperto por la tre ordinara persono. Mi komencis mian pluan, ĉiutagan studadon pri Esperanto. Joachim instruis pri la Fundamento de Esperanto, la komplikaj gramatikaj reguloj, atentigis min pri la prononcado kaj akcentado. Tiam mi ne bone parolis. Li diris, ke mi devas pensi Esperante. Komence mi pensis angle, sed nun ne plu.



Ĝeniferino instruanta Esperanton en Kenĝeĵeno.

Krome, mi ankaŭ laboris, precipe prelegis kun lumbildoj pri Malajzio. Mia lando estas tute nekonata en Pollando; tie oni diras nur, ke ĝi estas ekzotika lando. Ankaŭ tio estis nova sperto en mia ordinara vivo. Kiel komencanto, mi faris multe da gramatikaj eraroj. Mi prelegis en dek urboj de Pollando.

Danke al invito de la direktoro de Esperantotur, Andrzej Grzębowski, mi povis pasigi pli ol du semajnojn en Bidgoŝto [Bydgoszcz] kaj lerni en internacia kurso por vojaĝgvidantoj. Tiam estis okazanta ankaŭ la aranĝo Tagoj de Bydgoszcz. Estis tre agrable, tiom pli ke la aranĝoj estis la unuaj tiuspecaj en mia vivo. Mi renkontis multajn homojn el Usono, Litovio, Sovetunio, Bulgario, Hungario, Suda Koreio kaj Pollando – ni amikiĝis. Mi vere miris, ke homoj el diversaj landoj tiom facile komprenas unu la alian parolante unu lingvon.

Mia restado en Pollando konstatigis min, ke mi devas lerni mian gepatran lingvon, la ĉinan. Kvankam mi estas ĉinino naskiĝinta en Malajzio, mi tamen ne lernis la ĉinan lingvon, ĉar estas malmultaj lernejoj kie tio estas ebla. Nun mi hontas pro mia analfabeteco en la ĉina lingvo. Zamenhofo diris, ke Esperanto ne anstataŭas la gepatrajn lingvojn sed funkcias kiel dua, helpa lingvo. Mi parolas ĉinan dialekton, la malajan lingvon kaj la anglan, sed mi povas skribi kaj legi nur malaje kaj angle.

En Kenĝeĵeno [Kędzierzyn] mi prove instruis Esperanton al komencantoj. Ankaŭ tio estis nova sperto (mi sentis, ke mi ne bone esprimadas min).

Mi ĝuis mian trimonatan restadon en Pollando, travivis multon kaj nun mi estas pli saĝa. Mi neniam sonĝis, ke iu lingvo povas ŝanĝi mian pensmanieron. Mi iĝis pli kuraĝa por paroli publike.

Reveninte en Malajzion, mi ne havas iun planon pri diskonigo de Esperanto en la lando (tio eble senrevigos bonajn esperantistojn) aŭ pri ĝia instruado. Mi nun vivas de tago al tago. Sed per la lingvo mi multe lernis, kaj mi nepre daŭrigos la studadon.

Chan Sook Wai [Ĝeniferino]
(Malajzio)

Vizito = apliko

Ĝenerale, ŝanco apliki Esperanton mankas al esperantistoj en disvolviĝantaj landoj. Pro la malalta laborenspezo ili ne povas partopreni la UK-on, ne povas ĝui internaciajn renkontiĝojn, entute ne povas vojaĝi eksterlande. Plejparte ili neniam kontaktas alilandan esperantiston. Tio signifas, ke la ĉefa celo de nia lingvo neniam realiĝas por ili. Ne sciante, kiam ili uzos la lingvon, multaj homoj perdas la fidon kaj intereson al Esperanto. En superaj lernejoj en la urbo Urumĉi (Ĉinio), oni okazigis kvin kursojn, en kiuj lernis pli ol 200 studentoj. Sed nun restas nur 3 studentoj laborantaj je Esperanto.

Nature, oni povas paroli Esperante kun samlandanoj, sed tio ne montras la sencon de Esperanto; kaj oni povas korespondi kun eksterlandaj samideanoj, sed por nemalmultaj homoj la afranko estas multekosta. Ekzemple en Vjetnamio poŝtmarko de letero al alia lando kostas 15-onon de la meza monata salajro.

Por tiuj esperantistoj, la vizito de alilanda samideano estas unika ŝanco uzi la lingvon. Ili ĝuas grandan plezuron pro la lingva praktiko. Bedaŭrinde, multaj esperantistoj ne volas viziti la lokajn esperantistojn estante alilande. Ĉar ili jam multe spertis Esperantujon, tia simpla kontakto jam ne emociigas ilin, ne logas ilin, ne interesas ilin. Tia afero signifas por ili nur ekstran ŝarĝon, kiu malpliigas ilian tempon turisman kaj ripozan. Eĉ oficisto de UEA konfesis, ke li ne volis serĉi esperantistojn lokajn kiam li troviĝis ferie en Delhio, Hinda Unio. Li "fuĝis de ili", ĉar li "volis iom ripozi ekster la movado kaj iom eĉ for de la lingvo".

Sed ni devas ĝuste taksi tian kontakton inter eksterlanda esperantisto kaj loka samideano. Ĝia utilo estas neignorebla. La ĝojo kaj plezuro produktita de la lingva praktikado vekas homan intereson kaj entuziasmon al la movado, kaj stimulas altigi la lingvonivelon. Samtempe, vidinte, ke nia lingvo estas utila, pli multaj homoj eklernas Esperanton, dum lokaj samideanoj povas forigi la dubon kaj nefidon de neesperantistoj, kiuj opinias nian lingvon senvalora.

Estu klare, ke vizito de la alilanda esperantisto ne estas almozo al la loka samideano, sed kontribuo al la Esperanto-movado kiel tuto.

Liu Xiaozhe (Ĉinio)

Nova voĉo el Vjetnamio

Ĝuste en la unua jaro de la jardeko, la Vjetnama Ilustrita Revuo *Vjetnamio* (VIR) oficiale aperigas sian unuan numeron en la internacia lingvo Esperanto (kvarfoje jare), kun la deziro kontribui al la disvolviĝo de la Esperanto-movado enlande same kiel eksterlande. Kaj ni esperas ankaŭ pere de Esperanto helpi niajn karajn alilandajn legantojn iagrade konatiĝi kun nia lando kaj la vjetnama homo.

VIR estas unika revuo en nuntempa Vjetnamio, kiu per siaj artikoloj, akompanataj de nigraj aŭ koloraj fotoj, prezentas ĉiujn aktivaĵojn pri la defendo kaj konstruado de la lando, ĵus elirinta el plurjara akrega rezistmilito kaj nuntempe urĝe serĉanta rimedojn por paco, amikeco kaj kunlaboro.

VIR eldonis sian unuan numeron ĉirkaŭ oktobro 1954, kaj ĝis marto 1990 jam aperis 375 numeroj. Ĝis nun VIR uzas 10 lingvojn, inter kiuj troviĝas la vjetnama, angla, franca, rusa, hispana, germana, laosa, kmera, ĉina kaj nun ankaŭ Esperanto.

Ni estas ĉiam pretaj korespondi kun niaj legantoj pri diversaj temoj, celante prezenti Vjetnamion al la tuta mondo. Bonvolu sendi al ni leteron kaj dokumenton laŭ la malsupraj adresoj.

Nia unua VIR portas la numeron 1/1990 (ISSN 0868-2682). Ĝia kovrilpaĝo prezentas junan kamparaninon el la delto de "Ruĝa" Riverego de Nord-Vjetnamio, samtempe elstaran flugpilkistinon. En la internaj paĝoj de la revuo vi povas ekscii pri pluraj temoj, ekzemple pri edukado en Vjetnamio, kamparana vivo, eksporto-varoj, tradiciaj boksartoj, malnovaj edzecaj moroj, artoj, aktivadoj en kunlaboro kaj amikeco interpopolaj.

VIR arde deziras, ke niaj legantoj en- kaj eksterlandaj malavare subtenu tiun Esperantan revuon de Vjetnamio, konigante ĝin al siaj geamikoj, varbante pli da legantoj kaj donante siajn opiniojn pri la formo, la enhavo kaj la stilo de la revuo.

D-ro Lê Nhiem
3 Nguyen Tat Thanh, Q4
Ho Chi Minh-urbo, Vjetnamio

Ĉefredaktejo: *Báo Ánh Viêtnam (La Vjetnama Ilustrita Revuo), 79 Ly Thuong Kiêt, Hanoi.*
Redaktejo: *120 Xôviêt Nghêtinh, TP Hô Chi Minh.*
Abonpetojn *sendu al la ĉef-distribuanto: 207 Nguyên vãn Cu, TP Hô Chi Minh.*
Prezo de 1 ekzemplero kun sendokosto US$2, jarabono US$7 aŭ egalvaloro. Rabaton oni aplikas tiel, kiel ĉe la Libroservo de UEA.

Landa agado:

Pri disvastigo kaj memstariĝo en Togolando

Okpersona delegacio el najbara Benino internaciigis la kongreson.

De la 27-a ĝis la 30-a de marto 1990 okazis en la protestanta kolegio de Aneho la unua kongreso de Esperanto en Togolando. Partoprenis entute 123 esperantistoj, inkluzive de ok beninanoj, reprezentante dek diversajn Esperanto-klubojn. Ne eblas tro emfazi la signifon de tiu nova paŝo en la disvolviĝo de la togolanda movado. Unuafoje, dank' al subvencio de UEA, la plimulto el la landaj aktivuloj povis kunsidi por interkonatiĝi kaj ellabori komunan strategion.

Ankaŭ la gvidaj instancoj de la lando estis sentemaj pri la unikeco de tiu okazo. Ĉe la inaŭguro, en la urbodomo de Aneho, parolis s-ro Dzedikou, prezidanto de la landa federacio de Unesko-kluboj, kaj la vicprefekto de la regiono, s-ro Ayite. Tiu ĉi estis aparte impresita de la disvolviĝo de la movado kaj ĝia kontribuo al la klerigo de la afrika junularo. La prezidanto de Unuiĝo Togolanda por Esperanto, s-ro Agbemadon, koncize prezentis la historion de Esperanto en Togolando, kaj kvar kluboj kontribuis al la aranĝo per kantado.

La ĉefa programo konsistis el laborkunsidoj kaj progresiga kurso. La kongreso samtempe markis la finon de trijara estrarperiodo en UTE, kaj la demisianta estraro raportis pri siaj atingoj kaj problemoj. Tri laborgrupoj pristudis apartajn organizajn demandojn: pri la rapida disvastigo de Esperanto en Togolando, pri adapto de Esperanto al la togolanda kulturo, kaj pri la kvinjara agadplano de UTE. Aldoniĝis kvara grupo, kiu sendis mesaĝojn al la ŝtatestro Eyadema kaj al la loĝantoj de Aneho. Ĉiuj kluboj havis ŝancon raporti pri sia agado kadre de aparta kunsido, kie evidentiĝis komunaj problemoj de mono kaj komunikado.

Komence de la tria tago, la ĝenerala sekretario de UTE, s-ro Gbeglo, prelegis pri la ĝenerala evoluo de la afrika Esperanto-movado, tuŝante interalie la temojn memstariĝo, centrigo de la agado, korespondado kaj delegitiĝo en UEA. Poste la laborgrupoj raportis pri siaj diskutoj, eldonotaj en aparta kajero pri la kongreso. La beninaj gastoj, sub la prezido de s-ro Tchikpe, bonvolis kontroli la voĉdonon por nova 11-kapa estraro de UTE; kvankam nur tri postenoj estis kontestataj, la balotado tiom glutis la tempon, ke ne povis okazi la planita kultura vespero. Mallonga kongresa balo kun kasedmuziko tamen plezurigis la kongresanojn.

Origine oni planis, ke la kongresanoj partoprenu en la loka rearbariga programo matene de la lasta tago. Pro manko de pluvo, ili anstataŭe dediĉis sin al la purigo kaj ordigo de la distrikta prefektejo. Sendube ankaŭ tio kontribuis al la favora impreso, kiun ili postlasis ĉe la lokaj aŭtoritatoj.

Sendube valoris tiu granda investo de tempo kaj aliaj rimedoj, precipe pro la stimulo kiun la kongreso donis al la partoprenintoj. Kreskis la memfido kaj la ambicio. Resume konstatis unu el la laborgrupoj: "Tiu ĉi unua kongreso ŝajnas nur regiona, ĉar ne venis togolandanoj el multaj aliaj regionoj de la lando. Tial UTE aranĝos duan kongreson, kaj tiam ĝi estu tutlanda, vere nacia, ĝin partoprenu esperantistoj el ĉiuj anguloj de la lando. Necesas, ke UTE klopodu esperantistigi la tutan landon, antaŭ ol pensi pri la organizado de la dua kongreso."

el la raporto de Gbeglo Koffi

Vidu okcidentan Afrikon deproksime!



En Lomé, la ĉefurbo de Togolando, lanĉiĝos la Unua Afrika Kongreseto en decembro 1990. Ties programo estas nun iom ŝanĝita. La kongreseton gastigos Unuiĝo Togolanda por Esperanto, kaj poste la najbarlandaj Esperanto-asocioj bonvenigos ekskursantojn:

dec. 27	Flugo Parizo-Lomé
dec. 28-jan. 2	Kongresa programo, Lomé
jan. 2-10	Ekskursvojaĝo per aŭtobuso (eble ankaŭ per ŝipo) tra Benino, eble Niĝerio, Ganao, ĝis Ebura Bordo
jan. 11	Reflugo Abidjan-Parizo

La prezo por tiu malpli longa programo estas 3500 gld., sen manĝoj. Se vi volas alveni pli frue, ni klopodos oferti ion konvenan al vi. Jam el diversaj eŭropaj landoj venis sinanoncoj; nepre sciigu al la CO, se ankaŭ vi volas partopreni!

Faka agado:

Kiel verdigi la verdulojn?

Atentaj legantoj de Esperanto *kaj kelkaj aliaj revuoj eksciis fine de 1989, ke la franca verdula partio* Les Verts *akceptis rezolucion favore al la uzo de Esperanto en siaj rilatoj kun aliaj landoj. Esperantisto Emilo Mas estis unu el la pledantoj por tiu decido. En aprilo 1990 li vojaĝis al kunsido de la Eŭropaj Verduloj en Budapeŝto, kaj jen resumo de lia raporto.*

Mi gastis en la oficejo de Fondaĵo Talento, kies estro, András Lukács, sukcesis krei en elementa lernejo eksperimentan klason kie la infanoj lernas nur en Esperanto! Multaj eksterlandaj samideanoj venas por helpi dum unu aŭ pluraj semajnoj. Tiuj infanoj, meze 8-jaraj, jam atingis altan nivelon en la lingvo.

La kunordigan kunsidon de la Eŭropaj Verduloj ĉeestis 45 personoj. Dek naŭ estis delegitoj el la aliĝintaj verdaj partioj, pluraj aliaj estis observantoj el aliaj verdaj partioj, kaj la ceteraj, kiel mi, estis akompanantoj. Ĉiu povis doni sian opinion, sed kompreneble, nur la membroj rajtis voĉdoni.

Vendredon la 17-an okazis interkona vespero. La du lingvoj proponitaj estis la franca kaj la angla, sed nur la rusino (el Leningrad) kaj la rumano sin prezentis france. Mi prezentis min Esperante, sed nun mi opinias, ke mi eraris. En tiu nekonata medio, estus preferinde paroli france, eĉ ne paroli en la komenco pri Esperanto, kaj atendi pli favoran momenton. Poste alvenis kelkaj pliaj esperantistoj: la delegitoj el Irlando (s-ino Máire Mullarney), Katalunio (s-ro Pinero i Costa), Bulgario, kaj Pollando (komencanto, kiu nur je la fino malkaŝis sian esperantistecon!).

Dum la debatoj mi konstatis, ke preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj komprenas la anglan lingvon. Nur la rusino, la rumanoj, la francoj kaj kelkfoje la belgoj sin esprimis france; kaj ni estis nur 2 aŭ 3, kiuj aŭskultis la samtempan francan interpretadon kiam aliaj parolis angle. Mi opinias, ke ĉiu, kiu sufiĉe regas la anglan, volas tion pruvi publike, ĉar plivalorigan. La klopodoj akceptigi Esperanton kiel unu el la oficialaj lingvoj okaze de la internaciaj kongresoj de la verduloj estos pli malfacilaj ol mi supozis. Des pli gravas nun komenci tiujn klopodojn.

La venonta kongreso de la Eŭropaj Verduloj okazos en Svisio, la 25-an kaj 26-an de majo 1991. Mi longe dialogis kun la svisa delegito. Li diris al mi, ke estas nur du aŭ tri esperantistoj inter la svisaj ekologiistoj. La organizantoj de la kongreso do elektis ses oficialajn lingvojn: la anglan, francan, germanan, hispanan, italan kaj rusan. La svisoj opinias, ke ĉiu orientlandano scipovas la rusan lingvon, ĉar ĝi estis trude instruata en tiuj landoj. Sed laŭ mia gastiganto, kiu studis dum kvin jaroj en Sovetio, nur kelkaj miloj da studentoj ĝuas tiun privilegion. Se do el ĉiuj landoj multaj samideanoj, kiuj almenaŭ iom interesiĝas pri ekologio kaj vere pretus partopreni en la venonta verdula kongreso, tuj petus de la organizantoj informojn, indikante ke la uzo de Esperanto influos ilian decidon ĉu veni aŭ ne – tio laŭ mi povus influi la organizantojn elekti Esperanton kiel unu el la oficialaj lingvoj.

Pro manko de mono, multaj kiuj ŝatus partopreni en tiu kongreso certe ne povos. Ĉu ni do ne lanĉu specialan monkolektadon, por pagi la vojaĝkostojn al du aŭ tri gajnintoj de konkurso pri ekologio, homrajtoj ktp?

Emilo Mas
38, rue Jean Moulin
F-33221 Ste. Foy La Grande,
Francio

Adreso de la kongreso de la Eŭropaj Verduloj en 1991: Parti Ecologiste Suisse, Postfach 6415, CH-3001 Bern, Svisio.



Desegnis Florence Ribadière

Lingvo de la tutmondismo

Okaze de la "Unuaj Kunsidoj de la Tutmondismo" en Tours, Francio, Esperanto estis unu el la kvar oficialaj lingvoj, kun la angla, franca kaj hispana. Ĉirkaŭ 800 homoj el 25 landoj partoprenis en la kvar tagoj de debatoj kaj diskutoj, de la 24-a ĝis la 28-a de aprilo, pri la temoj paco, disvolviĝo, ekologio, kaj monda demokratio.

Inter la prelegantoj estis pluraj esperantistoj – el Francio, FR Germanio, Litovio, Bulgario kaj Rumanio – kaj plej grave, la plej agemaj inter la organizantoj estis ĝuste la lokaj E-movadanoj. Per la prelegoj, la samtempa tradukado (precipe prizorgata de s-ino Martine Schneller) kaj la partopreno de diverslandaj esperantistoj, ĉiuj ĉeestantoj povis senpere konstati la efikan funkciadon de la lingvo. D-ro André Albault, la prezidanto de la Akademio, prelegdebatis pri Esperanto, kaj la budo "Ekologio kaj Esperanto" ricevis multajn vizitantojn.

La 29-an de aprilo, la membroj kaj reprezentantoj de la partoprenintaj asocioj – mondfederistoj, verduloj kaj aliaj – akceptis jenan tre esperantistecan rezolucion:

"La Kunsidoj superis niajn esperojn. Ĉiu el ni venis por informiĝi kaj por klarigi sian manieron praktiki la solidarecon en loka kadro kaj en siaj rilatoj trans la landlimoj. Sed, kunveninte, ni vere ekkonsciis, ke nin ĉiujn subportas la sama elano de transnacia solidareco kaj ke en tio kuŝas nia komuna forto.

"Ni do aspiras al interproksimiĝo, tamen rezignante nek pri la specifeco de niaj apartaj laboroj, nek pri nia ago-libero.

"Konsiderante, ke la civila socio konstruiĝanta estos transnacia kaj informadika, ni donas prioritaton al jenaj du proponoj de komuna agado:

- starigo de konstanta, komuna, interaga informsistemo;
- starigo de reto de transnaciaj rilatoj, kiu kiel eble plej apogiĝos sur la lokaj kolektivoj: ĝi ebligos interhelpon laŭ la bezonoj, dum ĝi lasos integraj niajn respektivajn identecojn."

el raporto de Claude Tellier

Informado 5

Dinamiko

Hodiaŭ aperas la lasta en la artikolserio pri informado.

En la unua, mi admonis: tro ofte aktivuloj havas nur la ambicion konvinki aliajn, ke ili pravas. Sed plej gravas malkovri, kion neesperantistoj bezonas kaj ĉu ni povas kontribui por solvi *ilian* problemon.

En la dua mi klarigis, ke ekzistas metodoj por analizi, kion homoj volas. Necesas atenti, kio kaŝiĝas malantaŭ la vortoj de tiu, kiun ni volas informi.

En la tria mi menciis sep elementojn, kiuj devus esti en harmonio por ke niaj mesaĝoj ricevu atenton.

Sed nia plej akuta problemo estas konservi la entuziasmon ĉe homoj, kiuj ekinteresiĝis pri Esperanto. En la kvara, do, mi proponis vivteni la "konversacion".

Kaj hodiaŭ mi provas prilumi, ke la socio nuntempe tiel rapide evoluas, ke ni konstante devas revizii kaj adapti niajn konsilarojn, plurjarajn laborplanojn ktp.

La Strategia Plano de UEA kondukas nian atenton al la tendencoj en kaj ekster la movado, al niaj fortaj kaj malfortaj punktoj, al niaj eblecoj kaj minacoj. Sed tiuj daŭre ŝanĝiĝas. Por faciligi la komprenon de tiu fenomeno, gvidantoj de entreprenoj kaj de organizaĵoj ofte uzas la ĉi-kunan kurbon por bildigi ĝin.



La vertikala linio montras la rezultojn kaj la horizontala la tempon. Nova produkto aŭ nova servo bezonas relative multe da tempo kaj investoj por akiri malgrandan rezulton. Poste, la rezultoj rapide kreskas kaj la investoj montriĝas profitdonaj. Sed je la apogeo de sukceso jam troviĝas minaco por la estonteco, ĉar ĝin sekvos stagno kaj regreso. Plurfoje jam, kiam mi akiris periodon de sukcesa informado en mia loka aŭ landa asocio, mi plenfide ĝuis la sukceson kaj esperis, ke ĝi daŭros. Nun mi komprenas, ke en periodo de sukcesa kampanjo oni devas streĉe pensi pri nova kampanjo, aŭ pri aldono de nova elemento.

Ĉiu povas por si mem fari tian kurbon kaj taksi, kie situas la propra informa laboro. Gravas fari tion intuicie, sed necesas ankaŭ memkontrolo. Vi klarigu la celon de la kurbo al kelkaj amikoj kaj petu ilin mem fari tian takson. Poste vi komparu viajn impresojn. Se la rezultoj estas malsamaj, tiam vi eldiskutu tion. Se la diskuto ne kondukas al konkludo, vi provu kolekti sufiĉe da cifermaterialo por analizi, kiu pravas.

Ĉar la estrarano kaj oficisto pri informado estas novaj en la nuna UEA, mi taksas, ke ni troviĝas ĉe la bazo de la kurbo. Ni provas stimuli kunlaboron, lanĉas kelkajn ideojn, elspezas tempon kaj energion, sed tio ankoraŭ ne montras mezureblan efikon. La rezultoj evidentiĝos eble nur en la venonta laborjaro kaj espereble fariĝos pli kaj pli grandaj. Sed tiam ni jam devas pensi, kion ni faru por vivteni kaj laŭeble eĉ vivigi tiujn rezultojn.

Ĉi tie provizore finiĝas la artikolserio pri informado. Ni provis orienti vin pri la eblecoj de moderna informado. Nun ni provu traduki tiun teoriumadon en praktikajn aktivaĵojn. Tio eblas nur en kunveno kun aktiva partopreno de agantoj. Tion ni provos fari unue en seminario pri informado en la UK en Havano.

Dinamiko ankaŭ postulas ĉiujaran revizion de nia laborplano. Tion ni faros en la kunsido pri informado. Ni esperas je partopreno de ĉiuj aktivuloj pri informado, kiuj partoprenos la UK.

Ivo Durwael
Estrarano pri Informado

Nekrologo:

Audrey Childs-Mee (1926-1990)

Unu el la plej amataj kaj influaj pedagogoj de la Esperanto-movado mortis pro kancero la 16-an de majo en Kibworth, Leicester (Anglio).

Jam talenta lingvoinstruisto, Audrey C. E. Childs-Mee eklernis Esperanton en 1962 kaj rapide entuziasmiĝis. Post deko da jaroj, en 1973, ŝi translokiĝis kun sia edzo Lawrence Mee al Roterdamo por posteniĝi en la Centra Oficejo de UEA. Dum pluraj jaroj ŝi redaktis la Jarlibron kaj valore kontribuis al la funkciado de la oficejo. Poste ŝi daŭre loĝis en Roterdamo kaj ofte venis por volontule labori.

La instruado de Esperanto okupis pli kaj pli centran lokon en ŝia vivo. La Ĉe-metodon ŝi revivigis kaj adaptis al modernaj kondiĉoj, verkante gravan metodologion (*La baza kurso en Esperanto*, 1978) kaj la furore sukcesan *Saluton! Esperanto aŭtodidakte* (1983), kies kvin eldonoj jam ludas signifan normdonan rolon tra la mondo. En siaj seminarioj por Ĉe-instruistoj, organizitaj kun Internacia Esperanto-Instituto, ŝi insistis pri plej altaj lingvo- kaj instruniveloj. En la lastaj jaroj ŝi ofte vojaĝis, i.a. al Aŭstralio, Pollando, Usono, Francio kaj Bulgario, transdonante sian entuziasmon kaj fakan scion. En 1988 ŝi estis elektita kiel ĝenerala sekretario de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

Inter ŝiaj multaj interesoj troviĝis dum pluraj jaroj Espermensa, movada branĉo de la asocio por altinteligentuloj. Ŝi okupiĝis ankaŭ pri infana literaturo, aŭtorante *La geknaboj de Greziljono* (1981) kaj verkante recenzojn por diversaj revuoj. Ankoraŭ neeldonita estas ŝia traduko de aŭstralia klasikaĵo, *La magia pudingo*.

Audrey Childs-Mee estis unu el niaj plej vervaj kaj valoraj aktivuloj internaciskale. Ne nur ŝiaj multaj amikoj, sed ankaŭ la movado mem, profunde sentas ŝian forpason.

Movadologio:

Kiel ekvilibrigi niajn bezonojn kaj rimedojn?

Pli ol paroli pri la Strategia Plano, gravas apliki ĝin. Tamen, se estas dezirinde ellabori en ĝia kadro memstarajn projektojn – kiel fakte la Plano antaŭvidas – eĉ pli dezirinde estas unue analizi la bazajn movadajn demandojn, kies plibonigo estas antaŭkondiĉo por sukcesa plenumo de kiu ajn projekto.

Nesufiĉo de homaj fortoj kaj de financaj rimedoj: jen ĉiam la du ĉefaj bremsoj de ĉiu idea entrepreno, inkluzive de la nia.

Per kompetento kaj teknologio

El la du demandoj, la pli debatata en nia tendaro estas la homa. Ĉiuj konscias pri la neceso kreskigi la nombron ne nur de la membraro, sed ankaŭ de la aktivularo: nome de tiuj personoj, kiuj pretas honorofice akcepti kaj plenumi taskojn. Pri tio eblas rimarki, ke malgraŭ la ekapero en la nuna epoko de pli favoraj soci-ekonomiaj cirkonstancoj kiel la mallongiĝo de la labortempo kaj la paralela plilongiĝo de la libera tempo (tage, semajne kaj jare), malgraŭ la malkresko de la familiaj dimensioj kaj de la personaj ekonomiaj zorgoj, hodiaŭ la homoj, ne nur la esperantistoj, estas malpli pretaj ol antaŭe volontuli por sociaj servoj. Feliĉe, tiu malkuraĝiga fenomeno estas kompensata, ankaŭ en nia movado, de ĝenerala pli granda kompetenteco, kompare al pli fruaj tempoj, pri organizaj metodoj kaj pri tiucela utiligado de moderna teknologio.

La dua demando estas la ekonomia. Esti malriĉa – kaj tia nia movado fakte estas – signifas esti honesta kaj sendependa. Aliflanke, eĉ restante honestaj kaj sendependaj, nepras pligrandigi la financan bazon de nia laboro. Kiaj estas niaj bezonoj? Kiaj niaj fontoj?

Turni nin eksteren

Kaj niaj bezonoj kaj niaj fontoj havas duoblan karakteron. Grandlinie skizite, ni bezonas monon: 1) por funkciigi nian administran strukturon; 2) por disvastigi Esperanton. Rilate al la enspezaj fontoj, ili estas aŭ eksteraj aŭ internaj.

Nuntempe, ĉiam pli ofte la lokaj Esperanto-societoj ricevas financan subtenon de publikaj instancoj. Bedaŭrinde, ne ĉiuj niaj rondoj kapablas peti subvencion en taŭga maniero, nome prezentante konkretajn kulturajn kaj sociajn agad-projektojn, en kiuj Esperanto rolas kiel rimedo, ne kiel celo: ekz. organizo de eduka simpozio aŭ ekspozicio, eldono de neprofitdona aŭ faka libro, invito al eksterlanda elstara preleganto, porjunularaj iniciatoj ks.

La aŭtoro estas iama Kongresa Sekretario de UEA kaj multjara redakciano de HEROLDO.

La landaj asocioj renkontas pli da malfacilaĵoj ol la lokaj societoj por akiri subvenciojn, eble pro tio, ke ili ne kapablas trovi sian vojon en la labirinto de la ŝtataj organoj.

Katenoj de la tradicio

Supre, preter la landaj asocioj, situas UEA, kiu meritas apartan konsideron. UEA estas la sola Esperanto-organizaĵo, kiu disponas pri iomaj financaj rimedoj kaj atentindaj buĝeto kaj kapitaleto; UEA laboras en propra domo kaj dungas malgrandan stabon de oficistoj. En tiaj cirkonstancoj, ni rajtus atendi, ke UEA havu iom pli konkretan rolon ol nun en la tutmonda disvastigo de Esperanto.

La financa forto de UEA – modesta sed reala – ne ŝajnas ekvilibre utiligata, ĉar preskaŭ la tuta agado limiĝas al livero de la tradiciaj servoj al la membroj, ĉefe la revuo kaj Jarlibro. La Asocio eĉ ne plu kapablas ekspluati esceptajn cirkonstancojn. Ekzemple, en 1959 UEA brile organizis kaj kunordigis la Zamenhof-jaron, sed en 1987 la centraj organoj de UEA grave malatentis la preparon de la Jubilea Jaro: en tiu periodo UEA amasigis stakojn da neresponditaj leteroj, kvankam ĝi trovis fortojn kaj rimedojn por modernigi sian oficejon kaj pligrandigi la domon. Temis, laŭ mi, pri erara vicigo de la prioritatoj. De tiam, almenaŭ la respondado al leteroj pliboniĝis, sed ankoraŭ ne ĉio solviĝis.

La malekvilibro evidentiĝas eĉ pli, se ni analizas la jar-kalkulojn de la Asocio. La administrado de la CO kaj la servoj al la membraro forglutas preskaŭ ĉiujn rimedojn, ordinarajn kaj eksterordinarajn: restas preskaŭ nenio por surterenaj agadoj por Esperanto. Provu ellabori iom ambician planon, ekz. konferencon de parlamentanoj, kiuj favoras Esperanton – kiun planon mi proponis kaj pretis organizi: la respondo de UEA senŝanĝe estos, ke mankas mono por tio.

Sentraŭma restrukturigo

Alia negativa fenomeno: la jarbilancoj tradicie fermiĝas per grandaj deficitoj, kovrataj je debeto de la rezerva kapitalo: en la sinsekvo de la jaroj, centmiloj da guldenoj malaperis en deficitoj. Nu, pluraj esperantistoj opinias kiel mi, ke la rezervoj – formitaj de daŭraj donacoj kaj heredaĵoj – devas esti utiligataj, prefere en formo de rentumo, por konkretaj agadoj favore al la disvastigo de la internacia lingvo, ne por kovri administrajn deficitojn. Alie, kial la esperantistoj donacu monon al UEA? Plia negativa fenomeno estas la netravidebleco de kelkaj kontoj. Sub la premo de kritikoj, kelkaj plibonigoj estas enkondukitaj tiurilate, sed multo restas farenda, ĉefe en la analizo de la veraj kostoj de la Libroservo kaj de la realaj financaj rezultoj de la libroeldonado (espereble ne subvenciata de la rezerva kapitalo).

Solvo al la supraj demandoj ekzistas, se oni ĉesos administri UEA laŭ principoj similaj al tiuj de ŝtata ekonomio, en kiu deficito estas nedisigebla struktura elemento, kaj oni, kontraŭe, transiros al moderna koncepto de entreprena administrado, en kiu ekvilibro de la spezoj (profiton ni ja ne volas!) estas ekzisto-kondiĉo. Tiun supran vojon mi indikis en 27-paĝa raporto pri la funkciado de UEA, kiun mi verkis laŭ peto de la tiama Estraro en 1987 post surloka esplorado en Roterdamo, kaj kiun mi prezentis al la Komitato. Necesas, laŭ mia opinio, sentraŭma raciigo kaj restrukturigo de niaj organoj, inkluzive de la CO, por liberigi pli da homaj fortoj kaj financaj rimedoj por la efektiva disvastigado de Esperanto.

Gian Carlo Fighiera (Italio)

Praktike kaj demokratiige

Unue mi volas emfazi, ke ankaŭ mi trovas en UEA multon por plibonigi. Ĉiu kritike pensanta homo povas fari tion. Se mi malentuziasme reagas al la artikolo de s-ro Fighiera, tio ne signifas, ke mi argumentas por centprocenta konservo de ĉiuj kutimoj en la organizaĵo. Sed ĝuste pro tio, ke kelkaj miskomprenoj de s-ro Fighiera baziĝas sur manko de sufiĉaj informoj pri la praktika funkciado de UEA, mi kredas ke kelkaj kontraŭaj argumentoj estas interesaj kaj utilaj por niaj legantoj.

Malprecizaj asertoj

Unue, kelkaj ĝeneralaj rimarkoj. S-ro Fighiera, kvankam li parolas pri la "tutmonda disvastigo de Esperanto", evidente pensas nur en okcident-eŭropa kadro kiam li mencias "pli favorajn sociajn-ekonomiajn cirkonstancojn", kaj multaj el liaj asertoj rilatas nur al tiu regiono: ekzemple, pluraj landaj asocioj ekster tiu zono havas pli fortan financan bazon ol UEA, kaj ofte ĝuste ili ne havas aliron al "modernaj teknologioj". Ĝenerale oni subtaksas la malfacilecon de tutmonda agado kaj la sekvojn por la strukturo kaj administrado de UEA.

Estas laŭ mi ankaŭ tre dubinde, provi distingi inter administrado kaj "la disvastigo de Esperanto". La Strategia Plano emfazas la ligitecon inter disvastigo kaj utiligo, kaj fakte la ĉefa tasko de la Oficejo de UEA estas faciligi tiun utiligon. Kiujn flankojn de la administrado oni trancu, cele al "disvastigo"? Certe ne la Libroservon? La Kongresan Fakon? La revuon? La Jarlibron? Ĉiuj ludas gravan rolon en la funkciado de la movado, kaj tial, efektive, en ĝia bonfarto kaj kresko.

Oni agas por kiu pagas

Fronte al asertoj pri "glutado de rimedoj" kaj "malapero en deficitoj", ni rigardu iom la realajn ciferojn. Tiujn por 1989 vi povas trovi en la maja numero, kie aperas ankaŭ la apuda grafikaĵo, kiu donas simpligitan superrigardon.

Unue, preskaŭ ĉiuj enspezoj de la Asocio venas de la individuaj membroj. Al tiuj homoj UEA liveras nur siajn servojn; ili havas por membriĝo neniun alian kialon, krom solidareco. Estas do logike, ke granda parto de la elspezoj iras al tiuj servoj, kiuj grupiĝas en la rubrikoj Salajroj, Oficejaj Kostoj kaj Eldonaĵoj (eblas aldoni la rubrikon Amortizo, kiu reprezentas la investon en maŝinaro ktp). Notu tamen, ke tie troviĝas ankaŭ pluraj agadoj, kiuj ne estas servoj sed efektive konsistigas investon en la disvastigo de Esperanto: informa agado, eldonado de gravaj libroj, financaj kaj aliaj servoj al la landaj asocioj, kaj pluraj funkcioj de la Ĝenerala Direktoro. Al tiuj aldoniĝas la ceteraj 15% de la elspezoj, por regiona agado, eksteraj rilatoj, kaj ĉiuj ceteraj taskoj de estraranoj, komisiitoj kaj komitatanoj. Certe ne estus troigo diri, ke 25% de la buĝeto de UEA estas dediĉitaj, ne al ĝiaj servoj kaj administrado, sed al evoluigo de la movado. Tiu proporcio ne malkongruas kun la rimedoj ricevitaj por tiu celo.

Pri la jara deficito en la Spezokonto, espereble niaj legantoj rigardis la klarigon sur p. 102 de la maja numero. Necesas substreki, ke ne temas simple pri "administra deficito", sed pri tio, ke UEA jare elspezas pli por sia agado ol ĝi ricevas por ĝi: t.e., ĝi efektive investas parton de sia kapitalo en la movado. Se tiu mono ne estus uzita tiucele, ĝi simple liverus iom da rento, kiel la cetera kapitalo. Nu, evidente estus malprudente elspezi la tutan kapitalon tiumaniere, ĉar tre utilas havi regulan rentan enspezon, sed la elspezita mono ne simple malaperas en nigran truon: ĝi efektive ebligas la eldonadon, regionan evoluigon kaj aliajn agadojn de la Asocio. Estus katastrofe, kriplige trancî la stabon de la Oficejo aŭ la agadon en Afriko simple por havi pli belaspektan jarkalkulon. Tio signifus nur, ke UEA kapablus eĉ malpli kontribui al la disvastigo de Esperanto, kiun s-ro Fighiera trovas grava.



ELSPEZOJ



ENSPEZOJ

Profesieco, jes!

Estas ja vere, ke la financo de UEA estas malfacile komprenebla. Parte tio simple respondas al la komplika aro de agadoj, kiujn ĝi entreprenas. Parte ĝi estas prezentebla en pli klara formo, kaj efektive oni strebas fari tion: ekz. ĉi-jare per divido de la Libroservo kaj la Eldona Fako. Sed estas iluzio kredi, ke oni povas bone kompreni ĝian funkciadon nur per studado de la jarraporto, aŭ (kiel s-ro Fighiera) per dutaga vizito al Roterdamo. Malfacile digestebla sed reala fakto estas tio, ke plej bonan konon havas la homoj profesie okupataj per ĝia administrado. Oni devas fidi tiujn homojn – ne sendemande aŭ senkritike, kompreneble, sed kun komprenemo kaj respekto. Ŝanĝoj estas efektivigeblaj nur kunlabore kun ili, ne de ekstere.

Se temas pri reformoj . . .

Per sia ekskluziva atento al la administra flanko de UEA, la artikolo de s-ro Fighiera cetere faras gravan misemfazon. Asocioj kiel la nia ĝenerale ne vivas per administrado, sed per la aktiva partopreno de siaj membroj. La problemoj, kiujn UEA frontas tiurilate, ŝajnas al mi multe pli signifaj ol administrado. Ĉiujare ni perdas, kaj gajnas, milon da membroj. Kiel tenadi tiujn homojn, sentigi al ili, ke ili apartenas? De jardekoj nia membraro restas inter ses kaj sep mil: kiel rompi tiun sorĉitan limon? La demokratio en UEA estas pli formala ol reala: kiaj strukturoj mildigus tiun problemon? Kial la agado de la fakaj asocioj tiel lamas, kaj kiel ŝanĝi tion? Kiel partoprenigi pli da homoj en decida kaj plenuma roloj? Kiel ekstereŭropigi la Asocion?

Problemoj en la administrado de UEA estas solveblaj precipe nur de ĝiaj administristoj, eventuale sub la influo de sugestoj kaj kritiko, sed ne per teorio disigita de la praktiko. Kontraste, en ĝia reformo *desube* kaj *surloke* povas partopreni ĉiu ano, ĉar ĉiu havas rektan rilaton al la koncerna problemo. Kaj tiuspeca reformo havas multe pli da signifo por nia tuta movado, finfine ankaŭ por la disvastigo de Esperanto.

Mark Fettes

En marto la redakcio de ESPERANTO *invitis dudekon da esperantistoj el la landoj de orienta Eŭropo – homoj konataj kaj nekonataj, veteranaj kaj novaj – surpaperigi siajn pensojn pri la novaj perspektivoj tie por la Esperanto-movado. Venis deko da reagoj. Pli ol ion alian, ili donas bildon pri la diverseco de opinioj kaj ŝanĝiĝemo de la situacio en tiu mondoparto, ŝlosile grava por la estonteco de Esperanto.*

Kio nova en orienta Eŭropo?

La sociaj kaj politikaj ŝanĝoj en orienta Eŭropo, kiuj nun estas en la centro de la atento, komenciĝis almenaŭ kvin jarojn pli frue, kiam Gorbaĉov lanĉis la ideojn de "glasnosto" kaj "perestrojko". En kelkaj landoj tiam ekrapidis la reformoj, kaj en aliaj la politika sistemo fariĝis pli rigida. Tio estis fundamenta cirkonstanco ankaŭ por la Esperanto-movado: laŭ la okazintaĵoj, la landaj asocioj dividiĝas en du grupojn.

En aprilo 1986 Hungara Esperanto-Asocio kvazaŭ elpaŝis el sia totalisma ŝtato: ĝi mem elektis sian propran estraron. Post duonjaro Pola Esperanto-Asocio faris la samon, en oktobro 1988 Esperanto-Asocio de Estonio, en decembro de la sama jaro Litova Esperanto-Asocio kaj Latva Esperanto-Societo, kaj en januaro 1989 Sovetrespublikara Esperanto-Unio (organizita por la ceteraj partoj de Sovetio).

HEA havis pioniran rolon ankaŭ enlande, la unua el la sociaj organizaĵoj, kiuj sukcese faris tiun paŝon. Estus do flate por la hungaroj emfazi ilian pioniran rolon ankaŭ en Esperantio, sed malgraŭ la tempa sinsekvo estus granda eraro vidi en tiu serio nur efektiviĝon de la plaĉa "domenludilo-teorio", kvankam la okazintaĵoj en iu lando certe efikis al la aliaj. Pli grava estis la simileco en la politika sistemo: la reform-procezoj en tiuj landoj atingis tiun gradon, ke ilia kvanta akumuliĝo ebligis kvalitan ŝanĝon, trarompon. La esperantistoj demokratiigis, sendependigis siajn organizaĵojn ne post, sed *antaŭ la decidaj politikaj ŝanĝoj* en la koncernaj landoj, ankaŭ per tiu pionira paŝo kontribuante al la demokratiiĝo de sia socio. La reformoj en Hungario estis la plej evoluintaj kaj profundaj, do ne estas mirinde, ke kelkaj personoj en la prezidio de HEA jam dum la vintro de 1985-86 rimarkis la unikan ŝancon kaj ekagis. La ekago rezultigis gravan konflikton, krizon en la prezidio de HEA, sed tiutempe kompreneble neniu el la koliziantaj partioj konsciis, kien evoluos tiu procezo.

Krom tiu simileco la menciitaj landaj asocioj estis en tre diversaj situacioj, i.a. el jura vidpunkto. La pola kaj hungara estis jam delonge jure rekonitaj, registritaj asocioj, la tri baltlandaj ĵus fariĝis tiaj, kaj la sovetia eĉ ĝis hodiaŭ ne sukcesis atingi tiun staton.

Alia grupo de la landaj asocioj – Esperanto-Asocio en Germana Demokratia Respubliko, Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Slovaka Esperanto-Asocio kaj Bulgara Esperantista Asocio – trovis sin en simila sendependa situacio nur en oktobro-decembro 1989, kaj laste – post la kristnaska insurekcio – povis fondiĝi la Rumana Esperanto-Asocio en januaro 1990.

Tiu dua grupo de la landaj asocioj relative malfruis, sed tute ne pro kulpo de la esperantistoj. Temas simple pri tio, ke en iliaj landoj la politikaj reĝimoj estis pli rigidaj ol en la "reform-landoj". Serio de reformoj – la perestrojko – ne lozigis la sistemon en la pli fruaj jaroj, kaj nun venis rompo, en Rumanio eĉ eksplodo, kiu abrupte ŝanĝis la situacion.

Foto: Zoltán Fejér



Kien nia lando, kien la movado? Tiaj demandoj komencis okupi hungarajn esperantistojn jam ĉe la landa kongreso en 1987.

Novaj defioj al la neŭtraleco

Kaj nun, en la nova situacio de orienta Eŭropo, kiuj cirkonstancoj determinas, influas la tiean internacilingvan movadon, kaj kiuj tendencoj montriĝas en ĝi?

La plej granda danĝero por la landaj asocioj estas, ke politikaj fortoj povos facile preni sub sian kontrolon la landajn asociojn, eĉ pli ol antaŭe. Precipe pro la refortiĝo de naciismo/ŝovinismo kreiĝis tia situacio, ja la eventoj kelklande jam drivis eĉ ĝis pogromoj. Tiu situacio logas landajn asociojn alpreni "justan nacian starpunkton" je iu aŭ alia problemo, kaj tiel fariĝi iom politika korporacio – ekskludante sin el UEA.

Sed la naciisma ondo kreas situacion, kiu samtempe estas ankaŭ granda ŝanco por avanco de la internacilingva movado. Tamen ni ne rajtas esti tre optimismaj, ĉar *neniu el la landaj asocioj havas prilaboritan, propran lingvopolitikan koncepton*. Tiel ilia enmiksiĝo en la bruajn diskutojn pri la lingvouzo kaj pri la lingvaj rajtoj, en la plej bonaj kazoj estas improvizaĵoj, sed pli ofte nur simpla transpreno de sloganoj de iu aŭ alia politika tendenco.

Ĉu ripetiĝos la historio de la dudekaj jaroj? Verŝajne ne, ĉar la situacio – malgraŭ la similaĵoj – tamen estas tute alia. Sed atendeble *ekflamos la diskutoj pri la neŭtraleco de la landaj asocioj*, eĉ pli ol tio okazis en la sesdekaj jaroj. La respondeco de la landaj asocioj estas multe pli granda, ol tiutempe, ĉar ili nun tute libere decidas kaj agas.

Inter trudita unueco kaj anarkio

Entute salutenda fenomeno estas la tiel nomata *movada multformeco* aŭ *plurvojeco*, kies signoj jam ĉie aperis. Tamen nur kun forta rezervo oni povas saluti tion, ĉar konkrete analizante la opajn iniciatojn, tro ofte ni trovas malkunlaboremon kaj maltoleremon, kondukintajn al skismoj inter esperantistoj. Temas pri ne nur konkurencaj, sed eksplicite malamikaj lokaj kluboj kaj aliaj organizaĵoj. En Sovetio eĉ paralelaj landaj asocioj aperis. Por tiuj fenomenoj *bunteco* aŭ *plurvojeco* tro ofte ŝajnas esti eŭfemismoj. Malantaŭ la *movada multformeco* ni ofte trovas malaltan nivelon de la komunuma, societa vivo, malkunlaboremon, malfortecon de la demokratiaj tradicioj, senkompromisecon de la diversaj opinioj.

Laŭ ŝajno la skismoj ne malhelpas la ekfloron de la regiona kaj kluba agado, kaj la suferantoj de tiuj problemoj estas nur la landaj asocioj. Nur ŝajne, ĉar la malforteco de la tutlanda agado pli aŭ mapli frue grave malhelpas la lokan agadon, eĉ povas neniigi la lokajn atingojn.

Plurlande estiĝas tendencoj por ĉesigi la landan agadon, menciante jen plenan aŭtonomion, jen federaciismon, jen raŭmismon, jen senkompromisan liberecon, sed praktike temas pri io alia. La tuta fenomeno pli similas al la *klasika anarkiismo*, ol al iu ajn moderna, demokratia organiziĝo. Ankaŭ tiuj ideoj, laŭ kiuj ĉiu centro nepre

"En la Esperanto-movado samtempe fortiĝas tendencoj de demokratio, kunlaboremo, pluevoluo unuflanke, kaj maltoleremo, ribela febro, malkunlaboremo aliflanke."

burokratiĝas, kaj tial estas ne nur superflua, sed eksplicite ekstermenda, venas de ekster la Esperanto-movado. Adeptoj de tiuj tendencoj ne forlasas la landajn asociojn, ne konstruas ion novan, sed ene de la landaj asocioj militiras por ĉesigi ĝiajn tutlandajn funkciojn.

Ke la kontraŭ-centrismo nur ŝajne fortigas la lokan organizadon, tion pruvas la ekzemplo – mala – en Litovio: ĝi estas la lando, en kiu sub forta kaj energia centra gvidado pleje floras la lokaj kluboj kaj plej rapide evoluas la movado.

Eksplicite *organizan krizon* ni vidas en Sovetio (sen la baltaj landoj) kaj en Rumanio, en la aliaj landoj montriĝas nur pli-malpli danĝeraj fenomenoj, tendencoj en tiun direkton. Kaj entute neniu el ili estas disigebla de la socia-politika krizo de tiuj landoj.

Koncerne la socian fonon ne forgesu, ke en tiuj landoj nun naskiĝas la *postindustria socio*, kaj tiu procezo plikomplikas la situacion. Ekz. la informado jam havas centran, decidan rolon en ĉiu sfero de la vivo, sed por la plimulto tio ne estas evidenta. En kelkaj landoj la centro de la landa asocio, en aliaj landoj lokaj aŭ regionaj organizaĵoj malemas akcepti la novan pozicion de la informado, oni volas reduktiaŭ ĉesigi tiun funkcion de la landa asocio ("ni preferu ne scii . . ."). La terminoj "centrismo" aŭ "malcentrismo" do en si mem nenion signifas, ni devas konkrete ekzameni, kion oni celas atingi sub diversaj flagoj.

Ĉu la totalismo plu malhelpos kunlaboron?

Aparta temo estas la multflanka kunlaboremo de la orienteŭropaj landaj asocioj. En la jaroj 1969-1989 okazis 22 t.n. *konsultiĝoj de la socialismaj landaj Esperanto-asocioj*. La iniciatintoj de tiu forumo estis la germano Rudi Graetz, la bulgaro Nikola Aleksiev, kaj la hungaro Béla Berceli. La konsultiĝoj forte kontribuis al la relativa prospero de la movado en orienta Eŭropo dum la lastaj jardekoj. Laŭ ĝiaj decidoj la partoprenantoj lerte apogis unu la alian (nur unu ekzemplo: la eldonaĵoj de UEA dum multaj jaroj nur enpoŝtiĝante en Hungario, pere de HEA, atingis la adresitojn en Sovetio). Tiu forumo *legitimis sin antaŭ la instancoj per politikaj deklaroj*, ekz. kontraŭ la neŭtrona bombo aŭ por solidareco kun Vjetnamio. La deklaroj iom post iom malfortiĝis, kaj lastfoje aperis en 1986: tio estis jam nur sola frazo en la komuniko pri la konsultiĝo, kontraŭ la militecigo de la kosma spaco.

En 1987 la hungaraj delegitoj proponis akcepton de baza dokumento, en kiu tute mankis politikaj deklaroj, kaj laŭ kiu – anstataŭ la ĝistiama, tute superflua sekretumado – ĉiuj akceptitaj dokumentoj estu publikaj. Tiu propono estis akceptita en 1988. Unu jaron poste, en aprilo 1989 en Moskvo – denove laŭ la propono de hungara delegito – la konsultiĝo deklaris, ke *la refonditaj baltaj landaj asocioj estu plenrajtaj partoprenantoj*, do tute egalrajtaj kun Sovetrespublikara Esperanto-Unio. La jam ĉeestanta litova delegito tuj okupis sian lokon ĉe la konferenca tablo, kaj tiel ĝuste *tiu Esperanto-konferenco estis la unua kazo, ke sendependa litova organizaĵo estis tute egalrajta kun la soveta partner-organizaĵo*.

Daŭre estas forta bezono por tiuspeca forumo de la estroj de la landaj asocioj, sed tiuj konsultiĝoj daŭros verŝajne en pli vasta rondo, eventuale por la landaj asocioj de mez-orient-Eŭropo. Sed *la amasiĝantaj internaj problemoj ankaŭ tiun kunlaboron jam malhelpas*: Pola Esperanto-Asocio, komisiita pri aranĝo de la ĉi-jara konsultiĝo, mem sola decidis prokrasti ĝin.

La epoko de "glasnosto" kaj "perestrojko", kiu komenciĝis en 1985, alportis la forigon de la totalismaj reĝimoj, sed la rapidaj ŝanĝoj, la nekutima politika malfermiteco samtempe ankaŭ konfuzis la homojn. En la Esperanto-movado samtempe fortiĝas tendencoj de demokratio, kunlaboremo, pluevoluo unuflanke, kaj maltoleremo, ribela febro, malkunlaboremo aliflanke. *Multaj esperantistoj firme kredas falsan alternativon: ke ili devas elekti inter la sendependeco kaj la tolerema unueco.* Tio signifas, ke kvankam la totalismaj strukturoj estas for, la totalisma pensmaniero pluvivas, i.a. en la Esperanto-movado.

Nun certe estas nur transira periodo. Kiel longe ĝi daŭros kaj kiuj tendencoj superos la aliajn? Nu, la respondo je tiuj demandoj diferencigas la optimistojn de la pesimistoj.

Árpád Rátkai (Hungario)

Árpád Rátkai estas vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio.

Disfalo de la putriĝinta sistemo

La kompletega fiasko de la sistemo, kiu kun senlima orgojlo postuladis la homan subiĝon, estas verŝajne la respondo de la historio al la giganta trompaĵo, en kiu vortoj, deklaroj kaj rezolucioj devis anstataŭadi satigadon de la homaj bezonoj. En tiu ĉi historia momento necesas almenaŭ atentigi pri morala malkomforto de tiuj E-movadanoj, kiuj dum jardekoj ne nur rolis obee en komunisma propagando, sed eĉ – identiginte sin kun ĝi – provis meriti apartan agnoskon de la konvenaj instancoj. Redaktoroj de kelkaj revuoj, de radioelsendejoj, funkciuloj de landaj organizaĵoj (vidu jarlibron de UEA), kiuj persistege kontribuis al falsigado de la bildo, misuzante la internacian lingvon en la servo de la senrespondecaj ruzuloj, nun aŭ eksilentis aŭ komencis blovi en alian tubon. Ili tamen ekzistas kaj provas diversmaniere defendi siajn poziciojn. Kompatenduloj! Bonvolu ne forgesi pri tiuj kamaradoj, kiuj per unu denunca flustro komplikigis vian vivon, nuligis vian karieron, senigis vin de la meritita respekto aŭ bremsis vian aliron al la interetna fonto de la kulturo. Ili ne meritas vian pardonon, kvankam samlingvanoj!

Ĉi-jare oni kongresos en Kubo, kie la oratoro lasas la solan alternativon: komunismo aŭ morto. Ne eblas amase sinmortigi, por klare respondi je ĝi. Sekvas tamen la dilemo: kiu mortos pli frue. Decas vivi plu, por travivi baldaŭan neniiĝon de la trompa sistemo! Omaĝon al Ivo Lapenna, kiu science konkludis tian finon!

En la komunisma sistemo ĉiuj ŝtataj movadoj ricevadis taskojn de siaj kompartioj, kaj unu el la ĉefaj estis: proklami gloron de la sistemo. La statutoj de Pola Esperanto-Asocio en siaj sinsekvaj metamorfozoj (da kiuj mi travivis dekkelkajn), krom la sola en



AIS-profesoroj Tybłewski kaj Frank (dekstre): novaj strukturoj de agado provizas pli racian bazon.

1980 sub d-ro Jerzy Leyk, enhavis ĉiam tiun taskon avangarde. La strukturo de la organizaĵo kaj kondiĉoj de la statuta realigado estis pure kazernaj. Eblis esprimi sian koleron kontraŭ difinita persono, sed neniam kontraŭ la absurda dependo de la ĉefurbaj estroj, dungitaj kaj pagataj por malebligi efektivan agadon.

Tial polaj esperantistoj vidas sian ŝancon en la nunaj transformiĝoj de la socia kaj ekonomia vivo kiel eblecon *efektivigi* la volon de la membraro. Kvankam manko de la monrimedoj senteble limigas tion, ne plu ekzistas la formalaj obstakloj utiligi la internacian lingvon laŭ siaj bezonoj.

Pri la perspektivoj de la E-movado en Pollando mi pensas laŭ kriterioj de memrealigado; ĝi grave ŝanĝigis, ĉar antaŭ nombraj individuoj aperis la vojoj al Eŭropo, kiu al milionoj anstataŭas la mondon. Personaj kontaktoj kun esperantistoj nun povas ŝanĝiĝi en efektivan kontakton kun eŭropa civilizo, nun ne plu abomenata – kun valorsistemoj liberaj de sklaviga marksisma premo. Tio estas procezo por jaroj, ĉar vivinte dum jardekoj en sistemo, kie ĉia valoro estis subigita al "taktiko" aŭ "aliancoj" aŭ "tuja bezono", multaj perdis orientiĝon pri fundamentaj vivceloj.

En tia socia situacio la esperantista movado devus respondi je pli kaj pli fortaj atendoj de la membraro – indiki eblajn celojn, helpi trovi la vojon, liberigi de la angoroj pro vaneco de diversaj penoj. Nuna PEA entute ne kapablas tion ĉefe pro manko de la konscio ĉe la formalaj estroj, kiuj defendas sian fiaskan koncepton, pretaj fiaskigi penon de aliaj. Mi supozas, ke ĝi devas transformiĝi en liberajn rondojn aŭ klubojn kun aparta, ne stirata centre, realigado de lokaj mikroprogramoj, laŭ la kapabloj de la plej aktivaj membroj. Sumo de tiuj realigoj montros, kian virtualon reprezentas la pola esperantistaro kaj ĉu, ne "strangolata per marksismo", ĝi plu restos imuna je ideoj de la libera cirkvito. En la procezoj de adaptiĝo unue do observeblas la dura demando: kiu pagos pro tio? Oni ne plu disĵetas la brakojn en senpova gesto, kiam temas pri eŭropaj prezoj; oni komprenas, ke ĉio kostas, ke ĉio estas pagenda, kaj ke por pagi, necesas havi. Kaj por havi, necesas entrepreni. Mi do antaŭvidas, ke polaj esperantistoj pli kaj pli nombre vojaĝos kaj turismante realigos la bezonon de entreprenado. Malpli ofte oni kantos la himnon, malpli emfaze parolos pri paco, sed vivos pli honeste.

Mi mem fieras pro la fakto, ke la reguloj de racia agado manifestiĝas en Pollando en realigado de la koncepto de prof. Helmar Frank – pri Akademio Internacia de la Sciencoj. En Bjalistokon (en unu el la plej izolitaj anguloj

de la lando) alvenis institucio, per kiu eblas realigi siajn intelektajn aspirojn, uzante la internacian lingvon. AIS kunportas la interetnan virtualon de la instruantoj kaj studantoj kune kun la necesa mono, ebligante al la lokaj spiritriĉuloj fari sian propran pozitivan kontribuon.

Tyburcjusz Tybłewski (Pollando)

Tyburcjusz Tybłewski estas la aŭtoro de Skizo pri personeco de esperantisto *(1985) kaj* Psikosocia problemaro de internacia turismo *(1989).*

Venas tempo por intelektuloj!

La ĝisnuna periodo estis komplika por Bulgara Esperantista Asocio. De unu flanko la ŝtato postulis de ĝi multon, de alia – donis multe al ĝi. Nun la bulgaraj esperantistoj povas fieri, ke ilia organizo faris bonan invest-politikon, akiris stabilan financan staton, kaj dank' al siaj firmaoj povas pli sentreme elteni la antaŭvidatan inflacion, kiu jam frapas sur la pordon de Bulgario. La influo de BEA enlande estas fakto kiun oni ne povas ignori, kvankam ĝi estas rezulto de la monopolista rolo de BEA en la esperantista vivo de la lando, kaj ankaŭ de la granda aŭtoritato de la prezidanto de BEA, Sava Dalbokov, eksa vicprezidanto de la bulgara registaro.

Antaŭ du jaroj estis proklamita la komenciĝo de "perestrojko" en BEA. La lokaj esperantistaj societoj fariĝis klerigan rolon. Kiel ekzemplon mi povas mencii la fakton, ke dum la lastaj du jaroj aperis neniu libro en Esperanto, kaj antaŭe ili abundis kaj ete logis la esperantistojn el la landoj kun "malmola" valuto. Nur la asocia organo *Bulgara esperantisto* ŝanĝis sian aspekton kaj kvaliton, dum ekaperis la bulgarlingva revuo *Panorama Esperanto*. Tiutempe BEA daŭrigis sian politikon de agado en UEA, subteno de MEM kaj KEK, tenado de kontaktoj kun SAT.

Tiel atingis la bulgaran esperantistaron la eventoj en Sofio, okazintaj je la 10-a de novembro de la pasinta jaro. La nova socia realo konfrontis forte la loĝantaron. Kaj tiu ĉi stato sendube komencis influi ankaŭ la Esperanto-movadon en Bulgario.

Jam aŭdeblas voĉoj pri nova esperantista organizo, sendependa de BEA. Ankaŭ la junularaj funkciuloj emas apartiĝi, sed atendante vojaĝojn eksterlanden je kosto de BEA, ne anoncas tion. Ankaŭ la intelektuloj en BEA montris sian malkontenton kaj fondis propran klubon, kies rolon ili difinis: "por disputi kaj proponi eĉ foje alternativajn solvojn". Sentante la venton en sia organizo, la oficistoj de BEA same organizite kaj kolektive eliris el la estraro, lasante la aliajn respondeci pri la stato de BEA. Nun la meza aĝo de la estraranoj estas 70 jaroj, kaj, kvankam ili estas sciencistoj kaj kulturagadantoj, ili estas homoj, kies ideoj elĉerpiĝis . . .

Certe la alvenanta 42-a kongreso de BEA, okazonta de la 29-a de junio ĝis la 1-a de julio en la urbo Ŝumen, devas trovi respondojn kaj solvojn al multaj demandoj kaj problemoj. Sed la plej grava estas tiu pri la estonta estraro. Por ĝi estas bezonataj homoj kapablaj, kun bona lingvoscipovo, homoj aŭtoritataj, kiuj unuigos la esperantistaron kaj donos eblecon al ĉiu montri sian povon. BEA devas deklari sian neŭtralecon kaj sendependecon de la politikaj partioj kaj la aliaj socimovadoj en Bulgario, devas demokratiigi sian internan esperantistan vivon, devas restrukturiĝi. Oni devas kompreni, ke la plej grava tasko de la Asocio estas formi kaj eduki esperantistojn. Sian avangardan rolon devas re-alpreni la E-kulturo kaj scienco en Bulgario.

Jes, venas tempo por intelektuloj!

Ljubomir Trifonĉovski (Bulgario)

Ljubomir Trifonĉovski estas konsilanto kaj aktiva kulturorganizanto en Bulgara E-Asocio.

"BEA devas deklari sian neŭtralecon kaj sendependecon de la politikaj partioj kaj la aliaj socimovadoj"

pli memstaraj, eklaboris sen direktivoj, sed, kvankam unuigitaj en sia loka distrikto, restis tro solaj. La oficejo de BEA burokratiĝis kaj preskaŭ izoliĝis. La dungitaj oficistoj subite kolektive eniris en la estraron kaj transprenis gvidfunkciojn. La restrukturiĝo kontraŭis kelkajn paĝojn de la Statuto de BEA, kiu ankoraŭ validis, ĉar la sekva 42-a kongreso okazos somere 1990. Pli kaj pli BEA perdis sian kultur-

"Jam vidita" en Jugoslavio

La nunaj reformoj en Jugoslavio ŝajnas "jam vidita" filmo el la fino de la sesdekaj jaroj, ĉar la tiam lanĉita ekonomia reformo (kiun ne sekvis politika, pro kio verŝajne ankaŭ la ekonomia fine fiaskis) inaŭguris procezojn similajn al tiuj, kiuj skuas nuntempe la landojn de orienta Eŭropo. La reformo de la sesdekaj jaroj influis ne nur negative sed ankaŭ pozitive al la tiutempa stato de la E-movado. La negativaj karakterizaĵoj estis estingiĝo de modesta ŝtata subvencio al JEL, disfalo de "centra" JEL, likvido de ĝia malfortika, sed sole funkcianta oficejo, kaj posta malapero de ĝia organo *La suda stelo*. La pozitivaj efikoj estis, almenaŭ unue, retrovo de reala socia pozicio de la organizaĵo en la aktuala socipolitika sistemo (tiun aferon la gvidantoj, redaktoroj aŭ oficistoj de JEL en la sesdekaj jaroj simple ne kapablis kompreni), kaj due, financa memstariĝo kaj profesiiĝo de por-esperanta agado en Kroatio, Bosnio-Hercegovino, kaj efemere ankaŭ en Slovenio.

La nunajn reformojn en Jugoslavio, kiuj havas multe pli fundan karakteron, la E-movado atendas, ŝajne pro la jama "historia sperto", multe pli preta ol antaŭ dudeko da jaroj. En reformo de la ŝtato kaj la politika sistemo necesas denove difini sian (preferatan) socian pozicion. Ĝis nun JEL (kaj ĝiaj organizaĵoj) apartenis al fronto (organiza kaj agada) de junulara soci-politika organizaĵo. Nun ĝi klopodas, konforme kun rekonsidero de la socia pozicio de la junularo, resti en tiu mallarĝa sed ege grava rondo de sociaj organizaĵoj, pri kies bonfarto, aktivaĵoj kaj pretendoj zorgos la ŝtato mem, ĉar ĝi ja trovas ilin interesaj kaj gravaj por edukado, aldona klerigado kaj pozitiva socia orientado de la junularo.

Krome, la aktuala koncepto de ekonomia reformo donas multe pli favorajn kondiĉojn por memfinancado de sociaj organizaĵoj (interalie ili rajtas fondi komercajn kaj aliajn entreprenojn kun eksterlanda, propra, privata aŭ miksita kapitalo). Por la

E-movado tio prezentas "historian" defion, ĉu ĝi kapablas enmerkatigi siajn komunikajn avantaĝojn, pri kiuj ĝi kutime argumentas, precipe en la sektoroj de turismo, intelektaj servoj kaj kultura interŝanĝo. Tio supozigas plian profesiiĝon de poresperanta agado kun ĉiuj aldonaj efikoj kaj, eble plej grave, pli materian allogon de Esperanto por novaj generacioj de gejunuloj kaj civitanoj.

Temas do pri la ekonomia kaj socia defioj, kiujn la okcidenteŭropa movado en siatempe adekvataj historiaj kondiĉoj simple ne kapablis sukcese respondi, pro kio dum jardekoj ĝi troviĝas ekster realaj sociaj kaj ekonomiaj fluoj, dum ĝia movada strategio fine reduktiĝis al pledado (rezoluciverkado) ĉe la mondaj aŭ eŭropaj institucioj, al "konstanta informado" (ĉefe pri la interna kultura vivo!) kaj al introverta literaturadorado.

"Temas do pri la ekonomia kaj socia defioj, kiujn la okcidenteŭropa movado en siatempe adekvataj historiaj kondiĉoj simple ne kapablis sukcese respondi."

Ni esperu, ke en la nunaj reformoj en Jugoslavio kaj en aliaj landoj de orienta Eŭropo, pro intereso de la monda sed eble unue de la okcidenteŭropa E-movado, la "historia ŝanco" ne estos facilanime (legu: egoisme) forlasita.

Senad Čolić (Jugoslavio)

Senad Čolić estas aktivulo en Jugoslavia Esperanto-Ligo kaj E-Ligo de Bosnio-Hercegovino, kaj la ĉefredaktoro de Jugoslavia stelo.



Simbolo de la florado kaj stagno en Jugoslavio: *LA SUDA STELO, dum multaj jaroj unu el la plej brilaj revuoj en Esperanto, tamen ne travivis la socipolitikajn svingiĝojn de la "titoismo".*

Esperanto ĉe la vojkruciĝo

Venis la tempo surtabligi la verajn fakturojn. Kaj por tio necesas reala diagnozo.

Kio estis la E-movado ĝis nun?

Spirite ĝi estis humanisma movado de pacifistoj (almenaŭ ĝi sin mem proklamis tia) kaj samtempe alloga komunumeto, en kiu la mediokruloj (mezkapabluloj, kiuj pri si mem havas tre altan opinion) povis trovi bonegan kuŝejon por kontentigi siajn tropufitajn ambiciojn. Propagandcele oni uzas humanismajn kaj pacifismajn sloganojn por allogi iom da novuloj. Interne la movadon firme kuntenis hierarkia piramido de malkapablulkratio (en lokaj kluboj diktatoris plej ofte mediokruloj kun senfinaj mandatoj, ili elektis inter si mediokrulojn por la landaj asocioj kaj tiel plu).

Materie la situacio iom diferencis okcidente kaj oriente. En okcidentaj landoj tian movadeton neniu subtenas. Ĝi ne estas ekonomie utila, ĝi ne havas politikan karakteron. Ĝi plej similas al eta religia sekto. Sekve, ĝi devas mem financi sin el individuaj kotizoj. Pro la relativa bonstato materia en tiuj landoj la alteco de la kotizoj povis teni sufiĉe stabila la materian vivon de tiu eta komunumeto. Escepte, ŝtatoj subvenciis kelkiun projekton de la Esperanto-junularo.

En la Oriento la movado devis adaptiĝi al la cirkonstancoj de la ŝtata ĉionpovo, kaj la movadoj plej ofte flate submetiĝis al la ŝtataj potenculoj kaj ofertis siajn servojn por internacie reklami la "grandajn atingojn" de la koncerna "plej ideala ŝtatordo". Pro tio en limigita grado ili ricevis koncedojn povi sendi delegitarojn al eksterlandaj E-kongresoj. Tiaj ĉi koncedoj iom post iom evoluigis orienteŭropan E-turismon, homoj relative amase aliĝadis al la movado esperante povi facile vojaĝi okcidenten aŭ almenaŭ koresponde rilati al ĝi.

Nun la ĉionpovaj potenculoj senpotenciĝas. La flatulaj E-organizaĵoj perdas siajn protektantojn, popolanoj ricevas libere pasportojn, la merkato devigas onin mone pensi – ideologioj perdis ĉiun allogon, eĉ la pacismaj.

Kia situacio estas en Jugoslavio?

En la 70-aj kaj 80-aj jaroj estis bonegaj tempoj de relativa liberalismo en politiko, sufiĉe optimisma, kreskanta ekonomia situacio (pro kreditoj kaj gastlaboristoj), kaj malgraŭ la socialismo, eblis entrepreni iniciatojn, fondi novajn instituciojn, societojn, agadojn. Tiam post ioma stagno reekfloris la kroatia movado kaj mirinde kreskis la bosnia, relative kontentige funkciis ankaŭ aliaj krom la serba, kiu dum jaroj havis personarajn problemojn. Komence de la 80-aj jaroj la krizo komencis influi la movadon, sed ne tuj, ĉar atingoj de la antaŭa jardeko pludaŭris (la movadon ekhelpis influaj homoj, kiuj akiris konfidon al ĝi en la antaŭa periodo). Dank' al la centjariĝo de Esperanto kaj IJK en 1988 en Zagrebo iel la linio de malprogreso ne videblis ĝis 1988, sed tuj poste rapide amasiĝis signoj de ŝrumpiĝo en Kroatio. En Slovenio jam multe pli frue praktike ĉesis la movado. En Serbio ĝi daŭre restis dissplitita kaj

sensignifa kaj en Makedonio ĝi neniam havis bonan gvidantaron. La bosnia movado estis tre "porŝtata", eĉ la ejojn ĝi ricevis en politika organizaĵo. Ĝi ankaŭ evoluigis branĉon de E-turismo ligitan al la orienteŭropa entreprenado. Verŝajne ankaŭ ĝi baldaŭ spertos gravajn problemojn. La kroatia movado denove ekmarŝis la vojon de enfermiĝo, sektiĝo, verdismo. La rilatoj kun IKS preskaŭ komplete estas rompitaj, pluraj societoj ĉesis funkcii, la membraro malplinombriĝas, la agadoj fariĝis denove nur internaj (vojaĝoj de esperantistoj, internaj renkontiĝoj kaj kunvenoj, eldonado de internaj gazetoj kaj bultenoj, esploroj de la movada historio ktp), la junuloj estas dispelataj.

Evidente la estonto en Jugoslavio neniel estas brila. Ĝin atendas esence la sama sorto kiel tiu de la Okcidento. La ŝtato ne plu pretos subvencii en sin mem fermitan movadeton kun kelkcenta membraro, kaj la mediokrula gvidantaro ne kapablos kaj ne volos turni sian al la merkato.

Ek al la surmerkatigo!

Esperanto bezonis cent jarojn por fariĝi matura lingvo kaj tiamaniere preta, plenuzebla varo. Tiun ĉi fazon de kreskado kaj maturiĝo de iu produkto kutime ne pagas industrio aŭ ŝtato, sed firme kredantaj amatoroj. Mi daŭre admiras la grandegan laboron, kiun faris la amatora movado de esperantistoj sur la literatura, traduka, pedagogia kaj terminologia kampoj. Sed nun, kiam la produkto definitive pretas por la surmerkatigo, la "sciencistoj", kiuj ĝin evoluigis en projekta fazo, rezistas transdoni sian "idon" al la merkato. Nun ni nepre bezonas la politikon de surmerkatigo.

Esperanton oni devas aplike uzi en diversaj interesbranĉoj, kie ĝi tuj estas utiligebla por iu homgrupo, kiu pro tio tuj estos preta pagi por ĝi merkatan valoron. Tiun surmerkatigadon devas prepari profesiuloj. La nuna profesia aparataro en la landaj asocioj kaj internaciaj asocioj ne volas fari tion, ĉar ilia celo estas alia: servi la nunan esperantistaron, ne la mondon.

Kelkaj individuoj kaj kelkaj ekstermovadaj institucioj ekpaŝis sur tiun vojon. Ilia rolo estas grandega, ĉar la ĝusta kaj moderna surmerkatiga laboro estas esenco de la komerco. Ili ankaŭ bezonos tempon. Poste, ili rapide serĉos kvalitajn esperantistojn por enoficigi ilin. Akumulita mono pliprosperigos la disvastigadon de Esperanto, ebligos enlaborigi novajn esperantistojn, kaj tiuj plilarĝigos la agadkampojn, eĉ malgraŭ la klasika movado, kiu verŝajne klopodos rezisti al tiu evoludirekto.

Sekve, ni nun troviĝas ĉe la vojkruciĝo. Se la nun komencaj paŝoj de komercigo sukcese evoluigos la merkaton, post deko da jaroj ni havos konkurence fortan lingvon sur la monda merkato. Se ne, la E-movado mem ĝin eble por ĉiam dronigos kaj marĝenigos.

Zlatko Tišljar (Jugoslavio)

Zlatko Tišljar estas la direktoro de Internacia Kultura Servo en Zagrebo.

GDREA – ĉu nur epizodo?

Sincere dirite, mi ja tre esperis pri ege necesaj reformoj en GDR. Mi esperis, ke ŝanĝiĝos i.a. la vojaĝpolitiko de mia lando, ĝis antaŭ nelonge tre malfavora por Esperanto. Nu – la ŝanĝoj tamen fariĝis tiom radikalaj, ke GDR ne reformiĝos: post iom da tempo ĝi simple ĉesos ekzisti kiel memstara ŝtato. Kaj GDREA en ĉi tiu situacio?

Gravas, ke ankoraŭ sufiĉe bone funkcias la tegmento de GDREA, la kultura amasorganizaĵo "Kulturligo", kiu apenaŭ perdis membrojn, malsame

"Ni esperu, ke la fundamento de GDREA, metita dum 25 jaroj, estas sufiĉe solida por helpi venki la problemojn."

kiel la plej multaj tradiciaj organizaĵoj en GDR. Pro kio? Ĉar Kulturligo sendube estis jam antaŭe relative libera organizaĵo, en kies kadro multo eblis, se oni sciis uzi tiun kadron, kaj ĉar la homoj membras en Kulturligo pro tute konkreta ligiteco al interesoj, kulturaj aktivadoj, hobioj. Kial forĵeti la klubojn, la subvenciojn kaj aliajn avantaĝojn, kiujn ne povus havi memstaraj organizaĵetoj?

Ĝis nun ne leviĝis postuloj en GDREA, forlasi Kulturligon. Inter la esperantistaro de GDR regas ĝojiga solidaro al la asocio. Oni donacas monon. Oni volas daŭrigi la agadon, ne lasi forflui ĉion, kion oni atingis dum la lastaj 25 jaroj. Kompreneble ekzistas ankaŭ tiuj, kiuj sentis sin unuavice bremsitaj kaj vidas nur la limojn, kiujn – pro la politika sistemo en GDR – ankaŭ metis Kulturligo al GDREA. Sed tiuj homoj malmultas.

Ankoraŭ funkcias la oficejo de GDREA, sed anstataŭ kun 4,5 nur kun 2,5 oficistoj. Almenaŭ por la kuranta jaro *Der esperantist* verŝajne aperados (kompreneble kun malfruoj). Okazos seminarioj, renkontiĝoj kaj aliaj aranĝoj. Tre prosperas koresponda kurso (kun jam 1000 lernantoj). Ok altlernejaj kursoj funkcias. Lerniloj novaperas kaj reaperas ĉe ŝtata eldonejo. La junularo tiom aktivas, ke ĝi fondis memstaran organizaĵon. Tio estas bona signo. Tamen – la tempo de la malavaraj subvencioj pasis. GDREA lernas pene, kiel per buĝeto labori. Ĉar estas certe, ke eĉ pluekzistonta Kulturligo ne plu havos la tradician financan bazon. Ni esperu, ke la fundamento de GDREA, metita dum 25 jaroj, estas sufiĉe solida por helpi venki la problemojn. Ja ekzistas multaj novaj ŝancoj:

1) Malaperis komplete la mistikaĵo pri la unuarangeco de la rusa lingvo. La fiasko de la ŝtata fremdlingvoinstruada politiko en GDR estas evidenta. Estas novaj ŝancoj por saĝe enigi Esperanton en la lingvoedukan pejzaĝon de GDR, por argumenti kontraŭ lingva diskriminacio. Aliflanke, la angla jam venas rapidpaŝe . . .

2) Finfine GDR-civitanoj povas libere vojaĝi. Do multaj esperantistoj el GDR ekaktivos (espereble) en la internacia movado, ties aranĝoj kaj aktivaĵoj, abonos gazetojn, membriĝos en UEA ktp. Entute GDREA pliampleksigos sian agadon en kaj por UEA, TEJO kaj aliaj organizaĵoj.

3) La esperantista vivo en GDR multe pli internaciiĝos, ĉar tre baldaŭ – almenaŭ por eŭropaj landoj – forfalos vizoj, devigaj monŝanĝoj k.s.

4) GDREA, jam antaŭe sufiĉe memstara organizaĵo en Kulturligo, nun ankoraŭ pli memstariĝos. Tio necesigas i.a. novan statuton, nun ellaboratan kun forta konsidero de la UEA-statuto. Antaŭvideblas ŝanĝita strukturo. Malaperos distriktoj, revenas la "landoj" (Meklenburgo, Saksio, Turingio k.s.).

5) Necesas rekonsideri kelkajn iom tro mallarĝajn poziciojn, ekz. rilate al SAT. Ankaŭ la stalinisman influon en la Esperanto-movado ni prezentos sen tabuoj.

6) Aparte gravaj estos la rilatoj inter GDREA kaj GEA. Jam ekzistas tre promesplenaj kontaktoj. Kvankam ambaŭ asocioj ja disponas pri *du* komunaj lingvoj, ilia faka kaj alispeca kunlaboro povos multe utili ne nur al ĉiu el ili, sed al la tuta movado. Multo nun dependos de la unuiĝo de ambaŭ landoj. GDREA pretas digne alporti sian kontribuon al la nove formiĝonta tutgermana Esperanto-movado.

7) Ne malgrave, la abstino pri la lingvaj kaj aliaj problemoj de Eŭropo finiĝos. La orienteŭropa potencialo de la Esperanto-movado povus doni novajn impulsojn al la eŭropa agado.

Tamen, malgraŭ la stalinismeco de la pasinteco en GDR, restas fakto, ke la movado floris. Pri la estonteco ni esperu sed ne kuraĝas prognozi.

Detlev Blanke (Germana DR)

Detlev Blanke estas la sekretario de GDREA.

Senmona libereco

Komence mi devas diri, ke granda plejparto de nia loĝantaro ĝojegas, ke ni havas nun politikan liberecon, eĉ komprenante, ke komence ni devos la liberecon pagi per dumtempa ekonomia malpliboniĝo. Tio rezultas de nia netranspagipova mono. Ekzemple la homoj, kiuj povas enspezi la okcidentan monon kaj vivi ĉe ni, havas ĉi tie paradizon. Pro tio preskaŭ ĉiuj homoj strebas labori almenaŭ parte por iu okcidenta firmao aŭ almenaŭ dumferie labori ie en okcidento por povi enspezi okcidentan monon.

"Mi ne povas garantii, ke ni restos membroj de UEA, ne havante monon eĉ por pagi nian organon Starto."

Estas komprenebla afero, ke okazadas, ke ekzemple iu specialisto, kiu trovos laboron eksterlande kiel helpanto forlasos sian postenon (ne havante tiom longan libertempon, ekz. 3 monatojn) kaj riskas, ke oni trovos alian kaj ne akceptos lin reen post lia reveno. Jam kelkajn homojn mi konas, kiuj agis tiamaniere.

Pri la Esperanto-movado sub tiuj novaj kondiĉoj, kiel ekzemplon mi prenu ĈEA, pro tio, ke la situacion mi bone konas. Antaŭ la revolucio ni ricevadis modestan, sed tamen konkretan subtenon de la ministerio por kulturo, ĉar ni helpe de Esperanto vere disvastigas nian kulturon. Sed de tiam ni ricevis nenion: oni promesis al ni kvaronon, t.e. 25 000 Kĉs anstataŭ 100 000. Krome, rimarkinde altiĝis poŝtelspezoj (danke al dio ĝis nun nur enlandaj), kio signifas por ni proksimume 80 000 Kĉs pli dum 1 jaro. Ŝanĝo de la kurzo signifas, ke ni pagos kotizon de UEA pli multekoste (en niaj kronoj) je proks. 20 000. Fakte mi devas diri "pagus", ĉar mi ne povas garantii ke ni restos membroj de UEA, ne havante monon eĉ por pagi la fakturon por la 1-a numero de nia organo *Starto*. Do kaj mi mem kaj miaj kolegoj prizorgas precipe financajn rimedojn, strebante travivi kaj savi la asocion. Krome, ni ĝis nun ne sukcesis kolekti por novkonstruo de la monumento eĉ la sumon, kiun ni jam elspezis por la projekto, por medaloj por donacintoj ktp. Tamen ni esperas, ke ni iamaniere sukcesos, sed ni devas fortigi la reklamon eksterlande, ĉar ĉe ni nun estas tia amaso de monkolektoj, ke ankaŭ esperantistoj ofte preferos subteni iun alian celon. Sed ni nepre bezonas okcidentan monon por povi provizi nian membraron per libroj, kiuj aperas eksterlande. La monkolekto por la monumento donas al tio ŝancon. Kontraŭ tiu mono ni aĉetadas librojn, disvendas ilin al niaj membroj kaj al la konto por novkonstruo ni transdonas la kronojn.

Krome, la asocio devas fari ankaŭ multajn malprofitajn agojn, ekz. ĉiuj fakaj aranĝoj estas malprofitaj, ankaŭ la propagando de Esperanto kaj simile, kaj nur malmultaj aranĝoj (turismaj, skribaj kursoj) povas esti profitaj. Kaj en tiu profitdona agado ni jam havas konkurencon. Ĉar la esperantista merkato estas ege limigita, alies klientojn ni perdos.

Mi skribis pri la situacio en ĈEA, sed de kolegoj en Hungario kaj Slovakia E-Asocio mi scias, ke ĉe ili estas situacio simila. Tia estas la ekonomia realaĵo. Male, se temas pri intereso por Esperanto inter homoj, ĝi iom kreskas. Por multaj estas alloga ideo, ke oni povas helpe de Esperanto facile trovi amikojn okcidente. Mi eĉ supozas, ke por multaj estas tio la plej alloga (se ne unusola) kialo por eklerni Esperanton. Ekzemple, nur havi eblon ie en la Okcidento senpage tranokti estas neimagebla avantaĝo por ni. Sed tio havas ankaŭ negativan flankon. La intereso por Esperanto en okcidenta Eŭropo malkreskas, kaj por komencanto de orienteŭropa lando estas ege malfacile trovi korespondamikon okcidente. Tiuj malmultaj, kiuj tie ekzistas, jam havas iujn kaj timas komenci novan korespondadon, ĉar eble tiu nova ĉeĥo aŭ polo aŭ slovako aŭ hungaro ion deziros. Fakte al mi tiu misuzo de Esperanto ne plaĉas kaj mi batalas kontraŭ tio, sed aliflanke mi komprenas tiujn niajn esperantistojn, kiuj faras tian malbonan reklamon al nia Esperanto-movado.

Petr Chrdle (Ĉeĥoslovakio)

Petr Chrdle estas la prezidanto de Ĉeĥa E-Asocio.

***Signifoplena datreveno:** La pasintjara kongreso de ĈEA markis 20 jarojn post ĝia fondiĝo en la "praga printempo". Tri monatojn poste la asocio subtenis perdeklare la ribelantajn studentojn.*

Pensoj post la "Budapeŝta Kunveno"

Du semajnojn post la okazaĵoj de Berlin kaj Leipzig, Hungara Esperanto-Asocio dissendis al la junularaj sekcioj de la socialismaj landoj inviton al Budapeŝto por rapida kunveno je kosto de HEA. Tiel estis eble interŝanĝi unuajn spertojn. Partoprenis Roberto Zaremba, Andrzej Broda (PEJ); Ela Malik (PSEK); Sandra Kinast, Torsten Bendias, Bert Schumann (GDREJ); Karel Rysanek, Jozef Sučik (ČEJ); Pavel Grigorov (BEJ); Peter Nagy, Sandor Hideg, László Szilvási, Edith Slezákné (HEJ); Valentin Seguru (Rusio); kaj Külli Volmer (Estonio). Krome ni havis la eblecon interŝanĝi ideojn kun Vilmos Benczik, Oszkár Princz, So Gilsu kaj aliaj.

Mi ne citos ĉi tie la unuopajn landajn spertojn, ĉar ili estas malaktualaj jam post kelkaj semajnoj. Gravas alia demando: Kio estas komuna kaj kiel oni povas interŝanĝi spertojn por bone eviti erarojn?

La partoprenintoj de Budapeŝto konkordas, ke ni daŭrigu apartajn kunvenojn laŭ la modelo de la konsultiĝoj de la E-Asocioj de la socialismaj landoj. Mi volas emfazi, ke laŭ la probablo niaj landoj ankoraŭ multajn jarojn konservos komunajn specifaĵojn. Ĉe multaj okcidentanoj mi daŭre trovas la imagon, ke morgaŭ ni vivos en unuiĝinta samŝanca Eŭropo. Tio estas iluzio! Samniveligi la misformitajn strukturojn, tio bezonas paciencon, se ĉio ne venu al ĥaoso.

Kiuj estas niaj specifaĵoj?

- La planekonomia pasinteco. Iom post iom la privatulprodukta parto kreskas, estas multaj eblecoj por entreprenaj kaj alternativaj projektoj.
- En niaj landoj estas sume la plej gravaj (grandaj) sekcioj de UEA resp. TEJO.
- En preskaŭ ĉiuj landoj ekzistas profesiaj burooj laŭ tradicie simila skemo.
- La sekcioj estas relative for de la TEJO-gvidorganoj (kaj de la TEJO-servoj).
- La "persontagaj interŝanĝoj", tipa praktiko, restos gravaj.

Mi pripensis, kiel nomi nian grupon, ĉar la titolo "socialisma" ne plu estas ebla. Same "orienteŭropa" ne trafas la kernon. Eĉ la lastan vesperon kun ruĝa (!) vino ni ne trovis ideon. Tial mi decidis, uzi sekve la nocion "Budapeŝta Grupo" (B.G.) por niaj sekcioj, en danka memoro al la invitintoj.

Sed plu pri kelkaj problemoj, al kiuj TEJO devas rapide (kaj tiu estas la problemo) adaptiĝi.

Merkataj sekvoj

La tradicie ekzistinta varodeficito (= aĉeto-tropotencialo) rapide inversiĝas. Certe estos pli bonaj kondiĉoj por importi ekz. librojn k.a. Tamen oni ne povos morgaŭ eksporti mil PIVojn al Ĉeĥoslovakio, ĉar la naciaj monunuoj diversgrade inflacias paralele kun prezoreformoj.

Grandskale okazas maldono de ĝisnunaj subvencioj. Tio povas havi severajn sekvojn por la financiĝo de

"Ĉiuj anoj de la B.G. ne sentas, ke la asocioj estas kompromititaj pro sia diversgrada ligiteco al ŝtato/socio/partio."

Esperantaj periodaĵoj, profesiaj esperantistoj, la sekurigo de la oficejoj ktp. Tiuj sekurigaj penoj aldone konsumas fortojn.

Multaj esperantistoj streĉe agas por organizi sian privatan pluekzistadon, ĉar ekzemple aperas senlaboreco. En GDR ekzemple senlaboruloj ĝis nun ne ricevas eĉ unu pfenigon por vivteni sin. Mi skribas tion por eviti iluziojn. Legante kelkajn gazetartikolojn mi pensas, ke tiurilate ekzistas malĝustaj imagoj. Tio ĉefe rilatas al Rumanio. Se rumanaj esperantistoj volas partopreni en junularaj renkontiĝoj, la B.G. petas ĉiujn junulojn plej eble rabatumi ilin.

Naciismo

Tiu problemo estas unu el la plej gravaj minacoj kontraŭ la paca progresado en niaj landoj. Dum jardekoj estis la celo samniveligi la land(er)ojn pli kaj malpli evoluintajn. Tio kondukis al naciismaj tensioj, kiuj nun atingis danĝeran punkton. Simplige dirite: la fortaj regionoj ne plu volas subvencii la malfortajn (Baltio, Kroatio). En Sovetunio danĝeras interpopolaj pogromoj kaj militoj!

En tia situacio la movado staras antaŭ disŝira pruviĝo. En Sovetunio mi spertis, ke la unuopaj movadoj parte jam ne plu eltenas kaj estas infektitaj de tiu spirita veneno, kiu blindigas la normalan pripenson. La unua danĝero estas, ke la movado en kelkaj landoj povas rompiĝi. La dua pli akuta kaj neriparebla: ke la movado historie fiaskos. Sed por kio ni praktikas nian lingvon, se ni ne almenaŭ povas doni pioniran ekzemplon? La movado estas tro malforta por vere havi influon, sed, se ni povas gardi nin mem puraj, ni almenaŭ plenumos la taskon, kiun la historio postulos de ni.

Ideologiaj problemoj

Iel vole aŭ ne Esperanto estas infano de la socialisma ideo. Mi scias, ke kelkaj nun pensas, ke tiu frenezulo (t.e. mi) foje ventumu siajn cerborestojn. Sed fakte: ni travivas la evidentiĝon, ke fiaskis projekto, samŝance kaj plane evoluigi la homan socion. Kelkfoje mi rimarkis, ke Esperanton trafas preskaŭ instinkta abomeno, kiel ĉiun, kiu ne estas pozitive kaj senteble produktiga por la socio, sed konsumas subvenciojn.

Ĉiuj anoj de la B.G. *ne* sentas, ke la asocioj estas kompromititaj pro sia diversgrada ligiteco al ŝtato/socio/partio. Tio estas pozitiva signo.

Vojaĝeblecoj

Por diri la veron: la libereco vojaĝi ĉien ajn estas la emo n-ro 1 por la sekvaj monatoj. La bezono pri junularturismaj ofertoj estas tiel granda, ke neniu povos tute kontentigi la merkaton. La turismo estos certe perspektive grandioza ŝanco por TEJO. Ankaŭ studvojaĝoj estos normalaĵo. Tiurilate indas organizi helpon. Samtempe certaj "kontaktprivilegioj" ne plu ekzistas, kiujn havis la Esperanto-asocioj. Tio ne estas troigo, ke por esperantistoj estis relative eta limigo, kiu rilatas al kontaktoj ktp. Pri la vojaĝoficejoj oftiĝas negativaj spertoj. Pro la granda bezono la prezoj grimpas al maldecaj pintoj. Ne ĉiam indas uzi la servojn de tiuj agentejoj, ĉar tiuj tre altigas la kostojn por la partoprenantoj. Ariĝas la dubindaj ekzemploj (Cubatour, Sputnik, ČEDOK por UK Prago postulos porkajn prezojn). La entrepreno "Jugendtourist" tiel ornamas la vojaĝon al la IJK Kubo, ke la prezo transpasas la limon de ĉiuj kompromisoj. Membroj de la B.G. multnombre vizitos renkontiĝojn, nur se ili

estos malmultekostaj. Kutime ili fajfas pri ĉiu komforto por la eblo trovi amikojn. Modela ekzemplo estas la solvoj de GEJ dum la IS en Neumünster.

La vorto "netranspagipova" certe baldaŭ malaperos el la gazetaro. Jam nun en kelkaj landoj eblas teni devizokontojn kaj ĝiri eksterlanden kaj reen laŭ deziro. La resto estas nur demando de la tempo. Pro la prezoreformoj estas parte grandaj prezodiferencoj por la samaj servoj aŭ artikoloj (ekz. preskostoj). Tion ni nepre devas uzi. La samo validas pri vojaĝ- kaj flugprezoj.

Tamen restas la persontagaj interŝanĝoj tre efika metodo por faciligi al B.G.-anoj la venon okcidenten.

Disfalo de la tutlandaj junularorganizoj

Kutima trajto estis la ekzisto de centr(ism)aj junularaj organizoj, kiuj kutime ricevis ĝis nun diversajn subvenciojn. La kunlaboro kun ili rezultigis jam por esperantistoj diversajn subtenojn.

Nun tiuj organizoj rapide disfalas kaj neniu simila anstataŭas ilin. Ĝenerale la solidareco de junuloj kiel identeco regresas kaj perspektive junularspecifaj frakcioj malaperas el la parlamentoj. La iamaj posedaĵoj disdoniĝas al unuaj ĝermoj de tegmentaj organizoj, kunordigaj centroj ktp. En GDR la Esperanto-junularo estas plenrajta membro de tiu korporacio kaj kunlaboras en ĝi. La oficejoj de tiuj organizoj estas en la ĉefurboj, kie la luprezoj por la konstruaĵoj plej forte altiĝos. Ili estas fakte bastionoj, kaj ni devas uzi ĉiun eblecon por sekurigi ilian pluekzistadon. Relative simplaj donacoj el okcidentaj landoj ekzemple povas rimarkeble finance senŝarĝigi la buroojn.

Disfalo de la ruslingva eduksistemo

La rusa lingvo, kiu estis deviga en ĉiuj niaj landoj, troviĝas en krizo. La historia provo, de supre determini pontolingvon, fiaskis same kaj restas admona ekzemplo. Kien ajn la lingva politiko turniĝos – la venkonto estas la angla. Se en unuiĝinta Eŭropo la angla kiel pontolingvo triumfos, la Esperanto-movado staras antaŭ nova realo, kiu havos sekvojn por la eŭropa movado, sed ankaŭ por la tuta strategio.

Torsten Bendias (Germana DR)

Torsten Bendias estas estrarano de TEJO kaj de ties sekcio en GDR.

Fondumo Zamenhof:

Ĉu la nova Pollando voĉdonos por Zamenhof? Raporto el la naskiĝurbo

Lando okupata de politika necerteco kaj ekonomiaj ŝanĝoj, Pollando ne prezentas facilan medion nunmomente por la disvastigo de la internacia lingvo. Pro severaj intervenoj de la registaro por igi entreprenojn profitigaj, kaj pro multobla inflacio tra la pasintaj kelkaj monatoj, la vivnivelo de la meza polo draste falis. Kvankam dum jaroj mankis en la vendejoj allogaj varoj kaj interesaj aĉetaĵoj, tiaj nun abundas, dank' al liberigo de la merkato kaj falo de la aĉetpovo.

Izolita sur sia granda ebenaĵo, ne malproksime de la litovaj kaj rusaj landlimoj, Bjalistoko serĉas ligojn kun la ekstera mondo.



En tiaj kondiĉoj, la civitanoj de Pollando havas aliajn aferojn ol Esperanton por okupi ilian atenton. Pola Esperanto-Asocio raportas pri granda malpliiĝo de la nombro de informpetoj pri Esperanto, falo en la nombro de personoj kiuj aliĝas al kursoj, kaj ĝenerala reduktiĝo en la agado je la loka nivelo en ĉiuj partoj de la lando. La Asocio ankaŭ baraktas kun falantaj enspezoj kaj suprenspiralo de kostoj, interalie de la lupago por ĝia bela nova oficejo en la centro de la urbo.

Dum en la malnova tempo de relativa stabileco oni povis atendi, ke la registaro subvenciu la agadon, aŭ morale subtenu tiun lingvon produktitan de la genio pollanda – kiel prezentis la aferon la polaj instancoj –, la epoko de subvencioj definitive finiĝis, kaj PEA, same kiel amaso da aliaj organizaĵoj kaj institucioj en Pollando, subite gratas la teron por ekvilibrigi la spezojn kaj elserĉi novajn monrimedojn.

En tiu nun pasinta epoko, diris lastatempe la eksa prezidanto de PEA kaj nuna vicprezidanto de UEA Roman Dobrzyński, multaj poloj sentis frustriĝon kaj fremdiĝon. Sub cirkonstancoj, kie pli da laboremo aŭ pli da sindediĉo al sia profesio ne alportis financan kompenson nek grandan psikan kontentigon, homoj turnis sian superfluan energion alidirekten – ofte al la Esperanto-movado.

Nun, laŭ s-ro Dobrzyński, la reapero de la profita motivo donas novajn kanalojn por tiu energio – ĉi-kaze ene de la ekonomia kaj politika sistemo. Kvankam tio reprezentas gajnon por Pollando, ĝi ne nepre reprezentas pluson por Esperanto.

La turniĝo for de Esperanto povus montriĝi portempa afero, kiu disipiĝos post kelkaj monatoj, aŭ ĝi povus esti definitiva en sia nuna formo. Kiel ajn, estas tute evidente, ke Pola Esperanto-Asocio devas trovi novajn metodojn por allogi homojn al Esperanto – kaj por fari tion ĝi bezonos monon kaj la

sindediĉon de siaj aktivuloj. Unu vojo al la gajno de mono estas turniĝo al la ekstera mondo. Pro la drasta falo en la valoro de la zloto kaj la eksterordinara kresko en la dolaro kaj aliaj okcidentaj valutoj (unuaklasa trajnbileto inter Varsovio kaj Bjalistoko kostas iomete pli ol unu dolaron kaj ĉefplado en luksa restoracio kostas du), PEA estas en bela pozicio liveri plej diversajn servojn al okcidentaj Esperanto-asocioj, eldonejoj ktp – kondiĉe ke tiuj servoj estas en la nuna stato de la lando realigeblaj entute.

Malpli da aventuremo

Ne estas surprize, ke, kiam la 22-an de aprilo la estraro de la Fondumo Zamenhof renkontiĝis en Bjalistoko por sia unu kunsido en kelkaj monatoj, ioma necerteco ŝvebis super la kolektivo. La Fondumo estis starigita en 1987, kun partopreno de UEA kaj ILEI, en la entuziasmo de la jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio. Ĝia celo estis nenio alia ol konstrui kulturan centron en la naskiĝurbo de Zamenhof, kiu rolu kiel renkontejo kaj lernejo de nova generacio de esperantistoj, tiel sekurigante la estontecon kaj malfermante orientan Eŭropon al tutmondaj influoj. La plano ĝuis la entuziasman subtenon de la lokaj instancoj kaj precipe de la prezidanto de la Pola Parlamento, s-ro Roman Malinowski, kies ideo ĝi estis.

"Ne estas surprize, ke, kiam la 22-an de aprilo la estraro de la Fondumo Zamenhof renkontiĝis en Bjalistoko, ioma necerteco ŝvebis super la kolektivo."

Hodiaŭ nova urbestro oficas en Bjalistoko kaj s-ro Malinowski ne plu deĵoras en Varsovio – viktimo de la interna politika lukto, kiu produktis la nunan malferman kaj multpartian polan politikon. La situacio de la rektoro de la bjalistoka filio de la Varsovia Universitato, plia subtenanto de la projekto, estas dubinda. La deziro observi kaj sekvi la esprimitajn preferojn de la bjalistokanoj igis la lokajn politikistojn iom atentemaj kaj malpli aventuremaj ol antaŭ du-tri jaroj.

Feliĉe la nova urbestro, s-ro Jerzy Czabaw, montriĝis konvinkita apoganto de la projekto. Li klare komprenas, ke tia centro, kiu povus logi vizitantojn al la urbo kaj kies seminarioj, konferencoj kaj kursoj povus alporti monon kaj prestiĝon, konsistigus netan pluson. Ĉe la universitato regas simila pozitiva sinteno: la projekto povus plifortigi la studadon de regiona historio kaj kulturo kaj meti Bjalistokon pli firme sur la polan intelektan mapon.

Intertempe, trans la urbo ĉe la Bjalistoka Politekniko, Akademio Internacia de la Sciencoj Sanmarino malfermis oficejon kun la beno de la rektoro kaj la dekanoj kaj anoncis planojn konstrui sidejon, kun kunvenejoj kaj tranoktejoj, sur parto de la tereno rezervita por la estonta centro. En kunsido de eksterlanda universitata delegacio kun la rektoro kaj liaj kolegoj, AIS prezentiĝis kiel normala kaj plenrajta parto de la Politeknika Fakaro.

Ĉio ĉi donis al la kunsido de la Fondumo, kiu normale devus okazi en almenaŭ iom sobra etoso, atmosferon iom optimisman. Tiun optimismon plifortigis la fakto, ke la pola registaro sukcesis konvinki Uneskon akcepti la projekton kiel oficialan projekton de la Jardeko por Kultura Evoluigo – decido, kiu malfermos pordojn al eventuala teknika kaj eĉ financa helpo de Unesko kaj donos al la Centro internacian atenton kaj renomon. D-ino Barbara Despiney, reprezentanto de UEA ĉe Unesko, klarigis al la kunsido la signifon de tiu atingo kaj en postaj tagoj en Varsovio renkontiĝis kun la vicministrino pri kulturo, Krystyna Marszałek-Młyńczyk, pola Unesko-reprezentanto, por plani estontan strategion.

Pro la diversaj politikaj ŝanĝoj en Pollando, la ĉeestantoj en la kunsido decidis nomi eksterlandan prezidanton de la Fondumo por la venonta kelkmonata periodo. Akceptante tiun taskon, d-ro Humphrey Tonkin, el Usono, emfazis, ke li okupos gvidan lokon nur ĝis pliklariĝo de la politika situacio ebligos nomigon de influhava polo al la prezidanteco. Li samtempe insistis, ke la Fondumo dediĉu pli da atento al okazigo de aranĝoj en Bjalistoko kaj al sia programo ĝenerale, gvidata de la nova direktoro de la Fondumo Jarosław Parzyszek, kiu profesie okupiĝas pri la Fondumo kiel dungito de la urbo. La estraro tamen decidis ankaŭ firmigi siajn konstruplanojn kaj komisiis s-ron Parzyszek kunlabori kun s-ro Józef Jaworski, prezidanto de la bjalistoka kultura asocio kaj estrarano de la Fondumo, por prezenti pli detalan planon al la urbaj instancoj. Tiu plano verŝajne ne inkluzivos grandan teatron, kies antaŭvidata konstruo dekomence maltrankviligis la esperantistojn, kiuj timis, ke ili ne povos plenigi ĝin, kaj kiu en la nuna stato de la pola ekonomio estas konsiderata nerealisma.

La estraro de la Fondumo planas renkontiĝi denove ĉi-aŭtune, por taksi ĝistiaman progreson kaj por rekonsistigi sin en la postelekta periodo.

Humphrey Tonkin (Usono)

Pli optimismaj tagoj: s-ro Malinowski (tiam la parlamenta prezidanto), radio-redaktoro kaj nuna PEA-prezidanto Andrzej Pettyn, kaj d-ro Tonkin interŝanĝas salutojn ĉe la Jubilea UK en Varsovio.

Reagoj

Paradizo? Ne ĉi tie!

En unu monato komence de ĉi tiu jaro ni ricevis tri leterojn de Alĝerio, kvar el Hungario kaj unu el Ĉeĥoslovakio, ĉiuj kun la peto havi de ni invitleteron al Kanado.

Ĉu vi scias, kion tio signifas por ni? Ĉiu invito donus al ni respondecon okupiĝi pri la invitito post ties alveno Kanaden. Eble tio ŝajnas esti nur formalaĵo. Ankaŭ tiel opiniis hungaro, kiu alvenis fine de februaro. Li gastis ĉe ni, ĉar li simple ne havis lokon kaj kiam estas minus 20 gradoj, estas iom malvarme dormi ekstere. Li petis de ni, ke ni helpu al li trovi laboron por povi pagi ŝuldojn. Li volas resti en Kanado nur dum kelkaj monatoj kaj poste reiri Hungarion. La problemo estas, ke turisto ne rajtas labori en Kanado. Se eventuale li trovus laboron, li estus pagata nigre, do tre malmulte. Vivi en Kanado ne signifas plenan liberecon. Kiu pagus la kostojn, se li malsaniĝus? Krome, la vivkostoj estas altaj en Kanado kaj neniel li povus riĉiĝi en mallonga periodo. Alveninte li dankis, ke ni helpas lin, kaj diris ke "esperantistoj estas unu granda familio". Bele, sed ne eblas senlime helpi ĉiujn.

Per ĉi tiu letero ni petas esperantistojn disvastigi la informon: Kanado ne estas paradizo. Restu en via lando, ĉar almenaŭ tie vi ne frontas la lingvan problemon kaj izolitecon. Certe pli agrablas vivi malriĉe kun familio kaj amikoj ol, almenaŭ komence en Kanado, malriĉe sen familio kaj sen amikoj.

Zdravka Metz (Kanado)

Odorheiu Secuiesc (H)?

Sur p. 68 de la marta numero aperis anonceto de Kornelia Nagy el Rumanio, kaj mi tre ĝojas konstati ke ŝi estas ankoraŭ aktiva, kaj en la E-movado kaj en sporto.

Sed se al leganto de la koncerna artikolo venus en la kapon la ideo serĉi sur la mapo de Rumanio la urbon Szekelyudvarhely, tiu neniam trovus ĝin. Se leteroj al tiu urbo revenos kun la surskriboj "Neekzistanta urbo" aŭ "Neekzistanta adreso", oni ne miru. Pro kialoj ne menciindaj ĉi tie, s-ino Nagy hungarigis sian tutan adreson, sen konsideri la fakton ke malmultaj poŝtistoj en Rumanio parolas la hungaran, kaj la plejparto ne penos (aŭ ne volos) atenti la indikitan poŝtkodon (cetere, la aŭto- kaj poŝt-indiko de Rumanio estas RO). Ankaŭ la leganton de la anonceto s-ino Nagy neglektis, ne pensante pri ties malpovo malkovri ŝian urbon sur la mapo de Rumanio.

Mi esperas, ke post nelonge la sama anonceto aperos kun la korekta kaj oficiala adreso en la rumana lingvo.

Ionel Onet (Usono)

Sendanka senpacienco

Mi skribas al vi sekve de la konsterniga artikolo de István Ertl en la marta numero. Estas ja konsternige, ke esperantistaj aktivuloj, sen provi diskuti la internajn problemojn de la landa movado kun la estraro, eĉ provizora, lanĉas en internacia revuo insidajn aludojn, eĉ rektajn atakojn kontraŭ ĝi; ke tiu prestiĝa revuo donas lokon al tiaj akuzoj sen aŭskulti ankaŭ la alian flankon.

En la julia-aŭgusta numero oni daŭrigos la diskuton pri la esperantigo de propraj nomoj kaj la Esperanta fonologio, kun kontribuoj de i.a. Yamasaki Seikô, Eskil Svane, Andreo Ŝalamon, M. E. Samanipur kaj Rikardo Ŝulco.

Grupeto da bukarestaj esperantistoj konsideris kaj konsideras, ke nia plej urĝa kaj la plej grava tasko en la novaj kondiĉoj estas refondo de Rumana Esperanto-Asocio, eĉ se, pro kialoj ne sufiĉe klaraj al ni, iuj – eĉ profesoro Bociort mem! – unue tion malkonsilis al ni. . . . Eĉ en la novaj kondiĉoj estus utopio kredi, ke landa asocio povas fondiĝi kun alia centro ol Bukareŝto. . . . La prezidanteco de prof. Bociort sekvis tute nature de lia agnosko kiel unu el la plej agemaj kaj tutcerte la plej prestiĝa esperantisto de nia lando. La ceteraj anoj de la provizora estraro estas bukareŝtaj ĉefe pro la malpacienco kun kiu ni rapidis iniciati la oficialigon, domaĝante la tempon bezonatan por havigi subskribojn el la provinco. Cetere, ni konsideras nin pli agadgrupo, ol estraro, kiu ne "celas ofici", kiel asertas Ertl, sed kiu surprenis la nemalmultan kaj ne ĉiam glatan organizan laboron.

Fidele al la zamenhofaj principoj, la iniciatintoj de REA ne konsideras sin posedantoj de Esperanto en Rumanio: ĉiu esperantisto aŭ grupo rajtas aliĝi aŭ ne al la asocio; ni ne havas, kaj eĉ ne deziras havigi al ni rimedojn per kiuj ni minacus la "sendependecon" de kiu ajn. . . . Sed kio plej perpleksis min estas la jena frazo: ". . . plus eventuala kompromititeco de kelkaj, kiuj nun povos strebi al gvidado de la movado . . ."; malofte mi havis la okazon legi pli aĉan klaĉon, kiu ĵetas koton sur tiujn, kiuj klopodis por la refondo de REA, kaj sur ties ankoraŭ neelektitajn gvidontojn. . . . Tiu frazo estis la lasta guto, kiu decidigis min rezigni ĉiujn funkciojn en Rumana Esperanto-Asocio.

Mi kaptas la okazon danki al tiuj germanaj amikoj, kiuj sendis al mi kelke da esperantistaj revuoj. Mi ne povis danki rekte al ili, ĉar ili ne indikis sian adreson. Al ili, kaj ankaŭ al aliaj amikoj, mi volas deklari, ke malgraŭ la inundo de petegoj en la gazetaro, ni ne estas almozuloj. Certe, via helpo estas bonvena; sed ne ĵetu ĝin kiel almozon en la ĉapelon de stratangula blinda muzikanto; ricevante sendaĵon, ni volus kvitanci ĝin almenaŭ per poŝtkarto; ne tiel, kiel faris *Budapeŝta informilo*, kiu ne konfirmis la ricevon de mia letero, el kiu ĝi citis frazon en sia kvina numero (kiun mi ricevis pere de la germana sendaĵo). Tiu letero enhavis mian tradukon de hungara poemo, super kiu mi laboris preskaŭ du jarojn, kaj kiun en la lastaj tri jaroj mi ekspedis kvarfoje al ili, sen ian ajn signon ricevi. Kelkfoje mi sentas min kiel ŝiprompulo perdita en la oceano, kiu ĵetadas en la ondojn siajn enboteligitajn helpkriojn. Jen, flosas la lasta . . .

Cetere, unu el la ĉefaj ideoj de la poemo estas, ke:

Ne tio gravas, ke parencoj,
sed, ke homfratoj loĝas sur la tero.

Je tio, mi kredas, ni povas konsenti.

Jozefo Nagy (Rumanio)

Noto de la redaktoro: Dum ni bedaŭras la ĉagrenon, kiun la artikolo de Ertl kaŭzis al s-ro Nagy, ni substrekas ke ĝi redonis la personajn opiniojn de tiuj esperantistoj, kun kiuj li parolis. En la rumana kunteksto tiuj opinioj estas kompreneblaj, eĉ se oni mem ne dividas ilin. Kompreneble, ni deziras al REA aktivan rolon en la estonta rumana movado.

Cetere, kelkaj tro specifaj personaj akuzoj en la letero de s-ro Nagy estas forredaktitaj.

Recenzoj



El la latina, entuziasmige

Atlaso de insekta morfologio. Esperanta-latina-ĉina. H. Steinmann kaj L. Zombori, en la ĉinan kaj Esperanton trad. Li Kexi. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 454p. ISBN 7-5052-0000-3. 20cm. Bind. Prezo: 31,20 gld.

La manko de abunda faka literaturo estas certe unu el la plej gravaj problemoj por la disvastigado de Esperanto. La nuna stato de nia naturscienca literaturo povas esti taksita per la Esperanto-katalogo 1988/89, en kiu oni trovas ekzemple sub la rubriko "Fiziko" (p. 277) nur unu titolon!

Pro tio, la pionira laboro de la fakaj Esperantaj verkistoj akiras specialan gravecon kaj proprajn malfacilaĵojn. Ili devas zorgeme elekti la temon, la profundecon kaj la amplekson de la verkota aŭ tradukota teksto, tiel ke la faka Esperanta literaturo riĉiĝas pere de verko, kiu estas samtempe baza, utila kaj dum longa tempo aktuala.

Tiuj aspektoj estis konsideratataj de la ĉina entomologo inĝ. Li Kexi, kiu elektis por tradukado kaj adaptado verkon bazan, kompletan kaj utilan pri la morfologio de la insektoj. *Atlaso de insekta morfologio* de la entomologoj H. Steinmann kaj L. Zombori (Budapeŝto 1981) havas tre simplan strukturon. Per 757 figuroj el la entomologia literaturo estas ilustrataj centoj da eksteraj karakterizaĵoj de la korpo de insektoj. Flanke de la originalaj latinaj nomoj de la morfologiaj strukturoj, Li Kexi aldonis la ĉinan kaj la Esperantan tradukojn. La Atlaso estas facile uzebla. Ĝi povas rapide solvi dubojn pere de la figuroj aŭ indeksoj. Ĝi povas esti uzata ankaŭ por la instruado de komencanto en entomologiaj aferoj. Sendube ĝi estas fidinda referenca fonto, kiu okupos specialan lokon sur la librobreto de la entomologoj, ĉu profesiaj, ĉu amatoraj.

Por ni esperantistoj kelkaj aspektoj meritas specialan konsideron. Estas entuziasmige, vidi flanke de la antikva latina terminaro, uzita de la pioniroj de la entomologiaj studoj, la samvaloran Esperantan terminaron. Oni konstatas, ke la forlaso de la latina sistematiko kreis babelan situacion. Okaze de mia studado de la neotropikaj mantaj genroj, temo de mia doktoriĝa tezo, mi legis priskribojn de tiuj insektoj en la franca, angla, germana, itala kaj portugala (mia gepatra lingvo), krom en la latina. Esperanto estas certe definitiva solvo por tiu problemo. La fakterminaro proponita de Li Kexi ebligos apliki ĝin fidinde en la entomologia fako por tiu celo. Ja ekzistas bonegaj kaj imitindaj kontribuoj de niaj ĉinaj samideanoj. La ĉina faka revuo *Entomotaxonomia*, eldonata ekde 1981, dediĉita al la sistematika entomologio, uzas Esperanton kune kun la ĉina kaj la angla.

Kiel aldona kvalito de la Atlaso estas menciinda la antaŭparolo de d-ro C. Støp-Bowitz, zoologo kaj akademiano, kiu bonege analizas la kontribuon de Li Kexi por la necesa kaj urĝa transiro de la antikva latina terminaro al la Esperanta terminologio.

Paulo S. Terra (Brazilo)

Impona laborego

Fervoja terminaro en Esperanto. Suplemento al 6-lingva *Lexique Général des termes ferroviaires* (Chur: UIC, 1988). Ĉefred. Gernot Ritterspach, Heinz Dieter Hartig. FR Germanio: Terminara Komisiono de IFEF, 1989. 227p. 21cm. Prezo: 15,30 gld.

Notu bone la du imponaĵojn: la teruran ampleksegon (10 205 terminoj!), kaj la ekstreme mallongan aper-periodon post apero de la originalo. Kiu iam terminare laboris kaj spertis multjaran klopodon de multaj kolegoj, tiu nun surdorse sentas frostotremon. Kaj kiam ni trovas, ke la manuskripto estis nete preta jam ĉe apero de la originalo, oni ne plu ion komprenas kaj nur admiras la aŭtorojn.

Iom pri la historio. La Terminara Komisiono de IFEF formiĝis en 1950. Ĝiaj 15 membroj starigis al si ambician planon – esperantigi ampleksan modelan terminaron. Ili elektis vice kvar model-terminarojn de UIC (Internacia Fervoj-Unio), kiu aktualigis sian oficialan eldonon en 1957, 1965 kaj 1975. Sed la komisiono ne havis la fortojn por tiel rapide kunordigi kaj progresigi diverslandajn aktivaĵojn. En 1976 la komisiono ekuzis sian informilon *Terminara kuriero* kaj utiligis grandkapacitan komputilon. Tiel do okazis ĉe la lasta UIC-eldono paralela laboro de la IFEF-komisiono kun la UIC-komisiono, kaj la Esperanto-versio povis aperi samtempe kun la apero de la oficiala UIC-eldono. Ĝi ja estas admirinda verko, rezulto de konstanta plurdekjara faka laboro de niaj fervojistoj.

La terminaro konsistas el alfabeta listo de 10 205 francaj terminoj (plus 5 alilingvaj ekvivalentoj), sen difinoj. Do, kontraste al modernaj sistemaj difin-terminaroj, la verko ne estas sisteme aranĝita. Sed tiu negativa trajto estas kulpo ne de IFEF, sed de UIC, kiu ja plurfoje aktualigis sian malnove konceptitan terminaron el la 50-aj jaroj. Tamen en la lasta eldono, kiun la IFEF-komisiono fidele sekvas, troviĝas ĉe ĉiu termino unu el 25 "fakaj kodnumeroj" (ekz. 00 ĝeneralaĵoj, 01 tekniko ĝenerale, 10 komercaj demandoj, . . . 31 trakciiloj, . . . 50 juraj demandoj . . .), kiuj jam montras al diversaj fervojaj subfakoj. Jen kerno de sistemeco.

Taksante la prezenton kaj lingvan nivelon de la Fervoja Terminaro, mi devas konstati unuvorte: bonegaj. Ĝi eĉ prezentas plian kvaliton, frukton de multjara profunda faka prikonsidero: en ĝi estas unuigitaj 1940 sinonimoj, kiuj troviĝas en la franca versio kiel lingva balasto.

Nur ie tie troviĝas eble tro longaj kunmetaĵoj, ekz. "Relarkokorekto per korpomezuro", aŭ "Mezuro por ŝpalbortruoj" k.s., kiuj al slav-lingvanoj, eĉ se en Esperanto jam fake trejnitaj, ŝajnas nenature pezaj kaj netravideblaj. Eble ne nur al slavoj. Ĉi-punkte helpus kelkaj lig-strekoj: relarko-korekto per korpo-mezuro, ŝpalbor-truoj ktp.

La Terminara Komisiono de IFEF plu laboras, malgraŭ tio, ke neniu nova UIC-eldono prepariĝas. Ĝi aliĝis al Terminologia Esperanto-Centro (TEC), kaj fariĝinte ĝia Terminografia Komisiono por Fervojo sistemigas kaj difinas la nociojn de la fervoj-fako. En tio ĝi sekvas la modernajn terminologiajn principojn, kiel ilin prezentas TEC (en kunlaboro kun ISO, Infoterm kaj TermNet). Laŭ tiuj, la terminaroj estu:

- en kongruo kun ekzistantaj terminaraj ISO-normoj kaj aliaj internaciaj normo-verkoj (kongrueco de nocioj);
- sisteme aranĝitaj (t.e. laŭ la subfakoj, kaj interne laŭ evoluo de pli ĝeneralaj nocioj al pli konkretaj);
- kun difinoj;
- kun alilingvaj ekvivalentoj de la terminoj (TEC emfazas la anglan, francan, rusan, germanan kaj hispanan).

Jan Pospišil (Ĉeĥoslovakio)

La blankkola longvosta fazano

Ĉiam konsulti fakulojn

Ĉinaj protektataj bestoj. Ĉefred.: Ĉen Ŝjaŭji. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 353p. 20cm. Prezo: 10,50 gld.

La antaŭparolo diras: "En Ĉinio troveblas pli ol dekono de la bestaj specoj de la mondo, inter kiuj multaj estas raraj specoj fame konataj tra la mondo . . ." Eble plej fame konata estas la granda pando, pri kiu raportas la amasmedioj ĉiufoje, kiam grandaj zoologiaj ĝardenoj iniciatas klopodojn por savi ĝin de pereo. Tia granda vario de bestoj estas valora natura riĉaĵo de la lando, kaj protekti la diversajn bestojn, savi ilin de pereo, estas esence grave por la ekologia ekvilibro sur nia planedo kaj por riĉigo de la kulturo. Estas salutinda iniciato prezenti al la internacia publiko 176 bestojn, kiujn la aŭtoritatoj decidis protekti.

La libro prezentas nur vertebrulojn, precipe grandajn mamulojn, diversajn birdojn, kaj kelkajn malmultajn reptiliojn, amfibiojn kaj fiŝojn. Ĝi tute neglektas insektojn kaj ĉiajn aliajn senvertebrulojn, kvankam lastatempe oni komencas atenti, ke ankaŭ multaj specioj el ĉi tiuj bestgrupoj meritas kaj bezonas protekton.

La bestoj pritraktataj estas dividitaj en du grupojn: da "unuaklasaj protektataj bestoj" aperas 85 "specoj", da "duaklasaj protektataj bestoj" 91. Ĉiu "speco" ricevis du paĝojn, la maldekstran plenigas priskribo, la dekstran ilustraĵo de la besto en ĝia natura medio. La ilustraĵoj estas simplaj desegnaĵoj nigra-blankaj pri muzeaj ekzempleroj, grandparte tute trafaj. La tekstoj estas koncizaj, iom sekaj priskriboj de la bestoj kaj ilia vivo, la lingvaĵo grandparte bona, kiel kutime en la publikigaĵoj de Ĉina Esperanto-Eldonejo, kaj preseraron mi apenaŭ rimarkis.

La verkintoj evidente zorge trastudis PIV-on por trovi nomojn de la bestoj, sed ŝajnas, ke ili ne estas zoologoj. Oni ne povas arbitre formi nomon de familio, se oni ne scias al kiu familio la besto apartenas. Ekzemple, la pando apartenas al la familio de Procionedoj; "pandedoj" ne ekzistas. Kelkfoje oni eĉ konservis la latinan familian sufikson, aldonante la Esperantan: kotidedoj anstataŭ Ĉotedoj. La arbosoriko ne estas vera soriko kaj apartenas al la familio de Tupajedoj, ne Sorikedoj. La fokoj apartenas al la familio de Fokedoj, dum Fokuloj estas la nomo de ordo. La gruoj apartenas al la familio de Gruedoj, ne al Cikoniedoj. Kelkfoje oni modele utiligis la fonton de vaste uzataj nacilingvaj nomoj: takino, serovo, goralo, alifoje ne: presbito (languro), akvocervo (sambaro), sovaĝazeno (kulano). La zamenhofa albatroso fariĝis albatro. "Resta mevo" estas nekomprenebla, devus esti relikta mevo. Papagoj ĝenerale ekhavis la duban genronomon konuro, la larĝvosta papago estas identigita per la triba nomo *Platycarcini*. La spadsturgo nomiĝis elefantfiŝo, kio estas nomo de tute alia fiŝo. Laŭ la Fundamento tetrao bedaŭrinde ne respondas al la latina *Tatrao*, sed al la bonazio. Kelkloke oni facilanime formis nomon el latina specia epiteto, kiu troviĝas en multaj genroj, tiel ke neniu povas scii, kiun animalon la nomo celas, ekz. fasciato el latina *fasciatus*, kiu signifas nur ĉirkaŭvolvita, falcipeniso, el lat. *falcipennis* = falĉilpluma, parvirostrisa el lat. *parvirostris* = mallongbeka; kaj mutuso estas sensenca nomo de la birdo simple nomebla muta lagopo.

Tamen, ĉi tiuj malfeliĉaj nomoj, kaj mi ne menciis ĉiujn, estas bagateloj, kiuj montras, ke kiam temas pri fakaj libroj, oni ĉiam konsultu fakulojn. La libro enhavas amason da valoraj informoj, kaj mi ne hezitas rekomendi ĝin al ĉiu, kiu interesiĝas pri bestoj sur nia planedo.

C. Støp-Bowitz (Norvegio)

Ter-tema tertremo

Geologia vortaro. Red. Tom Arbo Høeg. Oslo: Universitetsbiblioteket, 1989. 117p. ISBN 87-7000-150-3. 24cm. Prezo: 43,20 gld.

Pro ĝentileco de la redaktoro de ĉi tiu revuo venis en miajn manojn la supre menciita fakvortaro por recenzi (kritiki?). Kutime recenzistoj tuj komencas kritiki la enhavon, kribri la vortojn por trovi (pres)erarojn kaj finfine opinii, ke la aŭtoro povus esti farinta pli bonan laboron. Kaj nun mi? Mi ne sukcesis fari tion. Plurfoja tralegado pli kaj pli konvinkis min, ke la verko estas perfekta. Laŭ la antaŭparolo de la aŭtoro, la celo de la vortaro estas registri la geologiajn terminojn el la jam publikigita faka kaj popularscienca literaturo pri la temo. Tiun celon li trafis, precipe ankaŭ ĉar la geologiaj fakartikoloj, antaŭ sia publikigo, jam pasas tra faka kaj lingva revizio de la koncerna komunumo. La aŭtoro nur listigis tiujn terminojn, difinis ilin kaj donis ekzemplojn. Vere grandioza kaj temporaba laboro, pro kiu ni gratulas.

Ĉar ĉi tiu geologia vortaro celas ankaŭ esti prepara listo por estonta geologia vortaro en Esperanto, mi invitas la aŭtoron entrepreni tiun taskon. La geologia komunumo, kiu nepre devas posedi la nunan vortaron, estas je lia dispono por helpi en la preparado!

J. M. Mabesoone (Brazilo)

Ĝuo por la okuloj

Kuriozaj floroj kaj arboj en la provinco Yunnan, Ĉinio. Zhang Qitai, Feng Zhihou kaj Yang Zenghong. El la ĉina trad. Seimin. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 146p. 27cm. Bind. Prezo: 45,00 gld.

Ĉi tiu libro enhavas 1 mapon de la regiono kaj 131 paĝojn de belegaj kolorfotoj sur nigra fono, plejmulte tutpaĝaj. Ili bildigas pejzaĝojn, vegetaĵarojn, arbojn, florantajn plantojn, kaj estas ĝuo por la okuloj kaj interesaj por naturamantoj. La teksto ampleksas nur 6,5 paĝojn entute; ĝi priskribas la pejzaĝon, maloftajn plantojn, utilajn kaj dekoraciajn vegetalojn, donante interesajn informojn.

La lingvo estas bona (escepte unu frazon: besto trafas sagon, p. 26), eĉ tro bona, ĉar multaj legontoj devos plurfoje uzi PIV-on por trovi la signifon de maloftaj vortoj (ekz. apika, acerba, refraktara, dokta, punca), evitindaj por teni Esperanton simpla.

La uzo de la sciencaj (latin- kaj grekdevenaj) nomoj vekas nenian dubon pri ĝusteco; pri la uzo de la Esperantaj nomoj oni estu indulga, ĉar ja estas grandega laboro krei harmonian nomaron por la flaŭro de Yunnan. Kelkaj problemoj: foje la tradukinto uzis por specio la duan, specian nomon (same kiel faris Zamenhof kreante la nomon *frugilego* por speco de korvedo). Tiaj nomoj devenas de adjektivoj, kiuj povas aplikiĝi al aliaj organismoj: retikulato, makrokarpo, polifilo, fusko ktp. Tiuj ne taŭgas. Aliaj Esperantaj nomoj estas transskriboj de la scienca genra nomo (Parido, Eŭkomio, Miĉelio, Kodariokaliko ktp). Tiaj nomoj nur parte taŭgas, ĉar ili bezonas aldonan specian nomon. Estos tasko por postaj botanikistoj doni definitivajn nomojn en Esperanto.

La kvalito de la fotoj de la ses fotistoj estas ĝenerale tre alta. Ili donas konvinkan pruvon de la botanika riĉeco kaj graveco de la flaŭro de Yunnan.

G. F. Makkink (Nederlando)

Skoloj kaj soluloj, kiuj pensis alie

Antikvaj filozofoj de Ĉinio. Hoŭ Ĝjŭeljang. El la ĉina trad. diversaj. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 224p. Prezo: 12,00 gld.

Jen leginda kaj anekdotplena libro pri la ĉina filozofio ekde ĝia komenco ĝis la 17-a jarcento. Ĝi naskiĝis en la periodo, kiun la germana filozofo Karl Jaspers nomis la "aksepoko" de la homaro, ĉirkaŭ la 6-a jarcento a.K., kiam vivis ankaŭ la unuaj filozofoj en Grekio kaj Hindio. Du grandaj pioniroj, Konfuzio (551-479 a.K.) kaj la preskaŭ samtempa Laŭzio (la libro esperantigas sep el la multaj nomoj) montris la du vojojn, laŭ kiuj evoluis la ĉina pensado.

Konfuzio, humanisto kaj instruisto de privata lernejo, predikis sociajn virtojn: oni respektu la gepatrojn kaj regantojn kaj kondutu filantrope. Laŭzio fidis ne la socion, sed la naturon, kaj kelkfoje li sonas kiel nuntempa "verdulo". Laŭ li, la baza realo "Tao" (nuntempe oni literumas "Dao") ekzistas ekster tempo kaj spaco. La realo havas du aspektojn: *Jang*, aktiva, "vira", kaj *Jin*, pasiva, "ina", kiuj devas esti en ekvilibro. Nuntempaj fizikistoj trovis paralelojn inter tiu baze mistika filozofio kaj la nuna atomfiziko, kiel en la verko *The Tao of Physics*, "La Tao de la fiziko", de la usonano Fridjof Capra.

La ĉina pensado ĝenerale estas monisma kaj pacama, kvankam tiu pacamo malmulte influis la ĉinan historion. Mankas en ĝi glorigado de la milito. Mankas ankaŭ la kartezia dualismo inter menso kaj materio, kiun deknaŭajarcentaj eŭropaj pensuloj provis solvi neante la gravecon aŭ eĉ ekziston de la materio (ideistoj) aŭ de la menso (materiistoj). La pasintjarcenta fiziko, kiu kontraste al la nuna kredis je solida materio, ŝajnis favori materiismon. Por Hoŭ "materiisma" signifas "bona", ekzemple Mozio (5-a jarcento a.K.) ne kredis je la sorto, do "brilas je primitiva materiismo".

Ĝenerale laŭ ĉinaj pensuloj la homnaturo estas bona, sed estas esceptoj: Ŝjunzio kredis je "aĉa homnaturo". Same kiel en la Okcidento ne mankis varieco; ekzistis skoloj kaj solaj pensuloj. Venis neokonfuzianismo; ĝi oficialiĝis kaj, kiel ŝtatideologioj ĝenerale, efikis konservative. Sed la ideoj de antikvaj pensuloj gravas en si mem, ne nur pro tio ke ili antaŭdiras hodiaŭajn tendencojn, kiuj mem baldaŭ estos pasintaj.

Albert Goodheir (Skotlando)

Pri la zamenhofa dialekto

Zamenhofa ekzemplaro. Esprimoj cititaj el la ĉefaj verkoj de D-ro L. L. Zamenhof. Kompilis Rihej Nomura. Nagoya: Nagoya Esperanto-Centro, 1989. 21+512p. 25cm. Bind. Prezo: 129,00 gld.

Vortaroj de Esperanto multe diferencas de vortaroj nacilingvaj. Se oni malfermas, ekzemple, vortaron anglan, oni trovas tie vortojn vere uzatajn (ofte aŭ malofte) en la lingvo. Pro tio ĉiu vortara ero estas samtempe teksta ero, t.e., principe, ĉio renkontata en la vortaro estis iam ĉerpita el la teksto.

Sed se mi trovas iun vorton en Esperanta vortaro, tio neniel garantias ke

"Oni devas distingi inter la realaj vortoj kaj potencialaj vortoj ... ankaŭ en la vortprovizo zamenhofa."

la vorto vere ekzistas en la lingvo kaj estas trovebla en tekstoj. En multaj kazoj la parolantoj tute ne uzas vortojn entenatajn en la vortaroj. Oni do devas distingi inter la *realaj* vortoj (kiuj estas registreblaj en la vortaroj kaj ankaŭ troveblaj en tekstoj) kaj *potencialaj* vortoj (kiujn proponis vortaristoj sed kiujn ankoraŭ ne akceptis la parolantoj).

Sama diferenco ekzistas ankaŭ en la vortprovizo zamenhofa, kaj tion bonege pruvas la ĵus aperinta *Zamenhofa ekzemplaro* de Rihej Nomura. La aŭtoro kun neimagebla zorgemo dum 50 jaroj kolektis ekzemplojn de la vera zamenhofa uzado, kaj nun ni havas verkon, kiu vere meritas esperantologiajn laŭrojn.

En seriozaj Esperanto-vortaroj, kiel ekzemple PIV, oni markas per la signeto [Z] zamenhofajn vortojn. Sed la nura atesto pri zamenhofeco neniel sufiĉas: inter potencialaj zamenhofaĵoj (vortoj, proponitaj de li en diversaj vortaroj) kaj realaj zamenhofaĵoj (uzitaj de li en la propra lingvaĵo, do efektive elprovitaj) troviĝas granda distanco, foje eĉ abismo, kiel kutime

inter teorio kaj praktiko.

Ni citu ekzemple du seriojn de vortoj kun la komenco ba-: 1) babili, bagatelo, baki, balo, balai, balanci, balbuti, baldaŭ, balustrado . . . , kaj 2) bajoneto, baldakeno, baleno, bambuo, barbiro, barĉo, barko, barometro, bastiono . . . Ĉiuj tiuj vortoj estas fundamentaj, do ankaŭ certe zamenhofaj. Tamen nur tiuj de la unua serio renkonteblas en zamenhofaj tekstoj. La vortoj de la dua serio do konsistigas nur potencialan parton de la zamenhofa vort-provizo. Kaj tia potencialeco estas ofte heredata de aliaj parolantoj. Mi, ekzemple, neniam vidis aŭ aŭdis iun esperantiston skribi aŭ diri la vorton "barbiro", kvankam ĝi konvenus al iu strikte literatura verko (*La barbiro de Sevilo*).

La zamenhofa kolekto de Rihej Nomura estas do grava paŝo en la realeca prezento de Esperanto. Ĝi krome donas varian elekton de diverstilaj esprimoj, kiujn kun profito povas ekkoni ĉiu esperantisto.

Tamen, bedaŭrinde, la publikigita kolekto ne malhavas mankojn: komparante ĝin kun, ekzemple, PIV, oni konstatas la ekziston de zamenhofaj vortoj, kiuj estas renkonteblaj en la tekstoj de Zamenhof, tamen ne ricevis priskribon ĉe Nomura. Tio estas sentebla malavantaĝo, ĉar, kiel prave diras la aŭtoro mem, "la karaktero de tiu ĉi Ekzemplaro ne permesas eĉ unu erareton", des malpli la mankon de zamenhofaj tekstvortoj. Tiun nekompletecon kaŭzis brulego en la domo de la aŭtoro kaj la perdo de multaj jam pretaj slipoj. Do certe restas taskoj por postaj esploroj kaj esploristoj.

Sergej Kuznecov (Sovetunio)

"Mi scias, ke en plej alta grado ni forĝas nian sorton." Prezidento Kekkonen strebis larĝigi kaj firmigi la decidopovon de sia lando.

Kiel resti bonaj najbaroj

La finna vojo. Urho Kekkonen. El la finna trad. Osmo Buller. Budapest: Oy Mendoservo Ak, 1989. 109p. 18cm. Prezo: 24,30 gld.

Jen libreto, kiu faras utilan kontribuon al kompreno de la internacia sinteno de interesa kaj grava lando.

Ekde 1940, kiel diplomato, mi devis scii ion pri la eksterlanda politiko de Finnlando, heroa batalanto kontraŭ la agreso de la Sovetunio de Stalin, poste, bedaŭrinde, alianculo de la Germana Imperio de Hitler. Post la Dua Mondmilito en Unuiĝintaj Nacioj kaj en diversaj ĉefurboj mi konatiĝis kun reprezentantoj de Finnlando kaj lernis iom pri ĉi ties aparta politiko de neŭtraleco. Ofte Aŭstralio subtenis iniciaton de Nordio kaj inverse.

Se estus tiam havebla verko kia *La finna vojo* mi estintus multe pli bone informita. Ĝi estas la postmorta referato de Urho Kekkonen (1900-1986), kvinfoja prezidento. En la unuaj tri ĉapitroj li priskribas la principojn de nacia sekureco, la faktojn geografiajn kaj politikajn de la finna-sovetia najbareco, kaj la traktaton pri amikeco, kunlaboro kaj interhelpo inter Finnlando kaj Sovetio de 1948. La sekvantaj tri ĉapitroj diskutas la rolon de Finnlando kiel nordia kaj eŭropa lando kaj kiel membro de la monda komunumo. La finaj ĉapitroj analizas la rilatojn inter Finnlando kaj la evolulandoj, la komercan politikon, la eksteran politikon kaj popolopinion, kaj la politikon de neŭtraleco.

Jam aperis en Esperanto multaj paroladoj de famaj politikistoj, mallongaj priskriboj de eksteraj rilatoj en broŝuroj de ĝenerala informaĵo, kaj eseoj pri specialaj internaciaj problemoj. Ĉi tiu estas unu el manpleno verkita de personoj, kiuj mem partoprenis dum longa periodo en la formado kaj administrado de la tuteco de la ekstera politiko de sia lando. Kekkonen estis ĉefministro en 1950-56 kaj prezidento en 1956-82.

Kekkonen supozas, ke la leganto konas resume la historion de la regiono. Malgraŭ mia profesio, mi devis, de tempo al tempo, serĉi la fonon de nordia historio el aliaj fontoj. Kelkfoje mi sentis ankaŭ, ke Kekkonen povintus pli taŭge specife citi okazaĵojn, pri kiuj li, diplomatie aŭ neŭtrale, nur aludas. Sed plejparte la argumentado estas klara kaj logika, eĉ se ne ĉiam persvada.

Unu manko estas komparoj kun aliaj specoj de neŭtraleco. Mi mem spertis la politikojn de Svislando, de Aŭstrio kaj de Kamboĝo (inter 1968 kaj 1970). Espereble *La finna vojo* stimulos tiajn komparojn, ĉar, eĉ se la alfrontado de la superpotencoj ekmalaperas, daŭros tiklaj problemoj inter najbaroj, el kiuj unu devas resti neŭtrala. Ekzemple, ĉu reunuigita Germanio povos resti membro de la Alianco de la Nordatlantika Traktato? Se jes, sub kiaj kondiĉoj?

La verko estas spicita per proverboj kaj kvazaŭproverbaj esprimoj ("Neniu alia blovas sur nian supkuleron") kaj citaĵoj de Talleyrand ("En niaj tagoj ĉiuj politikaj eraroj estas danĝeraj"), Dag Hammarskjöld, Bismarck kaj aliaj. La lingvo de la traduko estas klara, kaj Osmo Buller evidente penis sekvi la modelojn kaj konsilon de internaciaj juristoj, ekzemple la Ĉarton de Unuiĝintaj Nacioj. Aparte utila por juristoj estas la teksto de la traktato de 1948, kiu nepre aperu en la eldonota kolekto de dokumentoj pri internacia kunlaborado.

Ralph Harry (Aŭstralio)

Laste aperis...



Amikeca Reto 90-91. Socivojaĝa servo de SAT. Parizo: SAT, 1990. 110p. 21cm. 268 adresoj en 33 landoj, kie esperàntistoj povas trovi nekutiman gastigadon laŭ la fako, interesoj, viziteblecoj ktp. 10,20 gld.

Baza Esperanto-lernolibro. Esperanto-urdu reader. Muztar Abbasi. Lahore: Maktaba-Al-Quraish, 1984. 176p. 18cm. Glositaj eltirajoj el la Ekzercaro. 9,90 gld.

Baza vortaro de Esperanto-urdu/urdu-Esperanto. Muztar Abbasi. Lahore: Maktaba-Al-Quraish, 1982. 6+96+42p. 18cm. 9,90 gld.

Civila malobeemo (1849). Henry David Thoreau (1816-1862). El la angla trad. Brian McClafferty. Enkonduko de Léon Bazalgette, el la franca trad. "D.C.". Beauville: SAT-Broŝurservo, 1990. 38p. 21cm. Fama eseo de usona liberpensulo, pri la devo de la civitano malobei nejustajn leĝojn. 4,20 gld.

Danĝera lingvo, La. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto (1988). Ulrich Lins (1943). Moskvo: Progreso, 1990 (2-a eld., kun aldonaj postparoloj de S. Kuznecov kaj D. Blanke). 568p. ISBN 50 1003 136 1. 20cm. Bind. Detale dokumentita historio de la atakoj kontraŭ kaj subpremo de la Esperanto-movado, precipe sub la reĝimoj de Hitler kaj Stalin, sed ankaŭ en cara Ruslando, en la Ligo de Nacioj kaj en orienta Azio. Esenca legaĵo por iu ajn studento de la movado. 66,00 gld.

Deskripto de aproksimaĵoj kiel abstraktaj komputo-strukturoj laŭ la ekzemplo de la reelaj nombroj / Beschreibung von Approximationen als abstrakte Rechenstrukturen am Beispiel der reellen Zahlen. Reinhard Fössmeier. München: la aŭtoro, 1989. 104p. 21cm. Disertaĵo sub la aŭspicio de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, analizanta kelkajn limojn de la komputa matematiko. Paralelaj tekstoj. 13,20 gld.

22 baladoj. Georgo Handzlik. Bielsko-Biała: la aŭtoro, 1989. 32p. 20cm. Originalaj kanzonoj, kun muziknotoj kaj indikoj por gitaro. Romantikaj kaj satiraj pritraktoj de la Esperanto-movado k.a. 5,10 gld.

Esperanto ne estas nur lingvo. Ekzercaro post la baza kurso laŭ la Zagreba Metodo. Spomenka Štimeć. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1990 (2-a plibonigita eld.). 20p. 20cm. Simpla, belstila enkonduko en la movadon por komencantoj. 6,60 gld.

Esperanto-medaloj kaj moneroj. Komp. Hans Jankowski, red. Alfred Conzeth. Dortmund: la kompilinto, 1990. 18p. 21cm. Aldono al *La Radsaltanto* n-ro 1/1990: Primitivaspekta sed informriĉa katalogeto por kolektantoj k.s. 3,90 gld.

Esperanto. Johdatus kansainväliseen kieleen. R. Imbert k.a. En la finnan trad. Irja Klemola. Turku: Monex, 1989. 50p. 21cm. La Zagreba Metodo por finnlingvanoj: legaĵoj, ekzercoj, vortareto. 12,00 gld.

Geedziĝaj moroj de ĉinaj nacimalplimultoj. Tian Xing, el la ĉina trad. Feng Yi. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1989. 158p. ISBN 75 0520 022 4. 18cm. Koncizaj, facile legeblaj skizoj de la seksaj kaj sociaj kutimoj rilate geedziĝon en 19 etnoj. Kun plurpaĝa kolora fotoserio. 6,00 gld.

Gerda malaperis: Vortlisto/Woordenlijst. Claude Piron, Marc Vanden Bempt. Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo, 1989. 44p. ISBN 90 7120 531 2. 21cm. Lernhelpilo por nederlandlingvanoj. 3,30 gld.

Inferio (1938). Hindrik J. Bulthuis. Vieno: Pro Esperanto, 1990 (represo). 154p. 21cm. Satira rigardo al la industria civilizo tra la okuloj de "primitivuloj". 24,00 gld.

Kial mi estas ateisto. André Lorulot. El la franca trad. Valo. Beauville: SAT-Broŝurservo, 1990. 128p. 21cm. Serio de mallongaj, pasiaj polemikoj kontraŭ la instruoj de la katolika eklezio k.a. 10,20 gld.

La eldonado de SAT iom viglas.

Language in religion. Div. aŭtoroj, red. Humphrey Tonkin kaj Allison A. Keef. Lanham, New York, London: University Press of America, 1989. 122p. ISBN 08 1917 511 0. 23cm. Bindita. Kolekto de referaĵoj el CED-konferenco en 1988, traktanta teologiajn-filozofiajn, sociajn kaj praktikajn aspektojn de lingvouzo kaj tradukado en diversaj eklezioj. Resumoj en Esperanto. 42,00 gld.

Nelikeniĝintaj fungoj likenloĝaj. Ilustrita determinlibro. G. Clauzade, P. Diederich, C. Roux. Marseille: Société linnéenne de Provence, 1989. 142p. ISSN 0373-0875. 24cm. Laboraĵo de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, kompletigo de la eminenta *Likenoj de okcidenta Eŭropo*. 25,80 gld.

Ni kantas en Esperanto (1980). Red. Ludwig Schödl. Berlin: Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, 1989 (2-a eld.). 58p. 21cm. 49 kantoj, inkluzive batalkantojn, popolkantojn (germanajn kaj internaciajn) k.a. Kun muziknotoj. 7,20 gld.

Oreroj el Nederlando. Div. aŭtoroj, komp. Ton Verwoerd. El la nederlanda trad. div. tradukistoj. Beverwijk: De Lynx, 1990 (neindikita). 36p. 21cm. Dek ses porinfanaj poemoj en dulingva eldono. 7,50 gld.

Paroligiloj. Stanley Nisbet. Glasgow: Kardo, 1990. 16p. 21cm. Diversaj temoj por diskuto, konversacioj k.s. en progresiga kurso. 1,50 gld.

Por tutmonda civitismo. La necesa civitana edukado. Andrée Gaymard Rollet. El la franca trad. Daniel Durand. Beauville: SAT-Broŝurservo, 1990. 80p. 21cm. Principaj kaj praktikaj konsideroj pri la homa kunvivado je monda skalo. 8,40 gld.

Remonstranta frataro, La. Informilo pri liberala eklezio nederlanda. El la nederlanda trad. Gerrit Berveling. Breda: VoKo, 1990. 20p. 21cm. Voĉoj Kristanaj 19. 3,00 gld.

Rezolucioj de la kongreso de Saint-Imier (16-a/17-a de septembro 1872), La. Beauville: SAT-Broŝurservo, 1990. 14p. 21cm. Deklaroj de la frua internacia laborista movado, kontraŭ la "aŭtoritatismo" de Marks kaj Engels en la Unua Internacio. 2,70 gld.

Ronkanta avo, La. André Weckmann. El la germana trad. Edmond Ludwig. Orientfranca Esperanto-Federacio, 1989. 16p. 28cm. Desegnis Pierre Lataste. Infanrakonto: Avo Klazen kunvivas pli feliĉe kun la kvartalaj infanoj, ol kun siaj najbaroj. 9,30 gld.

Rusa-Esperanta vortaro. Russko-Esperantskij slovar' (1966). Red. E. A. Bokarev. Dušanbe: Ĉefa scienca redakcio de *Taĝikia Soveta Enciklopedio*, 1989 (2-a eld.). 544p. ISBN 58 9870 006 4. 16cm. Unudirekta, preskaŭ 24 000 vortoj. 13,50 gld.

Sennaciece tra nia mondo. Gilbert R. Ledon. Xanxerê: la aŭtoro, 1989. 224p. 21cm. Individueca komentario pri la politiko, kulturo kaj aliaj karakterizaĵoj de diversaj landoj, vizititaj dum mondvojaĝo. 21,00 gld.

Sisteme ordigita vortaro. Michele Mariano. Parizo: Lina Gabrielli, 1989. 526p. 21x32cm. Originala prezento de la Esperanta leksiko, laŭ temokampoj kaj en aranĝo de sinonimoj tra malpli proksime parencaj esprimoj ĝis antonimoj. 96,00 gld.

Socio-political, educational and cultural roles of Esperanto, The. Edward Symoens. El Esperanto trad. Máire Mullarney, Malcolm Jones. Antwerpen: ILEI, 1989. 44p. 21cm. 8,10 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18,5% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Loke

• **Belgio:** Esperanto-grupo en Oostende starigis novan rekordon pri la kolektado de korespondaĵoj, kontribue al bonfara kampanjo por la kanceresploro. La 18-an de marto la grupo publike ekspoziciis 4 780 korespondaĵojn, en ĉeesto de reprezentanto de la Rekordlibro Guiness, kaj diversaj amaskomunikiloj raportis poste pri la "Esperanto-rekordo". Grave rolis la ligo kun respektata, bone funkcianta organizaĵo, kaj necesis investi amason da tempo, sed la rezultoj en kaj ekster la klubo estis kontentigaj.

• **Britio:** UEA-delegito Douglas Kershaw sukcesis havigi oficialan inviton de la nordanglia urbo Scarborough por la internacia ekologia ekspedicio "Kolumbo 500", kiu uzas la anglan kaj Esperanton kiel laborlingvojn. Du aŭ tri "polimaranoj" (plurkarenaj velboatoj) ekvojaĝos en julio el Tallinn, Sovetunio, survoje al Cádiz, Hispanio. La ekspedicio krome vizitos Helsinki, Stockholm, Kopenhagon, Scarborough, Lorient (Francio) kaj Vigon (Hispanio).

• **Hungario:** D-ro Vilmos Benczik, redaktoro kaj literaturisto kiu delonge gvidas la eldonejon de Hungara Esperanto-Asocio, estis lastatempe elektita kiel prezidanto de HEA. En la nova estraro troviĝas ankaŭ Sándor Jakob (ĝen. sek.), Oszkár Princz (sek.), Árpád Rátkai, Gábor Márkus kaj Ferenc Phersy (vicprezidantoj).

• **Irlando:** La 20-an kaj 21-an de aprilo okazis kunvenoj en la Universitato Trinity, Dublino, pri la temo "La Eŭropa Komunumo kaj la lingvoj post 1992". Prelegis Hans Erasmus, Claude Nourmont, Brian Moon kaj Christopher Fettes. Kunlige kun tiu publika prezento, la nacia radio elsendis programon pri Esperanto al ĉ. unu miliono da aŭskultantoj.

• **Israelo:** Laŭ decido de la landa asocio E-Ligo en Israelo, de januaro 1990 funkcias E-Instituto je la nomo de Isaj Dratwer en la domo, kiun la Ligo heredis de s-ro Dratwer. Ĝian agadon, kiu inkluzivas eldonadon, instruadon kaj informadon, gvidas Josef Murĵan (komitatano de UEA). Adreso: str. Ĥelmit 16/2, Pk. 1289, Jafo (Tel-Aviv).

• **Norvegio:** Antaŭ kelkaj numeroj ni raportis pri la elsendo, fare de la Norvega Radio, de kvarhora programo pri planlingvoj kompilita de radioĵurnalisto Tron Øgrim. Tiu ĉi sekve gajnis la landan premion por sendependa radioĵurnalismo. La ĵurio deklaris i.a., ke: "La gajninto posedas aparte bonajn sciojn pri la homaj klopodoj konstrui lingvojn. Ĉi tiun materialon li popularigis en modela maniero, videbligante la sekvojn politikajn, filozofiajn kaj historiajn."

Sekve de E-vidbendo pri la urbo Hamar, produktita por la ĉi-jara Internacia Fervojista E-Kongreso, aperis dua vidbendo pri la regiono Henemarken, "Sur la suna bordo de la lago Mjøsa". Ĝi prunteblas, same kiel la unua, de Per Johan Krogstie, Karudveien 1, N-2340 Løten, kontraŭ po NOK 50,– (ĝirebla al poŝta konto 0805 5189030).

• **Pakistano:** Muztar Abbasi, fondinto de la landa asocio PakEsA kaj profesoro pri lingvoj en Kolegio de Murree, lastatempe veturis tra la tuta provinco kaj en multaj urboj sukcesis veki intereson pri Esperanto. En Mian Chunnun kaj Chishtian li aranĝis bazan kurson. En la industria urbo Gojranwala kurson kaj novan grupon starigis Amĝad Bult. Mohammed Naeem Javaid informis pri Esperanto la gvidantaron de la Tutlanda Unuiĝo de Asocioj kaj Organizoj, en kiu membras PakEsA, kaj trovis tie kunlaboremon.

• **Zairio:** Inter la signifaj okazaĵoj de la movada vivo post la vizito de P. Chavignon (vd. *Esperanto* 1990/p.4) estis Zamenhoffesto en Lukala, organizita de la loka grupo "La stelaro"; lanĉo de nova kurso en la ĉefurbo Kinŝaso; estrarkunsido de Esperanto-Instituto de Zairio (EIZ) la 25-an de februaro en Lukala (foto); kaj la komenco de koresponda kurso administrata de EIZ. La Instituto havas novan kotizan strukturon kaj laborplanon, kiu antaŭvidas ĝian translokiĝon al la ĉefurbo. Ĝi ankaŭ havas novan korespondan servon: "Korespondu kun Zairianoj", E-klubo "La Verda Flago", B.P. 275, Mbonga-Ngungu (Bas-Zaïre).



Fake



• **Anarkiismo:** La Federacio de la Anarkiistoj en Bulgario unuafoje malkaŝe kunvenis en Kazanlak, la 19-an kaj 20-an de majo, kaj akceptis rezolucion, en kiu ĝi i.a. subtenis la instruadon kaj uzon de Esperanto. Informoj: C. L. Damjanov, Makariopolski 7, BG-6100 Kazanlak.

• **Arkeologio:** Ĉe internacia kongreso pri la Origino kaj Evoluo de la Homo, en la Siliko-Muzeo en nordorienta Belgio, la partoprenantoj povos ricevi komentarion ankaŭ en Esperanto de la ĉefaj organizantoj. Turnu vin por pliaj informoj al Fredo Bosmans, 21, route de Comblain, B-4183 Xhoris.

• **Esperantologio:** De la 27-a de aprilo ĝis la 2-a de majo 1990 denove okazis grava seminario en la gastodomo de Kulturligo de GDR, en Bad Saarow. Kolektiĝis 37 fakuloj el la akademia sfero por trakti per 24 prelegoj la temon "Esperanto – objekto de akademia esplorado kaj instruado". La partoprenantoj venis el Bulgario, GDR, FRG, Japanio, Hungario, Pollando, Rumanio kaj Sovetunio. Aparte interesa estis la prezento de la rumana akademia modelo, krei E-movadon en nacia skalo, prezentita de prof. I. Bociort, prezidanto de la nove fondita Rumana E-Asocio.

• **Eŭropa kunlaboro:** Prezidanto Georges Sossois, nome de Belga E-Federacio, proponas organizi kunvenon en Bruselo de la eŭropaj landaj kaj fakaj asocioj, plej verŝajne en decembro 1990. Intertempe li esperas akiri subtenon kaj subvencion por tia konferenco, demonstrante la praktikan valoron de Esperanto en kontaktoj inter okcidenta kaj orienta Eŭropo. Orient-eŭropaj studentoj, kiuj konas Esperanton kaj ŝatus restadi en Belgio por pristudi la eblecojn kaj funkciadon de la belga ekono-

mio, bv. peti vian landan asocion proponi vian nomon al la belga registaro, kiel priskribis s-ro Sossois en letero de la 28-a de aprilo.

• **Faka adresaro:** La franca asocio Esperanto-95 celas starigi adresaron de profesiuloj kaj laborejoj, kiuj uzas Esperanton, por vendado ne nur movade sed ankaŭ publike. Por tio ĝi serĉas multajn kunlaborantojn. Kontaktu Esperanto-95, 8 rue de l'Eglise, F-95520 Osny, Francio.

Konkurso!

La 15-an de julio, Kuba Radioamatora Federacio (KRF) kaj Scienc-Teknika Sekcio de Kuba Esperanto-Asocio okazigos konkurson por radioamatoroj. La celo estas kontakti la sidejon de KRF inter 00h01 kaj 24h00 UTC, ĉe ondolongoj 10, 15, 20, 40 m, aŭ telegrafie (T42T) aŭ telefonie (T42UK). Post la kongreso KRF sendos QSL-kartetojn al ĉiuj partoprenantoj. Ĝi ankaŭ prizorgos informbudon dum la kongreso.

• **Fervojo:** Venontjare la Ĉeĥoslovakaj Ŝtataj Fervojoj, kunlabore kun komitato de la fervoja faksekcio de Ĉeĥa E-Asocio, aranĝos internacian konferencon "Fervojo sojle de la 3-a jarmilo". La laborlingvoj estos la ĉeĥa aŭ la slovaka, la angla kaj Esperanto, kun konstanta samtempa interpretado. Laboros sekcioj pri la historio, tekniko, trafiko kaj estonteco de la fervojo, kaj ankaŭ pri la aplikado de Esperanto en tiu fako. Tuj post la konferenco, la 9-an kaj 10-an de majo, okazos la 43-a IFEF-kongreso (11-18 majo), kiu same ĝuas la aŭspicion de la ĝenerala direktoro de la ĉeĥoslovakaj fervojoj, Ivo Malina.

Por ricevi pliajn informojn kaj aliĝilon bv. skribi al Petr Chrdle, VÚŽ-Fervoja Esplorinstituto, U Lužického semináře 3, CS-11857 Praha 1.

• **Filmo:** La franca firmao Interland entreprenas la realigon de dokumenta televida filmo en Esperanto pri la ŝanĝiĝanta vivo en orienteŭropaj landoj. Tiurilate ĝi serĉas kontaktojn kun ĉiuj kinospertuloj kaj kun kandidatoj por intervjuiĝo en la filmo mem. Se troveblos financa subteno (de eŭropaj aŭ francaj instancoj) surbaze de tiaj promesoj de kunlaboro, la filmado okazos en la unuaj monatoj de 1991. Skribu tuj pri viaj interesoj kaj kvalifikoj, prefere en lingvo komprenebla al eŭropa-franca instanco, al Interland, 25 bd. Jules Sandeau, F-75016 Paris.

• **Infanarto:** La E-rondeto "Espero" ĉe lernejo 102 en Barnaulo, Sovetunio, petas kontribuojn por ekspozicio de infanpentraĵoj en oktobro 1990. La ekspozicion, je la memoro de la usona knabino Samantha Smith kaj por paco kaj amikeco inter diversnaciaj infanoj, povas partopreni infanoj 4- ĝis 14-jaraj. Pentraĵojn pri ajna temo, prefere ne pli grandajn ol 42x30 cm., kun surdorse la titolo kaj nomo, aĝo kaj adreso de la aŭtoro, sendu al E-klubo "Espero", A/K 2040, Barnaulo 64, 656064 Sovetunio. Bonvenaj estas ankaŭ leteroj, ludiloj faritaj de infanoj, k.s. Ĉiu partoprenanto ricevos respondon kaj memoraĵon.

• **Kosmaj esploroj:** De la 19-a ĝis la 21-a de oktobro en Vraca, Bulgario, okazos internacia scienca seminario "Kosmo, homo, lingvo". La programo traktos i.a. kosmajn esplorojn, eksterterajn civilizaciojn, ekologion, lingvajn problemojn, sciencfikcian literaturon en Esperanto, ktp. Aliĝu kaj informiĝu ĉe Esperanto, Pk. 66, BG-3000 Vraca.

• **Kultura evoluo:** La nova UEA-komisiito pri la Monda Jardeko de Kultura Evoluo, Elisabeth Schwarzer, koncentros sian agadon unuavice sur la temon "Esperantaj vivkomunumoj kaj familioj kiel praktika ekzemplo de aŭtentike internacia identeco". Ŝi celas kolekti informojn kaj prezenteblajn materialojn pri tiaj komunumoj, stimuli ilian diskonigon ankaŭ al neesperantista publiko, kaj kuraĝigi la profesinivelan pristudon de ili. Kunlaboremuloj (speciale pri aŭdvidaj prezentoj) bv. kontakti ŝin ĉe Kaiserin-Augusta-Str. 75, D-1000 Berlin 42.

• **Lingvofoiroj:** Pli kaj pli da eŭropaj landaj asocioj partoprenas en ĉi tiuj aranĝoj, kiuj ja proponas idealan kadron por prezenti Esperanton al lingvema publiko. Michela Lipari (Italio) proponis kunordigon de tiu partopreno, tiel ke la publiko en ĉiuj dek (aŭ pli da) landoj, kie tiuj foiroj okazas, ricevu same modernan kaj allogan bildon de Esperanto. Ĉu troviĝas kunlaborantoj? Anoncu vin al la Informa Fako en la Centra Oficejo.

• **Medicino:** De la 28-a ĝis la 30-a de septembro 1990 okazos en Gorna Orjahovica, Bulgario, konferenco pri la temo "Ekologio kaj sano". Aliĝu ĉe Bulgara Esperantista Asocio (Medicina Sekcio), bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia (kotizo 60 usonaj dolaroj, pagebla al konto 421 399-7/Esperantoturist ĉe Bulgara Banko por Eksterlanda Komerco, aŭ pere de UEA, konto beaa-x).

• **Muziko:** La 6-an de februaro, usona perkutisto Skip Reed prezentis en la prestiĝa koncertejo Merkin en Novjorko la premieron de sia verko "Esperanto". La aŭtoro iam eklernis la lingvon, kaj estis inspirita de ĝia aspiro al homa frateco kaj de ĝia belsoneco.

Kunlaboron pri *Gvidlibro pri Muzikterminoj en Esperanto*, en la formo de citaĵoj montrantaj la uzmanieron de ĉiu termino, serĉas Andreo Marshall, 42 High St., Waltham, Grimsby, S. Humb., DN37 0PL Anglio.

Persone

• **Balbin:** Poeto kaj poligloto Julius Balbin, aŭtoro de *Imperio de l' koroj* (Edistudio, 1989), estis elektita fine de la pasinta jaro kiel prezidanto de Usona Societo de Geolingvistiko. La societo, kiun fondis en 1965 fama lingvisto Mario Pei, celas kolekti kaj disvastigi ĝisdatajn informojn pri la distribuo kaj uzo de la lingvoj de la mondo, pri ilia relativa graveco laŭ politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj kriterioj, pri iliaj historio kaj interrilatoj. Ĝi eldonas propran revuon, *Geolinguistics*, alte estimatan en lingvistikaj rondoj de Usono.

• **Lennon:** Memore al la fama angla muzikisto kaj pacaktivulo John Lennon, naskiĝinta antaŭ 50 jaroj, E-aktivuloj en Samarkand, Uzbekio (Sovetunio), aranĝas ampleksan ekspozicion. Ĉiulandajn, ĉirilatajn afiŝojn, fotojn, dokumentojn ktp pri Lennon sendu al International Friendship Club "Esperanto", P.O. Box 76, SU-703000 Samarkand. Rekompenco laŭ interkonsento.

• **Lins:** UEA-vicprezidanto Ulrich Lins pasigis en majo du semajnojn en Teherano, Irano, kie li interalie informiĝis pri la landa E-movado. Li havis kun d-ro M. H. Saheb-Zamani longan interparolon, kiun ni esperas publikigi en unu el la venontaj numeroj. Krome, li vizitis kadre de la Internacia Libro-Ekspozicio de Teherano la standon de la eldonejo Atai, en kiu troveblis ankaŭ ĝiaj libroj pri kaj en Esperanto.

• **Sekelj:** En tombejo de Subotica, Jugoslavio, estas starigita memorŝtono al Tibor Sekelj. La teksto en Esperanto indikas lian profesion: "verkisto, mondvojaĝanto".

Post lia morto aperis du novaj nacilingvaj tradukoj de lia verko *Kumeŭaŭa – filo de la ĝangalo*, en la sveda kaj ukraina. Tiu verko estas verŝajne la plej ofte tradukita fikcia verko en Esperanto: ĝi ekzistas nun en 20 lingvoj.

• **Sherwood:** La konata usona interlingvisto-edukisto Bruce A. Sherwood anoncis la 30-an de marto sian eksiĝon el la Akademio de Esperanto. En publika letero li klarigis sian malkontenton pri la gvidado kaj lastatempaj decidoj de la organizaĵo.

INTERLAND

La entrepreno INTERLAND plu uzas nur Esperanton por la plurlandaj industriaj firmaoj, al kiuj ĝi ofertas la serĉon de alilandaj partneroj komercaj, kaj la kompletan instruadon de Esperanto al iliaj teknikaj dungitoj malsamlingvaj, por plej facila kaj malaltkosta komuniko interna.

Esperanto restas do la INTERLANDa lingvo, kaj tio okazas . . .

• malgraŭ ke nur 137 esperantistoj iom investis en akciojn de nia juna firmao, el la dekoj da miloj kapablaj por tia minimumkosta investo (1 INTERLANDa akcio = 140 FRF = 20 EKU);

• malgraŭ ke ankoraŭ neniu banko konsentis prunti al INTERLAND, pro ĝia "malsaĝeco" uzi lingvon, kiun neniu parolas;

• malgraŭ ke neniu ŝtato (el tiuj, kiuj pleje havas intereson promocii Esperanton: Ĉinio, Japanio, Germanio, orienteŭropaj landoj, ktp.) subvencias INTERLANDon;

• malgraŭ ke neniu esperantisto konsentis serioze serĉi klientojn por INTERLAND (krom s-ro Pascal JALABERT, dum kelke da tempo);

• malgraŭ ke neniu franclingva student(in)o (el pli ol 200 respondintaj al niaj gazetaj vokoj por komerca staĝanto) akceptis la komision vendi la INTERLANDajn servojn (krom unu, dum 8 semajnoj);

• malgraŭ ke fama "laborista" asocio esperantista nune kampanjas por kredigi INTERLANDon kontraŭ-Esperanta;

• malgraŭ ke la teroriĝo de la ĉina reĝimo (ekde 1989/6/4) ruinigis la INTERLANDan projekton pri eŭropa-ĉina komerc-revueto (tial senroligante niajn kunlaboremulojn en Ĉinio);

• malgraŭ ke nia plej sindonema kunlaboranto, longe konservita en Esperantujo, senesperiĝis kaj sukcesis eliĝi el tiu ujo.

Malgraŭ ĉiuj tiuj malhelpaĵoj, INTERLAND pluas kaj iras firme antaŭen, pro ke neniu alia organizo nuntempe estas pli utila ol ĝi por seriozigi Esperanton, per donado al tiu lingvo de ekonomia graveco. Tial, estas la devo de ĉiu vera esperantisto fari ĉion fareblan por helpi INTERLANDon . . .

• serĉi (franclingvan) vendiston (aŭ studenton, kiu devas plenumi vendostaĝon) por INTERLAND;

• aĉeti INTERLANDajn akciojn (po 140 FRF aŭ 20 EKU aŭ 25 USD), pageblajn per ĝiro al la INTERLANDa poŝta konto (n-ro 333054L, ĉe la centro: Montpellier) aŭ al ĝia UEA-konto (intl-h);

• diskonigi INTERLANDon ekster Francio (la koston de reklamado ekster tiu lando apenaŭ kompensis la investoj en INTERLANDon de ne-francoj);

• prunti al INTERLAND adreson en lando fiske pli avantaĝa por ĝi (la idealo ŝajnas esti formala sidejo en Rumanio aŭ Pollando, ĉar INTERLAND iĝos tiam firmao rumana aŭ pola, kaj tiel profitos la multajn helpojn de Okcidento al tiuj du landoj);

• kaj respondi aŭ respondigi al ĉi tiu grava voko:

INTERLAND baldaŭ realigos dokument-filmon pri la ĉiutaga vivo en orienta Eŭropo, kiu parolos Esperanton kaj vendiĝos al okcidentaj televidoj, en naciaj versioj tamen aŭdigontaj iom da Esperanto. Por tiu filmo, bezoniĝas film-teknikistoj el orienta Eŭropo (kameraisto, muntisto, desegn-animisto) kaj gejunuloj kiuj deziras intervjuiĝi en la filmo (el DDR, PL, CS, H, R, YU, BG kaj la eŭropa Sovetio).

INTERLAND: 25, bvd Jules-Sandeau, F-75016 Paris
(telefone 33 / (1) 45 03 10 03)

Personaj mesaĝoj: INTERLAND sincere kondolencas pri d-ro Kuwahara Tosihide kaj s-ino Akiko Woessink-Nagata. INTERLAND antaŭdankas tiujn, kiuj certe baldaŭ pagos sian menditan dosieron: s-ro Jovo Djurić, d-ro Ueli Haenni, s-ino Maja Kovačić, d-ro Alfio Lo Faro, ges-roj Karl E. Salzmann, Kjell A. Unneland (ĉiu po 14 FRF aŭ 4 IRK) kaj s-ino Hélène Normand (12 FRF), s-ro Roger Yafil (24 FRF) kaj d-ro José R. Arze (20 USD). INTERLAND dankas s-ron Lee Jung-kee (redaktoro de *La Espero el Koreio*), s-ron Marc Levin (redaktoro de *Le Rotarien*) kaj s-ron François-Xavier Gilbert (direktoro de la Komerco-Ĉambro de Bar-le-Duc), kiuj malsukcesis aperigi INTERLANDan informon en sia respektiva revuo.

• *La asocio P.E.R.I.L.-Eŭropo* sciigas, ke ĝi havas nenian juran nek celan rilaton kun INTERLAND; ke ĝia kampanjo P.E.R.I.L.-Afriko (alfabetizado per Esperanto en kampara regiono de Zairio) tute lasiĝis al siaj zairaj partneroj (E.I.Z.) pro daŭra nehelpemo de ĉiuj kontaktitaj esperantistoj eŭropaj (krom s-ro Hans Bakker); ke tiu malsukceso de Esperanto instigis P.E.R.I.L.-Eŭropon eksperimenti la modernan latinon (Interlingua) anstataŭ Esperanto. (P.E.R.I.L.-Eŭropo: 4 rue Monnaie, F-30400 Villeneuve.)

Ĉu vi jam konas tiujn librojn?

Richard Schulz, **Mein geliebtes Esperanto**
Wege zum Verständnis der Internationalen Sprache
215 Seiten DM 16,80

Richard Schulz, **Europäische Hochsprache...**
oder Sprachimperialismus?
256 Seiten DM 15,80

Richard Schulz, **Was nun Esperanto betrifft...**
Festschrift zum 80. Geb.; esperantologische Beiträge
248 Seiten DM 19,80

Mendu ĉe via libroservo aŭ rekte ĉe la Paderborna Esp.-Centro.

Esperanto-Centro, D-4790 Paderborn, Pf. 1450

Esencaj informaj verkoj, sub la ŝildo de UEA:

LA FENOMENO ESPERANTO
William Auld

Populara prezento, celata por traduko en naciajn lingvojn. La libron komencas konciza skizo de la monda lingvo-problemo; sekvas klarigo de la fundamentaj ecoj de Esperanto mem, poste historioj de la movado kaj literaturo, kaj fine instigo uzi la lingvon por praktikaj kaj kulturaj celoj. La tuton animas la pasia amo de la aŭtoro por sia studobjekto.
120 p. 21 cm. Ilus. ISBN 92-9017-037-9. 18,00 gld.

ESPERANTO:
LINGVO – LITERATURO – MOVADO
Pierre Janton

Aŭtora traduko de tre sukcesa franclingva verko. Se *La fenomeno* aparte taŭgas por homoj kun mez-aŭ alt-lerneja eduko, tiu ĉi libro estus perfekta bazo por unuajara universitata kurso. Enestas elementa lingvistika prezento de Esperanto, sociologiaj studetoj de la literaturo kaj movado, kaj utila bibliografio.
120 p. 21 cm. ISBN 92-9017-034-4. 18,00 gld.

Mendu de la Libroservo de UEA. Por ambaŭ eldonaĵoj validas triona rabato ekde tri ekzempleroj.

La firmao

Pres-Esperantista Asocio

- produktas kaj distribuas en- kaj eksterlande: la periodaĵojn *Bulgara esperantisto* kaj *Panorama Esperanto* (bulgarlingvan), librojn, lernilojn de Esperanto, reklamajn materialojn, sonkasedojn, gramofondiskojn, suvenirojn k.a.,
- importas kaj vendas en Bulgario E-literaturon kaj aliajn esperantaĵojn,
- publikigas en siaj eldonaĵoj kaj peras reklamanoncojn,
- laŭmende presas kaj bindas.

Adreso: p.k. 66, BG-1000 Sofia, Bulgario
tel. 22 80 86 aŭ 31 00 29
tlx. 23599 kabini bg

Se vi ne veturos al Kubo, partoprenu IJS!
Internacia Junulara Semajno,
03-09 aŭgusto en Hungario
Informoj: LINGVO-STUDIO,
H-1676 Budapest, pk. 87.
Telefono: +36 - 1 - 1288258

Fama verko de konata komponisto – en Esperanto!
Händel: MESIO
Koncerta registraĵo de Budapeŝta Printempa Festivalo.
Sonkasedo de LINGVO-STUDIO. Prezo: 15 gld.

La Libroservo de UEA vendas pli ol 30 Esperanto-filatelaĵojn!

Skribu al ni por ricevi kompletan liston.



Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and Documentation of World Language Problems

La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.

Redaktas: Probal Daŝgupto,
Klaus Schubert, Humphrey Tonkin

Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Individua abono: 54,00 gld. / US$27.00
Institucia abono: 105,00 gld. / US$ 52.50

Abonu pere de la Libroservo de UEA.